

KATALUNA ESPERANTISTO

ĈIUMONATA OFICIALA ORGANO

DE LA



JARO Va : JANUARO 1914

700044-B 5
1914

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
DE «KATALUNA ESPERANTISTO»

<i>Direktoro</i>	FRED. PUJULÀ
<i>Redakcia sekretario</i>	JOSEP GRAU
<i>Redaktoro</i>	E. PELLICER
<i>Administristo</i>	JOAN PIFERRER
<i>Administraciaj sekretarioj</i>	{ MANUEL BORDAS JOAN HORTA

REDAKCIAJN KORESPONDAĴOJN SENDU AL REDAKCIA SEKRETARIO:
STRATO CARME, 30 : BARCELONO

KORESPONDANTOJ

(La listo aperos en venontaj numeroj)

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO □ OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

SEN PAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
12, strato Gracia. — SABADELL
KATALUNUJO

Redakciajn korespondadojn bonvolu
sendi al «Redakcia Sekretario: strato,
Carme, 30; Barcelono».

NIA DEVIZO : «MARO ESTAS GUTARO»

ENHAVO : *Novjara Saluto.* — *Tra Germanujo,* Fred. Pujulà. — *Korespondado.* — *Amo,* Clarence Bicknell. — *La vojo al morto,* Manuel Bordas. — *Deka Universala Kongreso de Esperanto.* — *V^a Kongreso de la K. E. F.,* Josep Grau. — *IV^a Literatura Konkurso de la Kataluna Esperantista Federacio.* — *Bibliografio,* Fred. Pujulà; Tamen. — *Enlanda Movado.* — *Als senyors federats, als grupos, als delegats,* J. Bordas.

Al D-RO LAZARO LUDOVIKO ZAMENHOF
al la TUTA SAMIDEANARO kaj al la ESPERANTISTAJ
GAZETOJ deziras plenan feliĉon
okaze de la nova jaro en la nomo de la
Kataluna Esperantista Federacio

La Komitato

Tra Germanujo¹

MALGRAŭ ĉio, mi preferis min turni al la esperantistoj, peti ilian helpon kaj malpligrandigi per tio la okazajn uzi miajn *specialajn* konojn pri germana lingvo. Mi des pli deziris eviti tiajn okazajn, ke mi ne estis vojaĝonta sola, kaj almenaŭ por miaj geamikoj, mi deziris iom pli da precizeco kaj iom malpli da hazardo ol la donota de nekono de lingvo.

Aliflanke mia vojaĝo estis ne nur plezura, sed iel komerca, kaj ĉefe propaganda. Ĝia preparado ridetigis min. En tiuj ĉi paĝoj mem, mia bonega amiko Tamen ŝercis verkon en kiu protagonisto lernas Esperanton por vojaĝi en fremdlandon al studo de meĥaniko; kaj kiam miaj geamikoj Cuatrecases sin turnis al mi dirante: «ĉar vi konas germanan lingvon, vi devas akompani nin tra Germanujo», kaj kiam mi respondis «per germana lingvo mi nur scias diri: «Sprechen Sie Esperanto?» sed mi volonte akompanos vin per helpo de Esperanto ĉar mi volas varbi vin per ekzemplo kaj praktiko, plenumante mian devon de kataluna-federaciano gajni ĉiujare unu adepton al nia afero» — tiam mi ridetis, pensante pri la farota mieno de Tamen kiam mi pruvos al li ke se ne antaŭ, almenaŭ post meĥaniko, esperantistigo estas ebla.

Tial mi min turnis al esperantistoj. Tial! Mi parolas kvazaŭ mia komenca ŝerco estus serioza! Ĉu mi povus agi alimaniere? Ĉu mi povus, krom akcepti la malagrablojn de vojaĝo en fremda lando tiel facile evitotajn per helpo de nia lingvo, senigi min je la plezuro premi la manojn de amikoj batalantaj por la sama afero? Ĉu mi povus rifuzi al mi la ĝojon fariĝi kvazaŭ feo, kaj per la sola sorĉo de la simpla nomo de nia lingvo starigi antaŭ mia vojo la kortuŝantan amikecon de nekonituloj, veki kaj voki la helpon de homoj ĝis tiam ne viditaj—amikeco kaj helpo, kiu eble erarigas nin pri la vera karaktero de la homa gento, sed vere flegas la vundojn de nia koro?...

Ĉar mi lasis en Barcelono la «Tutmondan Jarlibron» kiun mia bonega amiko S-ro Colas redaktas, forprenante de Barcelono la duonon de ĝia loĝantaro, — mi min turnis al la Centra Oficejo kun peto de adresoj. Sinjorino Ferter, la edzino de nia kara reprezentinto en Krakovo, eltiris el skatoletoj kaj slipujoj tiom da ili, ke mia elekto fariĝis malfacila. Mi elektis tamen preferinte tiujn de neamikoj, ĉar

1. *Sekvo.* Vidu antaŭan numeron.

mia deziro estis ankaŭ persone provi la bonecon de nia lingvo kaj en plej malbonaj kondiĉoj montri ĝin al miaj geamikoj. Kaj mi bone agis tiel elektante, ĉar la sola persono kiu ne respondis al miaj petoj pri informoj... estis amiko ŝuldanta al mi tre gravajn esperantistajn servojn.

Mi skribis, mi ricevis respondojn. De mia hejmo mem mi povis aranĝi kaj prepari mian tutan vojaĝon; kaj kiam ni supreniris la rapidan vagonaron en la «Gare de l'Est» ĉiu detalo estis prizorgita, ĉiu dezirita hotelĉambro rezervita en la ses urboj vizitotaj, mi havis eĉ portretojn de la personoj, kiuj atendas min ĉe la stacidomoj.

Mi ne priskribos urbojn, mirindaĵojn kaj vojojn, nek kutimojn popolajn kaj manĝaĵojn. La plej grava mirindaĵo el ĉiuj estas Esperanto mem. Miaj geamikoj diris ĉion, kion oni povas diri, kiam ili sin demandis dum la vojaĝo ĉu ili efektive troviĝas en fremda lando. Ni ĉiam estis ĉirkaŭitaj de bonaj komplezemaj amindaj personoj, kiuj interparoladas kun mi, kaj el kies vortoj, miaj geamikoj, kvankam ne esperantistoj, komprenis bone multajn. Ne, kiam oni sin komprenas reciproke, oni ne havas la severan mienon de fremdulo, kaj la domoj, la kutimoj, la popoloj, nenio estas fremda. Ĉio estas pli malpli kurioza, tute kiel kiam oni vojaĝas urbon de nia propra lando, sed fremdecon, tiun amaran econ de homoj kaj aferoj, oni nenie sentas.

Mi kunportis kun mi amason da ŝlosiloj kaj flugfolioj; mi disdonis ilin dum la vojaĝo; eble ne ĉiuj estos perditaj. De Parizo al Frankfurto mi semis ilin ĉien, sur la sofojn, sur la tablojn de la restoracivagono, en la koridoro. Miaj geamikoj, kiuj ankoraŭ rigardis Esperanton kiel apartan aferon, ne bone komprenis miajn klopodojn; ili tamen komparis mian okupon al fiŝkaptado, kaj interesiĝis al mia sporto. Efektive, ĝi estas kvazaŭ fiŝkaptado; oni ĝuas per ĝi diversajn emociojn pli malpli antaŭviditajn. Kaj nenio estas pli amuza ol la persono, kiu trovas ŝlosilon, eklegas ĝin, rigardas ĉiufanken kiel ŝtelisto, kaj fine ĝin enpoŝigas. Se li scius, se li scius ke li nur estas kaptita fiŝo, kaj ke la fiŝkaptisto volonte kiskus lian ŝtelintan manon! Nek unu solan fojon oni maltrafas; se tiu, kiu prenas la ŝlosilon, eklegas ĝin, sur lia mieno desegniĝas la surprizo, liaj okuloj malfermiĝas, lia lipoj ridetos, liaj poŝoj ricevos la broŝuron. Unu fojon, cent fojojn. Nun la ŝlosilo kuŝis sur sidilo, nun poste troviĝis ĉe fenestra kadro. Neniam mankas mano, surprizo, poŝo kaj ŝteliro.

En Frankfurto ĉe la stacidomo, Sinjoro Roth kun aro da samideanoj atendas nin. Ili ŝvingas flageton por la granda miro de l' pasantoj, kaj de miaj amikoj, kiu ne dubas ke mi aranĝis ŝercon,

ke tiuj *germanoj*, kiuj atendas nin, estas nur *ŝajne* germanoj, ke ili estas jam de longe amikoj miaj, kun kiuj mi parolas angle, aŭ tre certe, itale. Mi vane neas, kaj ekklopodas klarigi : el la aro unu mano leviĝas al mi, kaj post la mano aperas la ridetanta vizaĝo de nia samlandano S-ro Pi, la prezidinto de la grupo de Olot, kiu nun en Germanujo komercas per hispanaj fruktoj. Oni povas imagi mian ĝojon retrovi tiun amikon, kiun mi vidis unuafoje antaŭ tri jaroj en Olot, lernante gramatikon en izolita tablo de kazino. Oni povas ankaŭ imagi la rideton de miaj geamikoj *malkovrante* la artifikon de *nia* Esperanto!

Ni iras al la Basler Hof, hotelo esperantista, kie... neniŭ parolas Esperanton. La morgaŭan tagon ni iros al Esperanta firmo de tabako, kie ankaŭ neniŭ komprenos nin. Mi deklarus min venkita, se S-ro Fernkorn, barbiro ĉe la «Kaiser Wilhelm Passage» ne estus havinta la ideon lerni Esperanton. Tie miaj amikoj ne havas plu dubon, ĉar S-ro Fernkorn videble ne konis min ĉe nia eniro. Dum li servas miajn amikojn, ni interparoladas. Germana sinjoro, kiu atendas, atente aŭskultas nin. Mi donacas al li germanan ŝlosilon; li juĝas nin italoj, kaj nerigardinte ĝin, itale neas la *eblecon!* de Esperanto! Mi bedaŭris tiam ne troviĝi en la haŭto de nia kara D-ro Stromboli, tamen streĉinte miajn italajn kapablojn, mi superŝutis italan paroladon, kiu devigis lin konfesi ke... mi estas konvinkita, kaj kiu naskis ĉe li multenombrajn argumentojn kontraŭ! Kiam li finis, mi aldonis ankoraŭ kelkajn, la plej gravajn, kaj aldonis : «viajn, ĉi tiujn, kaj aliajn mi faris ankaŭ kiam oni unuafoje parolis al mi pri Esperanto. Nun, mi opinias min ridinda!» La sinjoro rigardis min, silentis... kaj promesis lerni. Miaj argumentoj kontraŭ Esperanto konvinkis lin, almenaŭ por lernado!! Kaptita kiel fiŝo!

Daŭros.

FRED. PUJULÀ



KORESPONDADO

S-ro J. T. *Barcelono*. Ne senpacienciĝu! La raporto aperos; ni havas amasegon da notoj pri festoj kaj ekskursoj, kiujn ni ankoraŭ ne povis ordigi. — S-ro C. Bicknell. *Bordighera*. Dankon por via gratulo; la preseraroj miopigis du el niaj redaktoroj : de tiam ili malamas ilin. Jen kial malmultaj eraroj enŝoviĝas : ili timas la malamon de l' redaktoroj.

Amo¹

SONETO, MEMORE DE KAPITANO SCOTT KAJ DE LIAJ KUNULOJ
KIUJ MORTIS REVENINTE DE LA SUDA POLUSO

DEVIZO : *Forta kiel Morto*

Ho! neĝo kaj glacio kie kuŝas
La korpoj de herooj! pro la varmo
De tiuj koroj, kiujn nun vi tuŝas,
Ĉu vi ne fluidiĝas kiel larmo?
Malmulte brilis la senforta flamo
El via suno, sed en ĉiu koro
Pli bela lumo daŭris : sankta amo
Kondukis ilin, ne dezir' por gloro.
Nek sole am' al devo aŭ patrujo
Sed ankaŭ am' al vi, al vi l' amiko,
Ne reĝ' kruela sur la blanka trono:
Almenaŭ nun ĉe tiu mortintujo
Pli dolĉa estu la venteg-muziko,
Kaj pli malpeza la neĝflora krono.

CLARENCE BICKNELL

La vojo al morto

LA nokto venas. Post la montoj la suno sin kaŝas kaj la malmultaj nubetoj vagantaj tra la ĉielo prenas la malpotencan ruĝecon de l' lastaj sunradioj de tiu tago. Eĉ la plej delikata venteto ne murmuretas.

En la eksteraĵo de malgranda vilaĝo, haltas maljuna almozulo kaj legas la jenon pentritan sur multjara muro. «Oni malpermesas almozpeti en tiu ĉi vilaĝo».

Leginte tion, la vizaĝo de l' almozulo iom transformiĝis kaj li malfacile eksidis sur ŝtono tie kuŝanta, fiksante la malforton de siaj okuloj, sur la pentritajn literojn.

Dum la ombroj de la nokto iom post iom alproksimiĝadas, venas

1. Premiita en la III^a Literatura Konkurso de K. E. F.

en la penson de la malfeliĉa viro la noktoj feliĉe pasigitaj de riĉuloj en grandaj diboĉoj kaj la nokto kiu venas sur lin, en momentoj kiam nek pecon da pano li havas en la malpuraj poŝoj de sia difektita vesto.

Kaj post tio ĉi, ankoraŭ venas en lian penson multego da aferoj kaj ideoj pri kiuj li neniam pensis, kiuj nun por li estas tiel strangaj ke li eĉ sentas emociion novan, kiu premas lian koron. La deziro kiun li sentas por plori estas tia, ke li perforte volas plori sed, tamen, tion li ne povas fari, kaj ĉio estas plendo en la vojo de morto, kiun li laŭiras.

Li plendas pri la morto de sia edzino, la adoratino de siaj revoj, kiu tre juna ankoraŭ, forlasis lin sola en la mondo, kie li suferas je multaj penaj laboroj kaj malfeliĉoj.

Ho! Lia edzino!... Ŝi estis malalta, de rondaj formoj kaj blanka, pli blanka ol bukedo da lilioj : kaj ĉiu movo de ŝia malgranda korpo estis gracia, dum el ŝiaj lipoj verŝiĝis ridadoj dolĉaj, kiel kantoj de gajaj birdetoj. Ho ve! Kial ŝi tiel juna mortis?...

En horoj de malkonsolo kaj plendo, ŝi estis de l' momentoj plej maldolĉaj dolĉigantino kaj en la nunaj momentoj ŝajnas ke, rememoro pri la bona enamita edzino dolĉigas por li iom la alproksimiĝantajn horojn de malsato.

* * *

Estas plena nokto.

La maljunulo kuŝas sur la herbo, dormante : la dolĉa rememoro pri la edzino kaj granda laco dormigis lin.

Kun la suno malaperis la nubetoj kaj la nokta ĉielo restis pura. Lin rigardadas la luno kun silento kaj ŝajnas ke ĝi kompatas lin per rigardado kvieta, malgaja kaj daŭra, tiel daŭra kiel la nokto.

Kaj li sub la ĉielo tiel bela estas en profunda dormado, dum kiu li revidas en sonĝo la adoratinon venantan de l' tombejo blanke vestitan, por montri al li plej dolĉan vojon al morto, ĉar li volas morti, li volas tien iri, kie ŝi estas en morta dormado, por ke ambaŭ koroj restu en morto proksime unu de alia.

Ŝi nun ne havas ja la gracion movon de sia korpo nek la ridon sur siaj lipoj ruĝaj iam, sed blankaj nun : nek ŝi parolas al li, kiam ŝi lin levas kaj prenas por konduki lin sur la vojon de plej bona morto. Li apogas sin per brakoj, sur ŝultro de sia edzino kaj ili ambaŭ marŝadas malrapide, sur longa kaj mallarĝa vojo en kies bordoj, flor-arboj de nigraj floroj kreskas. Lumigas la vojon tre stranga helo kaj ju pli ili iras antaŭen, des pli tiu helo perdiĝas.

Kaj ili laŭiris la vojon de morto ĝis la fino, kie la maljunulo falis en la profundan dormadon de l' morto apud la amata edzino jam falinta.

Jen la sonĝo de l' maljunulo.

Li dormas ankoraŭ sub la trankvila rigardo de la luno kaj morgaŭ li laŭiros en vivo kruelan vojon al morto sen la dolĉa apogo de sia edzino; la vojon de la vivo, sed kondukantan al morto.

Nur la rememoro pri ŝi estos lia konsolo.

MANUEL BORDAS



Deka Universala Kongreso de Esperanto

Ni ricevis de la Organiza Komitato de la X^a, la jenan leteron:

Parizo, la 1^{an} Decembro 1913

Kara Samideano:

Vi ricevos baldaŭ afiŝojn, kiujn ni petas vin glui videble en via kutima kunvenejo. Unu el ili estos arte ilustrita kaj pluajn ekzemplerojn vi povos aĉeti por elmontri en via urbo.

Ni altiras vian atenton pri tio, ke estas necese, ke ni sciu, kiel eble plej baldaŭ, kiom da samideanoj aliĝos al la Kongreso, por ke ni povu prepari manifestadon vere indan de la granda urbo en kiu ĝi okazos kaj de la disvastiĝo de Esperanto. — *Pro tio ni petas, ke vi bonvolu konigi kaj klarigi al viaj samgrupanoj la kondiĉojn de la aliĝo kaj insisti, por ke ili senprokraste aliĝu.*

Por instigi ilin fari tion, vi povos sciigi, ke ni jam de tri monatoj laboras, kaj ke kelkaj ĉefaj punktoj estas jam fiksitaj, nome:

Ni organizos, en la landlimaj urboj aŭ havenoj de Francujo kaj en la stacidomoj de Parizo, akcepteojn por helpi ĉiumaniere niajn nefrancajn samideanojn; ni speciale zorgos pri la loĝado en Parizo.

Niaj grandaj kunvenoj okazos en la *Gaumont-Palace*, belega halo, en kiu pli ol kvar mil personoj povas havi lokon; tie estos la Akceptejo kaj la diversaj oficejoj de la Sekretariejo.

La banko de la Kongreso estas la fame konata «*Société Générale*», kaj speciala provizora filio estos organizita en la Akceptejo.

La *Kongresa Gazeto*, kiu aperos de la 1^a de Januaro 1914, estos

ilustrita, kaj en ĝi troviĝos ĉiuj informoj pri la aranĝoj kaj festoj, pri la vivo en Parizo k. t. p.; ĝi ankaŭ publikigos la respondojn al ĉiuj neurgaj demandoj de la Kongresanoj.

Pri tiu gazeto bone rimarkigu al viaj samgrupanoj, ke ĝi ne estas abonebla; ĝi estos sendita senpage *nur* al la Kongresanoj (ili ricevos la numeron, kiu aperos tuj post ricevo de ilia aliĝo) kaj al la esperantistaj gazetoj. Tamen la Grupoj aŭ Societoj, kiuj estos donacintaj minimume 5 frankojn al la Kongreso Kaso ĝin ankaŭ ricevos.

Ni ne forgesas la festojn, sed pri tiu demando ni detale vin sciigos nur post kelke da tempo. Jam de nun ni povas tamen diri, ke ni organizos ekskurson al la fama urbo Versailles.

Senkulpigu nin, kara Samideano, pri la laboro, kiun ni petas de vi, sed ni kuraĝis tion fari, ĉar ni estas certaj, ke vi, kiel ni, deziras la sukceson de la Dekaj Kongreso.

Tre kore via,

La Organiza Komitato de la Dekaj

(Aldono de «Gazeto de la Dekaj Kongreso», numero de Januaro 1914)

Kelkaj samideanoj demandis la Organizan Komitaton de la Dekaj, kial ĝi ne sendas al la kongresanoj, kiuj aliĝos inter Januaro kaj Aŭgusto, la jam aperintajn numerojn de la *Kongreso Gazeto*. Nu, tute simple ĉar tio ne estas ebla. Por tion fari, ni devus scii, kiom da Esperantistoj partoprenos en la Dekaj Kongreso, kaj antaŭpresigi sufiĉan nombron da ekzempleroj de la *Kongreso Gazeto* — sed pri tio ni absolute ne povas havi ideon. Kaj se ni presigus nombron da ekzempleroj certe pli ol sufiĉa — ekzemple 10.000 — ni farus senutile gravan elspezon.

Aliflanke oni devas konsideri, ke la kongresanoj, kiuj aliĝas frue, tre faciligas la gravegan laboron de la Organiza Komitato. Estas do tute juste, ke ili ricevu ian kompenson — nome plenajn kaj freŝajn informojn pri la Dekaj.

Sed, ĉar por la samideanoj, kiuj loĝas en landoj malproksimaj de Eŭropo, la templimo unue fiksita por la aliĝoj, kiuj rajtigos al la ricevo de la Januara *Kongreso Gazeto*, estis eble iom nesufiĉa, la Organiza Komitato decidis, ke la Esperantistoj, kies aliĝon ĝi ricevos en Januaro 1914, ankaŭ ricevos la unuan numeron de la *Kongreso Gazeto*. Poste oni aplikos la antaŭe fiksitajn regulojn, t. e. ke la kongresanoj, kiuj aliĝos en Februaro ricevos la *Kongreso Gazeton* de Marto, Aprilo, k. t. p., tiuj, kiuj aliĝos en Marto ricevos la numerojn de Aprilo, Majo, k. t. p.

V^a Kongreso de la K. E. F.

FRUKTODONE laboras la Organiza Komitato de nia V^a : tion klare montras la listo de Eksterordinaraj temoj de la Floraj Ludoj, kie valoraj premioj estas proponitaj danke al la bona laboro de la organizantoj. Jen esperiga fakto, promesanta brilan sukceson por nia venonta jarfesto.

Krom aliaj amuzoj kaj festoj la Organiza Komitato preparas prezentadon de la verko de Molière «Georgo Dandin» esperantigita de D-ro Zamenhof, kaj estas ankaŭ en organizo granda balo, kiu kronos la kongresfestojn. La plano okazigi ĉe l' marbordo la Feston de la Floraj Ludoj, meritis laŭdon kaj aprobon de multaj kunfederacianoj, kiujn timigas, de post kiam ili ricevis la sciigon, la penso pri pluva vetero, dum la tagoj de l' Kongreso. Ili trankviliĝu : ĉe l' fino de Majo kutime la vetero estas bela, kaj ĉar nia deziro estas okazigi la Florajn Ludojn la nunan kongrestagon, se okaze pluvus, ni ĝin prokrastus ĝis la sekvanta tago, kiam *certe* la vetero ne estos tiel kruela devigi nin forlasi nian revon kaj *florbudi* sub plafono de teatro aŭ kazino.

En rondo de barcelonaj federacianoj naskiĝis la ideo veturi al Sant Feliu de Guixols per speciale frajtita ŝipo; la efektivigo de tiu ideo dependas de la nombro da ŝipoveturontoj, kiuj trovos agrabla tian vojaĝon. Oni sciigu sian opinion laŭ eble baldaŭ!

JOSEP GRAU

IV^a Literatura Konkurso de la Kataluna Esperantista Federacio

EKSTERORDINARAJ TEMOJ

- IV. — PREMIO de «Frateco» : 50 pesetoj (20 Sm.). TEMO : *Latŭvola*.
- V. — PREMIO de Iliaj Moŝtoj Sinjoroj Bonaventura Sabater, Miquel Matas, Vicens Folgado kaj Josep Irla, provincaj deputitoj : 100 pesetoj (Sm. 40). TEMO : *Utilo alportota de helpa internacia lingvo al la komerco*.
- VI. — PREMIO de «El Guixolense» : 50 pesetoj (20 Sm.). TEMO : *Influo de Esperanto en la komerca disvolviĝo de l' nacioj*.



Ĉe la listo de Eksterordinaraj temoj aperinta en nia lasta numero, bedaŭrinda komposteraro enŝteliĝis ĉe la II kaj III premioj: Konkursontoj volu noti, ke la Premio de «Ateneo Social» estas *Artaĵo*, kaj ke «Semo» premios la tradukon el la Ĉapitro VI de la verko «La Nacionalitat Catalana» per 25 pesetoj (10 Sm.).

Ankaŭ konkursontojn ni atentigas, ke laŭ la paragrafo XI de l' Regularo de la Konservantaro de Floraj Ludoj, la verkoj, kiuj estos premiitaj aŭ menciitaj, fariĝos propraĵo de la Konservantaro.



BIBLIOGRAFIO

EL PARNASO DE POPOLOJ. — POEMARO de Antoni Grabowski. — 1913.
Eldono de «Pola Esperantisto», Varsovio. Prezo, Sm. 1.000.

Ni formetu la ĉapelon. Poeto pasas. Kaj restas en nia koro per la impreso de siaj vortoj — en la lingvo per la vortoj de siaj impresoj. Majstro de la Esperanta parolo, Grabowski ludas per la rimoj kun tia facileco, ke traleginte la tutan verkon kaj retrovinte sur la tablo la amason de esperantaj propagandiloj, oni ne plu komprenas la kunekziston de tiuj du realaĵoj — la libro de Grabowski la blindeco de la homoj, kiuj ankoraŭ bezonas esti konvinkitaj pri nia lingvo, kaj por kiuj ankoraŭ oni ne povas kanti:

Tagiĝo, tagiĝo radias en rond'
La ombroj de nokto forkuras el mond'! —

Ĝenerale, kiam oni tralegas esperantistan verkon, oni estas inklina al rigardado de detaloj ĉar la tuto suferas ofte pro manko de intereso. Kun la verko de Grabowski okazas male: ĝi estas grava konstruaĵo kies esteco, kune kun la admirinda voloforto de l' aŭtoro kiu radiiĝas el ĝi, ne permesas konsideri la detalojn. Oni eĉ forgesas ke ĝi estas verkita en Esperanto, kaj oni vekigiĝas el ĝi al la doloro konstati ke ĝi ankaŭ estas nacia verko, verko el nia internacio, la sola kiu, eble pro tio ke ĝi estas malfermita al ĉiuj homoj, ne estas avidita de ili.

Oni sin demandas mirigite, kiamaniere la genio de sinjoro Grabowski agis por sklavigi al si la spiriton de la tridek lingvoj, el kiuj li transdonacas la poezian mielon en sia ora kaliko ĉizita per Esperantaj rimoj. Ni katalunoj speciale povas juĝi per la fragmento el

«Atlantido» de nia Verdager, ĉe kiu malprosperis la liro de niaj enlandaj poetoj mem.

Giganta cervo skuas la korn-branĉaron sian,
La birdojn logas ĝia alteco eminenta;
Timigas mastodonto gazelon la gracian,
Kaj mastodonton pelas mamuto korpulenta.

Tra tiu diafana punto el esperantaj vortoj, la ideoj originalaj neniel ŝanĝitaj revenas al ni kun sia pura senpeka nudeco kvazaŭ ili neniam estus forlasintaj la enlandan lulilon. Ni devas esti dankaj al S-ro Grabowski iel diris al mi S-ro G. Galcerán, kaj mi scias ke tiu deziro disvastiĝis kaj prenos formon en la proksima Kongreso de nia Federacio.

Al «Pola Esperantisto» kies sindonemo permesis al ni ĉiuj ĝui tian belan verkon, ni prezentas kun niaj aplaŭdo kaj gratulo, nian profundan dankemon.

FRED. PUJULÁ

LA KAMENA ANGULO. Familia dramo en du aktoj. H. T. Craven. El la angla lingvo tradukis *Gego* (Tradukinto de *Kara Panjo*). Paris. Presa Esperantista Societo. 33, rue Lacépède, 33. 1913. Prezo : Sm. 0'300.

La angla originalo estis ludata unufoje en 1861. Oni ne miros pro tio, ke ĝi estas malnovaĵo laŭ la karaktero de la personoj kaj konstruo de la intrigo. La dua akto nur estas ebla dank' al foresto de kadukulo Salomon, kaj la solvo nur al lia reveno kaj al reveno de lia memoro. Ĝi estas bone tradukita. Tamen en kelkaj frazoj la uso de *ĝi* anstataŭ *tio* iom malklarigas la ideon. Kelkaj esprimoj estas tute nekomprenablaj: «Dio benu vin, tio estis la aplombo de sinjoro Komizo». — «Neniuj pli da kvin spesdekaj klientoj ĉi tiun nokton» — «li donas kontentigon» — «doni al la knabo ian altigon» — «esti honesta, kiel la tago» — «Petro, jetante la pugnon sur la muron.» — «Dusemajno! Tuta dusemajno!» — «Kion mi havas, por kio vivi?» — k. t. p. Aliaj esprimoj estas dube korektaj, ekzemple pro uzado de *per* : «servi iun per glueto (?) anstataŭ melaso» — «aĉeti kvar botelojn per unu fojo — «manĝi per tripoj» — «preni multe per unu fojo» — k. t. p. Sed, ho ve! la tradukinto estis helpita de la Esperantista Literatura Asocio. Komprenoble.

Kurioza esprimo : *demamigi infanon*, laŭvorta traduko de nia *desmamar una criatura*.

Esperanta Universal - Biblioteko. Kolekto de Riga Stelo. Num. 4. LA MORTO DE IVANO ILJIĈ. Novelo de Grafo Leo Tolstoj. Tradukis A. Ŝarapova. Prezo: Sm. 0'25.

Ŝarapova! Ĝi estas unu el la unuaj nomoj de esperantisto, kiun mi aŭdis, kiam mi ankoraŭ ne sciis parkere la dek ses regulojn.

Bremón diris ĝin al mi. Kaj mi konservas por la Ŝarapova'aj verkoj profundan simpation, kiu certe puŝus min al partio se de la alia flanko mia recenzista devo ne kontraŭpuŝus kaj devigus min kontroli per tre severa lenso. Miajn laŭdojn mi silentos, kvankam laŭdado estas plej bona laboro por la spirito, ĉar mia konfesita simpatio malpli gravigus ilin, kaj mi pedante nur malaprobos, iel senkulpigita de la pedanta aprobo de aliaj.

Mi konfesas ke mi ne komprenas kion signifas *intonacio* (paĝo 8) — *sternaĵo de ĉerko* (p. 9) — *larĝe distarigi piedojn* (p. 9) (eĉ *distarigi* estus ne klara) — *sia talio tre ŝlanka* (p. 17) — *je la fino de l' unua robro* (p. 18) kaj *Petro Ivanyĉ sopiradis kaj atendis kiam ŝi elpurigos la nazon* (p. 16), kiuj troviĝas ĉe la komenco de l' verko. Mi estus lasinta flanken la verkon, se sur la kovrilo *Riga Stelo* ne estus espriminta «sian dankon al *Esperantista Literatura Asocio* en la persono de S-ino Mario Hankel (Prezidanto) (Dresdeno) & F-ino Wally Cuno (Königsbergo), kiuj afable bonvolis trarigardi kaj aprobi 5 lastajn ĉapitrojn de la tradukmanuskripto.»

Naive mi iris al la 5 lastaj ĉapitroj, kaj mi bedaŭras, ĉar tuj hazarde mi renkontis sur la paĝo 115 «*unu post alia aperis en sia animo diversaj okazintaĵoj*», kies aprobita *sia* ŝancelis miajn esperantistajn konvinkojn. Tamen tiu *sia* estas bone akompanata: «*li solece medius ĉiam pri la sama nesolviganta problemo* (p. 96) de *medius* kaj *solvigi* kaj de aliaj pli-malpli kuriozaj jenaj esprimoj: «*Ĉu vi ordonas da teo?* (p. 97) — *Pensis li kaj diris sole* (dufoje en p. 97) *Ne sole plori* (p. 110), *vidiĝis sole reno* (p. 114) *vivis sole per rememoroj* (p. 115) (kie nur ŝajnas multe pli ĝusta.) *Ĉu ili ne levigis tie?* (p. 97). *Ŝi forestis tie* (p. 102). *Ankoraŭ-nes* (eble *ne*, sed kial la streketo?) (p. 97).

Ĉu denove la morfinon por forgesiĝi (p. 100). *Nu-s, nun, ŝajnas. Nu-s, bonan tagon.* (p. 101) (kial -s?!). *Li sentas sin pli facile* (p. 108) *Forte eltranĉita veŝto* (p. 106). *Okazis disputado inter la patrino kaj la filino, kiu ĝin formetis kaj kien* (p. 107). k. t. p., k. t. p.

Mi nun komprenas kial S-ro Grabowski ne aprobegis de Esperantista Literatura Asocio sian «*Parnaso de Popoloj*».

TAMEN

ENLANDA MOVADO

Al començar les tasques d'aquest any el KATALUNA ESPERANTISTO recorda als presidents de grups, delegats de la K. E. F., organitzadors d'actes i festes de propaganda, que una de les seccions més importants dels periòdics orgues d'associacions esteses per tot un territori és aquella en la qual se dona compte del moviment, activitat, manifestacions i altres actes de vida de llurs membres; perquè de la mutua coneixença n'esdevé un més gran desenrotllament de l'actuació comú.

Com sigui que an els senyors redactors d'aquesta revista els és impossible assistir als nombrosos actes que se celebren en tots els indrets de Catalunya, i fins, si poguessin assistir-hi, no'ls fóra possible redactar les llurs informacions, cosa tant fàcil per als coneixedors de la localitat, que no corren el perill de caure en omissions o equivocacions de noms, fets, dates, etc.; la Redacció de KATALUNA ESPERANTISTO ha decidit crear un cos de corresponsals a totes les ciutats i viles de Catalunya. Dits corresponsals seràn els representants de la revista en tots els actes que's relacionin amb el nostre moviment. Per legitimar llur qualitat, el K. E. els enviarà un carnet degudament segellat.

Perquè dit cos de corresponsals sigui una escollida representació del K. E. en els actes locals, i de l'esperantisme local en les columnes de la revista, demanem a tots els presidents de grups de fóra de Barcelona que, d'acord amb llurs respectives Juntes, elegixin la persona que creguin més apta i convenient per a dit càrrec, per sa representació i per son coneixement de l'Esperanto.

Els secretaris dels grups són pregats d'enviar nota de la designació, per tot el mes de febrer, a l'adreça «Secretaria del KATALUNA ESPERANTISTO — Carme, 30, Barcelona», i de fer assaber també, en cas necessari, que no s'ha fet designació.

— Ĉiu membro de la *Kataluna Esperantista Federacio*, aŭ aboninto al KATALUNA ESPERANTISTO rajtos dufoje dum la jaro publikigi en la gazeto krom sia nomo kaj adreso 10 VORTOJN por peti korespondadon, interŝanĝojn de kolektaĵoj, informojn k. t. p. aŭ sciigi ŝanĝon de adreso.

Per 3 pessetes!... és a dir, per lo que costa un sol anunci d'aquesta classe en altres diaris, s'és membre de la K. E. F., s'és subscriptor de la revista i es té el dret de publicar-hi *dos* anuncis!

Els federats no s'han de limitar a usar aquests aventatges, sinó que han d'aprofitar-los per fer nous adherits. Els aventatges d'augmentar el nombre d'adherits els beneficiaràn tots en conjunt i per separat. Perquè els federats n'aprofitin ja tot seguit, el Comitè de la K. E. F., en sa darrera sessió, decidí lo següent:

Çiu federaciano, kiu aligos al la K. E. F. tri novajn membrojn por la jaro 1914, povos laŭ sia deziro elekti kiel premion de la *Kataluna Esperantista Federacio* unu el la jenaj:

- I. — Ne pagi la jaran kotizaĵon de 1914.
- II. — Pagi ĝin kaj senpage ricevi duan ekzempleron de KATALUNA ESPERANTISTO ĉiumonate, kiun la Adm. sendos al lia adreso aŭ al la adreso de la persono elektita de la membro.

A partir d'aquest any, el KATALUNA ESPERANTISTO publicarà el nom i l'adreça dels nous adherits, i els de les persones que'ls presenten o adhereixen.



Als senyors federats, als grupos, als delegats

GINC anys fa que la Federació fou fundada, i no'ns podem pas queixar : cada any ha estat un camí de triomf que marquen les fites dels Congressos de Sabadell, Tarragona, Terrassa, Olot, i que marcarà el Congrès d'enguany a Sant Feliu de Guíxols. Per llurs temes i per les quantitats ofertes, els premis sols, ne són ja una avant-prova. La nostra revista s'ha anat obrint pas de mica en mica; i avui no sols és la de més bella forma entre totes les que's publiquen, sinó que sos articles se veuen reproduïts, son estil alabat, aplaudida la puresa de son lèxic i de sa sintaxi, atès l'esperit que l'informa.

No'ns podem pas queixar : millor dit, no'ns podríem pas queixer si fóssim dels que creuen que'l progrés té un límit, i si no aspiréssim al màxim de perfecció. Les nostres propries alabances, que poden semblar immodestes, no són pas innecessaries : la passivitat de molts federats fa que no donin importancia a l'obra que ells mateixos integren, i que no's facin càrrec de l'obra colossal que hem arribat a establir a la nostra terra, corcada per l'individualisme de mala qualitat i on tota unió dels homes per a fins dessinteressats i nobles podia semblar impossible fins que n'hem donat la prova contraria amb la nostra Federació. Les nostres propries alabances van diri-

gides a desvetllar la convicció del propi valer, que'ns ha de donar noves forces per a la continuació, i a agrair a cada membre el seu esforç aportat, fins quan dit esforç no és altre que'l passiu del nombre. I, per altra banda, elles vénen compensades per les censures que'ns veiem obligats a dirigir-nos.

La nostra organització no és perfeta, i està molt lluny de ser-ho. No'ns sab greu el dir-ho : al contrari, gaire-bé n'estem orgullosos veient els magnífics resultats obtinguts malgrat l'imperfecció de la nostra organització; però no podem deixar de somniar en les coses que obtindríem si assolíssim la perfecció!

Purificades les llistes de la nostra Federació, havent-ne esborrat tots els membres corcats, tots aquells que no són dignes de formar part de cap organització, tots aquells que, a pesar de rebre la revista (el cost de la qual és equivalent al de la quota) durant dos anys, s'han negat a pagar el deute i ni s'han prè la molestia de salvar llur pròpia dignitat moral de ciutadans sociables i associables; allunyats tots aquells per als quals no hi ha censura possible, perquè no hi ha en ells esperança de millorament, sinó necessitat d'amputació, quedem els susceptibles de perfeccionar-nos, i podem retreure'ns els defectes per aportar-hi correcció.

Hem pecat : per massa passivitat. La Federació és un bé de tots : tots *la fem*, tots *hi podem fer*, tots *hi havem de fer*. Depositar la confiança en el grapat de persones que hi treballen és molt honorífic per a aquestes, però de pocs resultats pràctics. Per més bona voluntat que hi posin, les tres o quatre persones agents no poden pas donar cap a totes les tasques de la vida de l'organització i a totes aquelles que requereix el progrés que li desitgem. Cert que mil vegades pitjor que la passivitat és l'esperit d'iniciativa pretensiosa : més feina que la que s'ha de fer per substituir la dels que no'n fan, ha calgut per posar pegats als actes dels que dimiteixin càrrecs perquè no se'ls *deixa* fer un monument al Mestre en mig de la plaça de Catalunya, o no volem demanar als ministres que creïn el Ministeri de la llengua internacional, o no aprovem les ridícoles elucubracions de llurs hores de vaga i de llurs somnis de *popularitat!* Però al costat d'aquestes iniciatives malaltices hi ha les que desvetlla l'interès de tot home per l'organització de la qual forma part. Amb dos mesos de retràs ha sortit la nostra revista, i ni una sola queixa, ni una sola pregunta se'ns ha dirigit a propòsit d'això. És clar que això demostra una confiança il·limitada en el Comitè i en la Redacció; però és d'una fredor desencoratjadora. Potser ho fa el que no som poble de matïços; però entre la silenciosa conformitat i la censura agra i ofensiva hi ha la pregunta interessada i amistosa.

Si se'ns hagués preguntat, hauríem pogut dir clarament que si el número no sortia era que a l'impremta ens el retrassaven perquè *no teníem diners*, i que no teníem diners, *amb tot i tenir-ne*, perquè les quotes cobrades no havien arribat a l'Administració per *abandó de certs delegats*, per *passivitat de certs federats*, per *incomprensible peresa de certs grups en enviar les quantitats degudes per quotes i segells comprats*. Aquestes respostes, fetes a llur temps, haurien posat remei ràpid i haurien evitat l'haver-ne de parlar ara. Ara en

podem parlar, un cop passada la crisi i un cop tornat tot al seu lloc. Les despeses de correspondència esmerçades per arreglar les coses i desvetllar els toca-tardans, haurien, però, sigut més profitoses esmerçades en propaganda!

Sempre ha passat lo mateix, però altres anys els cabals de reserva de la K. E. F. cobrien temporalment la dessidia de molts. Enguany hem tocat les conseqüències d'aquesta dessidia, perquè aquells cabals han sigut destinats a pagar l'edició dels segells, que és el *primer* mal negoci fet per la Federació, car estem lluny d'aver-ne cobert les despeses.

Per evitar que's repeteixi lo succeït, aquest Comitè s'adreça als senyors federats, als grups i als delegats, i els prega:

Als delegats i als grups: Que tot seguit estableixin la llista dels federats, esborrant-ne els que no hagin de pagar, per evitar a l'Administració l'enviu de la revista i les despeses de l'impressió de llurs exemplars. Que'ns comuniquin dites llistes.

Als senyors federats: Que obliguin als delegats a cobrar llurs quotes i a donar-los el rebut. Que presentin als delegats queixes, protestes, proposicions, i tot allò que creguin necessari per a la bona marxa de la Federació.

A tots en general: Que amb tot i que trobin que'ls segells són horribles, de mal gust i innecessaris, ne comprin tants com puguin, per petites o grans quantitats; *que'ls inutilitzin*, sense esperar a enganxar-los en les lletres; que's facin el càrrec que paguen una contribució; i que entre tots procurem agotar l'edició per cobrir les despeses que va ocasionar. De 5 en 5 cèntims se poden fer grans obres. En reunions, en conferències, en converses, posant un segell a cada errada que's faci, es pot fàcilment contribuir a arreglar lo espatllat.

El Comitè ja ha decidit comprar-ne i estripar-ne una certa quantitat cada vegada que's reunirà. Que facin lo mateix les Juntes dels grups. (50 grups fan 50 Juntes: si es reuneixen un cop per mes i n'estripen, cada una, 50 cèntims, en dos mesos s'hauràn recaptat 50 pessetes!!) Que facin lo mateix els professors en els cursos: quin deixeble no donarà 5 cèntims per al bé de l'Esperanto?

No'ns deixem enviar tres o quatre cartes demanant-nos el pagament de la quota: les despeses de correspondència graven d'una manera gran el presupost de la K. E. F. La revista que's dona als federats costa ja les 3 pessetes de la quota! Paguem tots tot seguit, i obliguem als delegats dessidiosos que compleixin amb llur dever o que deixin el càrrec, que no manca qui ho faria de bon grat i bé.

En una paraula, considerem la Federació com a cosa nostra i aportem-hi tots el nostre esforç.

El Comitè de la K. E. F.

EL SECRETARI,

J. BORDAS

Societoj kaj Grupoj aliĝintaj al la «Kataluna Esperantista Federacio»

Badalona Stelo	Sant Pere, 86	Badalona
Barcelona Stelo	Marquès del Duero, 88.	Barcelona
Casino del Comercio	C. Sant Pere	Terrassa
Ĉiam Antaŭen	Poblet, 25	Barcelona
Ĉiam Antaŭen		Palamós
Escola Esperanta Lernejo	Sant Pere, 23	Sant Feliu de Guíxols
Esperanta Amikaro	P. Turers (Cafè del Comerç).	Banyoles
Esperanta Aŭroro	Laforja, 222	Barcelona
Esperanta Frateco	Wad-Ras, 218	»
Esperanta Idealo	Mossèn Cinto	Santa Coloma de Farnés
Esperanta Lernejo	Caimó, 145.	Sant Feliu de Guíxols
Esperanta Nesto	Sant Pere, 21	Barbarà del Vallès
Esperanta Racionala Grupo	Wad-Ras, 216	Barcelona
Esperanta Reflekto	Hospital	Santa Coloma de Farnés
Esperanta Semo	P. Pi i Margall, 14	Sabadell
Esperanta Stelo		Barcelona
Esperantista Amikeco	Pont, 38.	Manlleu
Esperantista Grupo	Rambra Mendizabal, 52	Mataró
Esperantista Junularo	Nort, 25	Terrassa
Esperanto kaj Patrujo	Sant Simplicí, 6, 2. ^o	Barcelona
Evolucio	Pons i Gallarza, 10	»
Fajro	Angels, 1, entr.	»
Frateco	Caimó, 32	Sant Feliu de Guíxols
Frateco	Cristina baixa, 50	Vendrell
Ĝeronprovinca Esperantista Ligo		Sant Feliu de Guíxols
Ĝerona Espero	Cambra de Comerç	Girona
Ilerda Espero		Lleida
Instituto por la disvastigado de l'esperanta gazetaro	Peu de la Creu, 10	Barcelona
Kampero		S ^{ta} Perpetua de la Moguda
Laboro Esperanta	Major, 44	Vilanova i Geltrú
Laboro kaj Kulturo	Pou, 2	Calafell
La Rondo	Aragó, 135	Barcelona
Libera Stelo	Joan I, 5 (Agrupació obrera)	»
Lumon	Nort, 25	Terrassa
Monta Grupeto		Sant Llorenç Savall
Montsanta Stelo	Carretera, 2	Ulldemolins
Nova Semo	Major, 15	Reus
Nova Harmonio	Nou, 74	Torelló
Olota Stelo	C. Hospici (Biblioteca pública)	Olot
Pacaj Batalantoj		Castellar del Vallès
Paco kaj Amo	Unió, 2	Palafrugell
Semo (Ateneo E. P.)	Carme, 30	Barcelona
Semo	Suypacha, 1022	Buenos Aires
Supren!	Muntaner, 6	Barcelona
Tarragono Esperanta	Sant Agustí, 4	Tarragona
Unió Catalanista	Comte del Asalto	Barcelona
Universala Frateco	Vulcano, 12	»
Verda Stelo	Apoteko	Flix
Vika Esperantistaro	P. Major, 26	Vich
Vojantaŭen	C. de Barcelona (Soc. La Alianza)	Mollet

Ni rekomendas la abonon al

LA ONDO DE ESPERANTO

MONATA ILUSTRATA REVUO

==== (Fondita en la jaro 1909) ====

Ĉiu abonanto de la j. 1914

krom 12 n-roj de l'gazeto, — ricevos donace belan
Esper. libron:

ESPERANTA POŝKALENDARO POR LA JARO 1915

«La Ondo» aperas akurate la 1-an daton, novstile. Ĉiu n-ro
havas 16 — 24 paĝ. Formato 17 × 26. Bela kovrilo

Literaturaj konkursoj kun premioj. Portretoj de konataj Esperantistoj. Diversaj ilustraĵoj. Beletristiko originala kaj tradukita. Plena kroniko. Bibliografio. Nia lanterno. Amuza fako (kun premioj). Anekdotaro. Korespondo tutmonda. (Poŝtk. ilustr.)

Anonco en «Koresp. Fako» — 3 respondkuponoj

La abonpagon (2 rubl. = 2, 120 sm.) oni sendu al librejo «*Esperanto*» (Moskvo, Lujanskij proezd, 3, Ruslando) aŭ al Administracio de K. E. F. — poŝtmandate, respondkupone, per permone, per bankĉekoj aŭ per transpag. de Esp. ĉekbanko

KATALUNA ESPERANTISTO

ĈIUMONATA □ OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

SEN PAGA POR LA ĜEFEDERACIANOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
12, strato Gracia. — **SABADELL**
KATALUNUJO

Redakciajn korespondatajn bonvolu
sendi al «Redakcia Sekretario : strato,
Carme, 30; Barcelono».

NIA DEVIZO : «MARO ESTAS GUTARO»

ENHAVO : *C'est Paris*, Jascinto Bremón. — *Avizoj*. — *Deka Universala Kongreso de Esperanto*. — *Bonhumora versaĵo*, Clarence Bicknell. — *V^a Kongreso de la K. E. F.*, Josep Grau. — *IV^a Literatura Konkurso de la K. E. F.* — *Oficiala Parto*. — *Enlanda Movado*. — *Bibliografio*, Tamen kaj K. E. — *Korespondado*.

C'est Paris

ANEKDOTOJ

TIU, kiu iafoje vizitis la grandan ĉefurbon de Francujo, nedubeble eltiris el ĝi la impresojn naskitajn de io eksterordinare bela. Sed, tiu kiu kiel mi, vizitis Parizon *unufoje* kune kun karavaneto de katalunoj el kiuj eĉ unu ne konis la urbon, tiu ricevos impreson ne de io eksterordinare bela, sed de io krom bela kaj tre agrabla, eksterordinare komplika.

La vesperon mem de nia alveno, ni devis, vole nevole, aĉeti biletojn por forveturi Belgujon la proksiman matenon. S-ro Urbez kaj mi, devis forlasi la hotelojn kie niaj kamaradoj, — ho feliĉaj homoj — sin lavis kaj purigis de la karbo de la vagonaroj.

Imagu du personojn, enirantaj en la vastega arancaĵo, longa

je kelkaj kilometroj, kaj kiun la parizanoj pro stranga humoraĵo nomas nur *metro* (!!). Sub la stacio de l'Odéon, ni envagoniĝis, pli bone ni deziris envagoniĝi, en la unua alveninta vagonaro. Ni maltrafis la unuan, kaj devis preni la duan, eble pro troa malrapideco nia, aŭ eble pro troa rapideco de la vagonaro. Cetere, la pariza metro, estas tre aristokrata...

Per 15 centimoj vi povos fari 24-horan vojaĝon en dua klaso (tria ne ekzistas), kaj trakuri la urbegon laŭ ĉiuj direktoj... sub la konstruaĵoj, kompreneble!

Ni promenis kune kun S-ro Bartomeu, laŭlonge de la Seine'a rivero, kiam la alteco de la Eiffel-turo altiris nian vizitemon. Kaj por ripozoj iom de nia laciĝo (ni estis promenintaj tri horojn sur *krura taxi'o*), ni sidigis sur la benkoj, kiuj kuŝas sub la arkoj vastaj, senlimoj de la turo...

En la alia flanko de la benko, en kiu ni ripozadis, sidis ankaŭ junulo, bruna, malalta, tre juna... Imagu mian surprizon, kiam la junulo eltiris la esperantan ruĝan broŝuron el sia poŝo, kaj komencis legi la libron.

Jen, mi diris al simpatia farmacisto; jen, samideano kiu sidas apud ni. S-ro Bartomeu, iom suspektema pri la esperantisteco de nia najbaro, kaj timante eble, ke la junulo preparis ruzon al provincanoj unuafoje vizitantaj Parizon, montriĝis tre singardema por alparoli nian kunsidanton. Sed, fine, ĉar la sciemo nia estis multa, kaj la *fido* al niaj poŝoj estis pli multa ankoraŭ, S-ro Bartomeu decidiĝis alparoli nian najbaron. Jen kia surprizo! La apuda sidanto estis *turko*, vera *turko*, tre bone parolanta Esperanton, kaj tiel sindonema, kaj malavara, ke eĉ li invitis nin fari promenadeton sur la ŝipetoj, kiuj laŭiradas la Seine.

Nia malkonfidemo kontrastis kun la sindonemo de tiu junulo, kiu unuafoje vidinte esperantistojn, invitis ilin promeni surŝipe, kaj *pagis* al ili la vojaĝkoston (ne multe, cetere, 20 centimoj).

Mia kara amiko S-ro Urbez rakontis al mi en Parizo la okazintaĵojn, al li kaj al S-ro Melons okazinta en la pinto de la turo Eiffel.

Oni ofte parolis pri la elmigriĝemo de la Katalunoj, kaj en nia lando, oni prave diras, ke en ĉiu monda urbo, kiun vi vizitos, vi trovos katalunojn.

Mi memoras pri tio, la rakonton de tiu sinjoro kiu tedita pro la ĉiea renkonto de katalunoj, kiujn li ne amis, vojaĝis al Norda Po-

luso, pensante ke tie inter skimaloj ne estos eble trovi iun katalunon. La rakonto diras ke li iris al polusa gastejo, kie li petis por manĝi supon el rizo, vermiĉelo, brasiko, k. t. p., kaj la skimala gastej-mastro diris en klara kataluna lingvo : «*I doncs digui que vol escudella, home!*» (nu, diru do, ke vi deziras escudella'n). (*Escudella*, estas nacia kataluna supo.) Nu, do, en la ekstrema pinto de la Turo Eiffel okazis al S-roj Urbez kaj Melons io, kio tre similas al la citita rakonto.

Inter la diversaj afiŝoj metitaj sur la vendejo de poŝtkartoj de la turo, «man spricht deutsch», «english spoken», «si parla italiano» estis ankaŭ «se habla español». Jen, diris S-ro Urbez al S-ro Melons (en kataluna lingvo), vi povas paroli kastile kun tiu ĉi ĉarma vendistino de poŝtkartoj. Kaj la vendistino respondis *klare kaj katalune* : «*I català també si vol*» (kaj katalune ankaŭ se vi deziras)...

Tableau!... La vendistino de poŝtkartoj de la Eiffel-turpinto, kiel la skimalo de la rakonto, estis ankaŭ *Kataluna*.

JASCINTO BREMÓN



AVIZOJ

Manko de loko malpermesas la publikigon de artikoloj : *Pri...* jam kompostita kaj *Tra Germanujo* (daŭrigo). Ili aperos en sekvontaj numeroj.

La barcelonaj federacioj estas petataj pagi al enspezisto zorganta pri la nunjaraj kotizoj de la K. E. F. la sumon de 3 pe-setoj, kontraŭ ricevo de la membrokarto kiel kvitanco. (Tiu pago povas ankaŭ esti farata al Sro. J. Rosals, Portaferriça, 30.)

La enspezisto vizitos en iliaj loĝejoj la federacianojn.

La Kongreso de K. E. F. en Olot prenis rezolucion rekomendi la K. E. F.-anojn pagi laŭvolan plialtigon de la regula kotizaĵo. Ni instigas ĉiujn sekvi la ekzemplon de kelkaj fervoraj kunfederacianoj, kiuj helpis nian organizaĵon per duobla kotizo. Ni publikigos la nomojn de la bonvolaj helpantoj.



Deka Universala Kongreso de Esperanto

Paris, 2 — 10 Aŭgusto 1914

LA «Kataluna Esperantista Federacio» dezirante helpi la Esperantistojn, kiuj deziras ĉeesti la Kongreson, kaj klopodante altiri al nia movado kaj al la grava manifestacio, kiu okazos en Parizo, petis al la «Ateneo Enciklopedia» de Barcelono, bonvolu organizi vojaĝon, kaj la Ateneo akceptis aranĝante ĝin kun la helpo de sinjoro P. Bastida, kiu tre afable zorgos pri la vojaĝantoj, ĝia loĝado, k. t. p.

— *Vojaĝo en 3^a klaso* de Barcelono al Parizo, kaj de Parizo al Portbou¹. — Loĝado en hotelo, tagmanĝo kaj vespermanĝo dum 7 tagoj. — Veturilo ĉe la alveno en Parizo, kun ĉiu trinkmono pagita: **127 frs.** (Por ĉiu plua tago de restado en Parizo : 6 frankojn.)

— *Vojaĝo en 2^a klaso* same kiel la alia (loĝado kaj manĝado ankaŭ 2^a-klasa), dum 7 tagoj : **180 frankoj.** (Por ĉiu plua tago de restado en Parizo : 10 frankojn.)

La vojaĝontoj, kiuj jam akiris la Kongreskarton, pagos nur 112 kaj 165 respektive. Ili devos montri la kongreskarton ĉe la aliĝo al la vojaĝo.

La iro al Parizo estos opa. Ĉiuj aliĝintoj al la vojaĝo devos vojaĝi kune, de la stacidomo de Barcelono la tagon 31^{an} de Julio je la 18'51.

La reveno de Parizo estas laŭvola. La biletoj valoras por 30 tagoj, kaj la aliĝintoj povos uzi la vagonaron, kiu estos al ili pli agrabla dum tiu templimo.

Por povi antaŭkalkuli la kvanton de vojaĝontoj, kaj prizorgi pri hoteloj kun proksimuma certeco, bonvolu sciigi pri ebla aliĝo per poŝtkarto al «Ateneu Enciclopèdic», strato Carme, 30; aŭ al S-ro Johano Rosals, strato Portaferrica, 30, Barcelono.

1. La bileto de Portbou al Barcelono kostas 3^a klasa : 11'75 ptojn; 2^a klasa : 18'35 ptojn.

Ĉar la reveno estas laŭvola kaj ne en antaŭdifinita tago, la Hisp. Kompanio rifuzis antaŭdoni la biletojn. La vojaĝintoj devos aĉeti mem ilin.

La prezoj, kiujn ni donas estas samaj se oni komencas la vojaĝon en Portbou. Niaj samideanoj hispanaj devas studi ĉu estas por ili pli konvena profiti hispanan rabaton ĝis Port-bou aŭ nur ĝis Barcelona, kiam ili venos ĉi tien por kuniĝi al la karavano.

Bonhumora versaĵo¹DEVIZO : *L'Arkeo*

La kreitaro en l'arkeo
 Pri «Amo» kundiskutis,
 Kaj fine ili Noe'n iris
 Kaj antaŭ li disputis.

«Mi naskos ovojn, tiam mortos»
 Murmuris papilio
 «Grandega estas mia amo
 Por raŭpo-familio».

Testudo blekis «Min kortuŝas
 Mallonga via dramo,
 Sed kvar aŭ kvin centjarojn daŭros
 Profunda mia amo».

Hirundo sekvis «Am' montriĝas
 Per agoj, ne per aĝo;
 Mi nestkonstruas post sufero
 Per longa flugvojaĝo.»

Ĝemetis sturgo el la akvo
 «Mi amas la homaron,
 Kaj, malgraŭ sang' malvarma, faras
 Por ili Kaviaron».

«Silentu», kriis raŭka voĉo
 De besto, «Granda amo
 Bezonas grandan koron, kiel
 Ĉe mi — hipopot-amo».

Do ĉiuj, unu post alia,
 Pro si mem fanfaronis,
 Ĝis Noe pri la am-disputo
 Decidon jenan donis.

«Vi ĉiuj amas, sed pli granda
 Estas la homa amo;
 Ĉar li am-*ad*-as, kaj, pro tio,
 Di' nomis lin *Ad-Amo*».

CLARENCE BICKNELL

1. Premiita en la III^a Literatura Konkurso de K. E. F.

V^a Kongreso de la K. E. F.

LA Urbeŝtraro de Sant Feliu de Guíxols decidis unuanime post malgranda diskutado subvencii al la Organiza Komitato de nia V^a Kongreso per la sumo de 500 pesetoj. Ni, en la nomo de ĉiuj federacianoj kaj de ĉiuj bonaj esperantistoj, esprimas tie ĉi la plej profundan koran dankon al la registaro de la progresema urbo, (kiu subtenas oficiale kurson de Esperanto kaj forte interesigas al ĝia sukceso) por la helpo, kiun ĝi donas per tiu subvencio al niaj kulturcelaj klopodoj. Kaj ni aldonas, por bone meti la aferojn en iliajn lokojn, nian energian proteston kontraŭ la ne adekvataj esprimoj de la urba konsilanto S-ro Gassiot, kiu per siaj senfundamentaj kaj maljustaj prijuĝoj pri la organizintoj de nia IV^a Kongreso kontraŭbatalis malprospere la subvencian decidon, intencante konvinki siajn kolegojn en la Urbeŝtraro per malpravaj argumentoj ĝenantaj por niaj samideanoj el *Olota Stelo*.

Plej elokventan komenton al liaj vortoj faras la unuanimeco, kun kiu la Urbkonsilantoj de Sant Feliu de Guixols aprobis la subvencion al nia Festo. Ni, do, silentas pretaj tamen reparoli pri tio, se niaj karaj amikoj, la organizintoj de nia laste okazinta Kongreso, tion opinius necesa por konstatiĝi unu pluan fojon la bonan taskon, kiun ili faris ĉiurilate en la organizo al ili konfidita.

La Provizora Programo de la Kongreso aperos sur nia venonta numero, per kiu ni ankaŭ detale raportos pri loĝejoj, vojaĝaj aranĝoj, k. t. p. En ĝi estos entenataj krom la festo de Floraj Ludoj kaj la bukedbalo jam anoncintaj¹ la solena alprenado de la nomo de nia Majstro por unu el la stratoj de la kongresa urbo, la okazigo de serio de popolaj dancoj kaj la prezentado de klasika greka festo, ankoraŭ en projekto. La ĉeestado en nia V^a fariĝos vere agrabla, ĉar al la loĝaĵoj, kiujn antaŭpromesas la planoj de la Organiza Komitato, aldoniĝas la ĉarma situacio de la urbo kaj la vojaĝo tra belaj regionoj nialandaj.

Ni aŭguras por nia Festo tiel brilantan sukceson, kiel tiujn de niaj pasintaj Kongresoj.

JOSEP GRAU



1. Vidu numeron de nunjara Januaro.

IV^a Literatura Konkurso de la Kataluna Esperantista Federacio

EKSTERORDINARAJ TEMOJ

- VII. — PREMIOJ de *La Revuo* : 1^a, 30 frankoj da libroj esperantaj; 2^a, 20 frankoj da libroj esperantaj, el la katalogo de Librejo Hachette et C.^{ie} TEMO : *Originale verkita biografia studo pri malnova aŭ moderna kataluna muzikverkisto.*
- VIII. — PREMIO de la *Kataluna Ligo de Katolikaj Esperantistoj*: Ankoraŭ ne difinita. TEMO : *Originala versaĵo al la Virgulino de la Espero*, Patronino de la katolikaj esperantistoj.
- IX. — PREMIO de S-ro E. Rey, provizora prezidanto de la K. E. F.: Arte verkita busto de D-ro Zamenhof. TEMO : *Laŭvola.*

La akcepto de verkoj, kies templimo estis fiksita por la tago 1^a de Majo, daŭros ĝis la 15^a de Majo nunjara.



Oficiala Parto

Laŭ peto de karaj kunfederacioj el Sabadell kaj Terrassa, urboj kie la pentekosta lundo (1^a de Junio) estas konsiderata labortago, la Organiza Komitato de nia V^a Kongreso, kun aprobo de la Komitato de K. E. F., decidis prokrasti la Kongreson ĝis la festotagoj 28^a kaj 29^a de Junio 1914^a.

— La Sekretario de la K. E. F. ricevis la 23^{an} de Februaro leteron de D-ro Coll, per kiu li insistas pri la akcepto de sia eksigo prezentita la 11^{an} de Januaro 1914^a.

Antaŭ la faktoj, ke en la 15^a de Junio 1913^a S-ro Rómulo S. Rocamora prezentis sian eksigon el la prezidanta ofico, kiun la Komitato akceptis; ke S-ro Joan Campdelacreu per dokumento datumita la 9^{an} de Januaro 1914^a ankaŭ eksigis el la rolo de subsekretario, eksigo kiu estis akceptita en kunsido la 11^{an} de Januaro 1914^a la sekretario kunvokis al kunveno S-rojn Horta kaj Rey, kiuj plenumas la oficojn de subsekretario kaj vickasisto.

La restantaj membroj de la Komitato deponis en manojn de S-ro Rey la prezidantecon de la Komitato de K. E. F. kaj ĉiuj kune plenaj de plej fervora entuziasmo daŭrigos konstante la laboradon por la prospero kaj sukceso de nia organizaĵo, konvinkitaj ke tiu entuziasmo nur estas malgranda reflektado de tiu de niaj kunfederacioj, kiuj per sia apogo kaj subteno helpas efike la laboron. — *Manuel Bordas, Sekretario.*

ENLANDA MOVADO

BARCELONO

La grupo *Esperanto kaj Patrujo* organizis balon, kiu estis sukceso. Oni dancis dum ĝi la esperantistan dancon La Rondo.

— La 21^{an} de Decembro la grupo *Fajro* organizis ekskurson al Rubí. Tiu ekskurso bone taŭgis por pligrandigi la amikecon kun la entuziasmaj samideanoj de tiu vilaĝo.

— En la sidejo de *Paco kaj Amo* la 31^{an} de Decembro, S-ro Berghänel faris paroladon pri la «Kristnaskaj germanaj moroj». La parolado estis tre interesa kaj la parolinto tre gratulita.

— S-ro Josep Grau faris la 27^{an} de Novembro paroladon en la *Esperanta Racionala Grupo* pri «Esperanto, sintesi idiomatika». La multenombra ĉeestantaro aplaudis la parolinton.

— La grupo *Libera Stelo* translokigis sian sidejon al la strato Muntanya, 62, 2, kaj malfermis du kursojn, unu elementa klarigata de S-ro M. Perich kaj la alia supera sub la direkto de S-ro A. Melis.

La sama grupo organizis ekskurson al la ĝardenoj de la Labirinto, kiu tre bone sukcesis.

— La 28^{an} de Decembro 1913^a en «Escuela Dominical del Camp d'en Grassot» okazis propaganda festo bone organizita de la socio *Paco kaj Amo*.

En la salono de lernejo transformita en bela ekspoziciejo de ĉiaj esperantaĵoj, parolis antaŭ multenombra personaro S-roj Serrat, Rocamora, Grau kaj Conrad. La unuaj parolis pri la utilo de Esperanto kaj pri ĝia konstanta disvastiĝo kaj stimulis la aŭskultantojn per prezentado de faktoj al la lernado de nia lingvo. S-ro Grau simile diris kaj poste parolis esperante al la ĉeestantaj samideanoj, kuraĝigante ilin por efika laboro. S-ro Conrad, globtrotisto esperantisto, salutis kaj dankis la barcelonajn samideanojn, de kiuj li ricevis bonegan helpon. La neanstataŭebla fotografisto samideano Mayol enkamerigis bildon, kaj finiĝis la festo, kiu estis fruktoporta : la kurso, kiun per ĝi oni malfermis, estas multe vizitata.

BARBARÀ DEL VALLÈS

La 21^{an} de Decembro okazis grava religia festo por solenigi la decidon de Internacia Katolika Kongreso en Roma alpreni la Virgulinon de l'Espero kiel Patroninon de la katolikaj esperantistoj. Matene je la 10^a okazis solena meso por la eterna ripozo de P-tro Richardson; diservis P-tro J. Planas kaj predikis D-ro J. Coll, P-tro. Post la meso okazis procesio kaj ĝin fininte oni ludis popolajn dancojn en la placo.

Tagmeze okazis la oficiala festeno en Sabadell kaj vespere ankaŭ en tiu urbo okazis interesplena propaganda festo en kiu partoprenis la *K. L. de K. E.*, *Katolika Stelo* kaj *Esperanta Nesto* organizintoj de la festo.

OLOT

Per ĝenerala kunsido okazinta la 11^{an} de ĉi tiu monato, «Olota Stelo» aklame elektis sian estraron jene : *Prezidanto*, S-ro Josep M.^a Garganta; *Vicprezidanto*, F-ino María Escubós; *Sekretario*, Sinjoro Manuel Prat; *Vicsekretario*, F-ino Rosita Llosas; *Kasisto*, F-ino Concepció Vayreda; *Bibliotekisto*, S-ro Candi Agustí; *Membroj*, S-roj Urcisino Gutiérrez kaj Josep Boix.

REUS

La 17^{an} Januaro okazis la ordinara ĝenerala kunveno de *Nova Semo*. Unuanime oni aprobis ĝiajn taskojn kaj estis elektita la jena Komitato : *Prezidanto*, S-ro Enric Aguadé i Parés; *Vicprezidanto*, S-ro Nil Alsina; *Kasisto*, S-ro Francesc Simó; 1.^a *Voĉdonanto*, F-ino Teresa Barrufet i Puig; 2.^a *Voĉdonanto*, F-ino Jozefino Felip; *Bibliotekisto*, S-ro Joan Martorell; *Vicbibliotekisto*, F-ino Teresa Estela; *Sekretario*, S-ro Joaquim García; *Konsilantoj*, S-roj Antono Clivillés kaj P. Aguadé Montserrat.

— La 11^{an} Januaro kunvenis ĉe la «Centre de Lectura» la Deleĝitoj de : *Nova Semo*, Reus, S-ro Enric Aguadé i Parés; de *Tarragono Esperanta*, S-ro Inocenci Viñas; de *Nova Tarragono*, *Groĝ Esperantista* de Querol kaj *Groĝ Esperantista* de Valldosera, Sinjoro Joan Molas Sabaté; de *Groĝ Esperantista* de Tortosa, S-ro Tomàs Martí; de *Montsanta Stelo*, Ulldemolins, S-ro Joaquim García; de *Esperanta Grupo Socialisto*, Reus, S-ro Ramón Pujol; de *Groĝ Esperantista* de Riudecanyes, F-ino Teresa Estela Bru-

net; de *Frateco*, Vendrell kaj *Laboro kaj Kulturo*, Calafell, S-ro Joan Martorell; de *Frateca Kunigo*, Reus, S-ro Josep Huguet; de *Verda Stelo*, Flix, kaj *Groĝ Esperantista* de Falset, S-ro F. Simó Rom; de *Groĝ Esperantista* de Cambrils, F-ino Josepa Anguera; de *Tura Esperantistaro* Torredenbarra, kaj *Groĝ Esperantista* de Amposta, S-ro Fulgenci Agustí, kiuj aprobis la Regularon de la «Esperanta Tarragon-Provinca Ligo»; elektis la urbon Falset por gastigi la I^a Kongreson de la E. T.-P. L., kaj nomis la jenan Komitaton, por regi la Ligon ĝis la I^a Kongreso: *Prezidanto*, S-ro P. Aguadé Montserrat; *Vicprezidanto*, S-ro Jozefo M. Dalmau (Paroĥestro el Falset); *Konsulo*, S-ro Enric Aguadé i Parés; *Konsulino*, F-ino Teresa Estela; *Konsilanto*, S-ro Joan Molas Sabaté; *Sekretario-Kasisto*, Francesc Simó.

3^a artikolo de la Regularo estas: La E. T.-P. L. decidis aliĝi al la K. E. F. (Organo oficiala de la Ligo estos K. E., organo de Kataluna Esperantista Federacio.) — *E. Aguadé.*

SANTA COLOMA DE FARNÉS

La grupo *Esperanta Idealo* rekomencis siajn taskojn malfermante la kursojn gvidatajn de la senlaca samideano S-ro P. Costa, profesoro de K. E. F. Oni organizas literaturan feston por la disvastiĝo de Esperanto en la urbo.

SANT FELIU DE GUÍXOLS

La grupo *Frateco* faris kunvenon por elekti la anojn, kiuj devas formi la Komitato de «Ĝ. E. L.», kiu restas jena: *Prezidanto*, S-ro Federiko Verrié; *Vicprezidanto*, S-ro Joakimo Casanovas; *Sekretario*, S-ro Mikaelo Payet; *Kasisto*, S-ro Rosendo Reixach; *Konsilisto*, S-ro Johano Caritj.

TARRAGONO

¹ En la ĝenerala kunveno de *Tarragono Esperanta* oni decidis ne aliĝi al la pretendanta esti «Esperanta Tarragon-Provinca Ligo» ĉar ĝi estas neleĝe starigita, tial ke en la kunveno kiu okazis

1. Tiu ĉi sciigo ne akordiĝas al tiu de S-ro E. Aguadé (Reus), kiun ni aliloke publikigas. Pri ili ni lasas la respondecon al respektivaj aŭtoroj, ĉar *Kataluna Esperantisto* estas plene senpartia.

la 11^{an} de Januaro en Reus, oni reprezentis grupojn kiuj ne ekzistas, kion ni poste povis konstati. — *D. Obiol.*

— «T. E.» solenigis la datrevenon de la naskiĝtago de D-ro Zamenhof per festo okazinta en la salono de la «Unión Agrícola» en kiu partoprenis S-roj Ferreté, Roig, F-ino F. Muntané, S-ro Alegret, F-noj Navarro, F. kaj D. Sentis, S-ro Llabería, F-ino P. Muntané, S-ro Vidal, F-ino Balart kaj S-ro Agustí. Poste okazis la inaŭguracio de la teatra fako, prezentante spritan komedion ludatan de F-ino Martí kaj S-roj Huecas, Obiol, Vidal kaj Multó kiuj estis multe aplaŭdataj. En tiu festo oni dancis La Rondo kaj disdonis multajn flugfoliojn.

— La nova Komitato de la grupo estis elektita jene : *Prezidanto*, S-ro Fulgenci Agustí; *Vicprezidanto*, S-ro Daniel Roig; *Sekretario*, S-ro Pau Huecas; *Vicsekretario*, S-ro Artur Alonso; *Kasisto*, S-ro Domènec Obiol; *Kalkulisto*, S-ro Marián Alegret; *Voĉdonantinoj*, F-inoj Teresa Balart, Francisca J. Muntané kaj Dolors Navarro. — *Ekskursa Fakoj* : *Prezidanto*, S-ro Tomàs Martí; *Vicprezidanto*, S-ro Josep Vidal; *Sekretario*, S-ro Manuel Dentri. — *Propaganda Fakoj* : S-roj J. Vidal, D. Roig, J. Rabadà, D. Obiols; *Gvidanto de kursoj* : S-ro Josep Vidal Ros. — *Konsulino de T. E.* en Sant Feliu de Guíxols : F-ino Isabel Masmitjà. *Konsulo de T. E.* en Tortosa : S-ro Josep Argilaga.

La tarragonaj federacianoj kunvenis renovigante sian aliĝon al la K. E. F. kaj elektante S-ron D. Obiol kiel delegiton kun aprobo kaj danko. — *Vidal.*

— *Tarragono Esperanta* aranĝas solenan kaj gravan propagandan ekspozicion de poŝtkartoj, broŝuroj, libroj, gazetoj kaj esperantaĵoj, je la festoj kiuj okazos en Tarragono la tagojn 8-13 de la venonta Aprilo.

Ni petas ĉiujn esperantistojn bonvolu sendi al ni ĉiajn esperantaĵojn, gazetojn, k. t. p. por montri la gravan disvastiĝadon de Esperanto tra la tuta mondo.

Oni adresu al S-ro Sekretario de *Tarragono Esperanta*, Sant Agustí, 4; Tarragono.

VENDRELL

La ĉi tiea esperantista grupo *Frateco* elektis sian novan Komitaton por la estonta jaro, kiu konsistas el la jenaj sinjoroj : *Prezidanto*, Johano Martorell; *Sekretario*, S. Esvertit; *Kasisto*, Francesc Guitart; *Bibliotekisto*, Ricard Batlle.

Samtempe malfermis novan kurson, en kiu ĉeestas multaj lernantoj.

VENTALLÓ

Kelkaj entuziasmuloj el tiu vilaĝo kunvenis sub la prezido de P-tro Plana por starigi novan grupon. La celo estas jam realigita kaj K. E. F. havas en siaj vicoj la grupon *Flugila Penso*. Ĝia komitato estas la jena : *Prezidanto*, Paŭlo Plana, paroĥestro; *Sekretario*, S-ro Benedikto Clotas; *Vicsekretario*, F-no Agneta Guillem; *Kasisto*, S-ro Georgo Baqué; *Voĉdonantoj*, S-roj Jakobo Ribas kaj Jozefo Carbó. Al la nova grupo nian varman saluton.



BIBLIOGRAFIO

PATRECO. Kvarakta socia dramo. M. Wolf. Esperantigita de M. kaj J. Wolf, sub afabla kontrolo de S-roj Ch. Rosen, D-ro H. Brandt, G. Stroele kaj Fraŭlino Ch. Pulvers. — 1913. Hachette et C.^{ie} Parizo. Prezo. Fr. 1'25. Sm. o'50.

Teatrajn verkojn oni devas juĝi sur la scenejo. Tiu ĉi estas kaŝejo de la plej grandaj surprizoj, ĉar sukceso de la prezentado dependas de la kombino rezultanta el verko kaj publiko, kiu lasta tute ne ĉeestas dum legado. Sekve, pri la teatraj kvalitoj de la verko ni tute ne parolos; juĝis jam ilin tiuj, kiuj havis la plezuron ĉeesti la Kongreson en Berno. Do, se la verko estas kvankam socia malnovastila, iel melodrama kaj ne respektas unuecon de tempo kaj de loko, ni retenos nian opinion. Tiaj klasikaĵoj, aliflanke, ne ĉiam estas rekomendindaj. Se sur la scenejo ĝi estis miriga, kaj plenumis sian celon, tio ja sufiĉas.

Tamen, ni devas fari kelkajn konsiderojn pri la tezo. La antaŭvorto de la aŭtoro rajtigas nin. Li celas indignigi nin kontraŭ malnobleco de viro forlasinta gravedan fraŭlinon kaj kontraŭ tiuj, kiuj alkondukas junulojn al tiu malnobla ago. Ni devas konfesi, ke la verko ne konvinkis nin.

Al ĝi ni povus kontraŭmeti verkon pri virino, kiu forlasas viron kaj infanojn : el la komparo rezultus, ke la dramo ne estas morala, sed ekonomia. Ni imagu ekzemple ke la fraŭlino estas milionulino

kiu kaprice altiris al si laboriston kaj poste malgraŭ rezultinta infano, ne volas edziniĝi. Ĝi eĉ cedas la infanon kun provizo de mono. Kiel aspektos la proletario postulanta edziĝon? Eĉ kiam li postulos en la plej alta nomo de patreco?

Tiuj plebaj verkoj eĉ kiuj malriĉuloj estas ĉiam honestaj, kaj riĉuloj estas ĉiam kanajloj, konsistigas la plej malbonajn kaj malutilajn barilojn al la progreso de la moralaj sentoj, kiuj devas alporti solvon al sociaj malfeliĉoj. Tiuj subkaŝaj laŭdoj al malriĉeco estas erarigaj. Ne nur riĉuloj estas malbonegaj, sed malriĉuloj ankaŭ, — kaj ne pro tio ke ili estas riĉaj aŭ malriĉaj, sed pro tio ke ili estas homoj. Riĉeco estas fonto de sano korpa kaj spirita, ilo por instrui sin, por mastriĝi la naturon kaj ĝiajn fortojn. Se ni malriĉaj homoj estas tiel nepre honestaj, kaj se riĉeco estas tia fonto de malvirtoj, ni morale ne rajtos klopodi plibonigojn de la malriĉula ekonomia situacio. Jen al kiu sento kondukas la pentrado de tiuj karakteroj de protagonistoj devigitaj servi plej ofte seninteresan tezon. Ĝi estas teorio, kiun bone subtenus Constant Bélaire la senkora fabrikisto.

La unua impresio, kiun oni ricevas de la dramo, estas ke Ernest Bélaire, la deloginta junulo, eĉ kiam li estus forlasinta vole amatinon kaj filon, estas plej prava viro. Jen lia patro, mensogas al li, trompas liajn plej noblajn sentojn, kalumnias lian amatinon, malhelpas al lia amo. Jen la patro de Lucio forpelas sin de la hejmo kiam ŝi pli bezonas helpon, kiam ŝi kunportas en la ventro nepon lian! Oni rajtas sin demandi, kia diabla afero estas patreco, kiu puŝas la homojn al tia kanajla agado, kaj sekve oni nur povas aplaŭdi al Ernesto kiu forkuras tian estontan eblan situacion. «Iru, kun Dio mia filo, mi estas tro nobla, mi ne volas esti patro!», — li povus ja diri.

Sinjoro Bélaire patro donas monon por kompensi la agon de sia filo, kaj kompreneble la patro de Lucio, kiu ĵus rifuzis doni helpon al sia filino, nun en nomo de moralo, rifuzas «manĝi tian pannon». Kompreneble, oni aplaŭdas. Sed ni kalkulu la monon. Kiom li donas? Unu spesmilon? Kanajlego! Ofendo sur ofendo! — Mil spesmilojn? Kanajlo! Cent mil? — Tiu homo certe estas priokupita bedaŭrinde! — Unu milionon? Ni pripensu! Eble, eble li estas prava... Unu milionon, oni ja akceptas, almenaŭ malantaŭ la publiko... Ekonomia demando!

Ekonomia demando tre facile solvebla, sen vundo al kies ajn indeco: Ernesto edziĝas, tuj eksedziĝas kaj lasas pension al patrino kaj filo. Mi ne komprenas do la neceson fari revolucian verkon por

submeti homan liberecon al leĝa proceduro. Ĉar Ernesto ja rajtas ne plu ami sian amatinon, li ja rajtas eksedziĝi (li eĉ devas, se li ne amas), li ja rajtas doni pension (li estu trankvila, la amatino tiam ĝin postulus per advokato!). Do, la proceduro nur estas malsama.

La lingvo, bona. Eble la nuancon de kelkaj esprimoj («fermu la buŝegon!» «Vian buŝon! bubo» *ta bouche, bébé?*) nefrancoj ne komprenos. Des pli bone.

EN LA LANDO DE LA BLANKA MONTO. Léon Huot-Sordot. El la franca lingvo tradukis D-ro Noel : Kolekto de «Lingvo Internacia». Paris, 1913. Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède.

Ĝenerale mi private ne ŝatas priskribojn pri vojaĝoj, kiuj interesas nur la vojaĝinton, kaj kiuj krom la nomo de la priskribitaj lokoj, similas unu al alia kiel ovo — ovon. Mi preferas Baedeker'on. Tamen, mi konfesas ke la priskribo de Huot-Sordot estas sufiĉe bona, kaj leginda precipe pro la bona traduko de D-ro Noel, kiu per flua eleganta stilo ebligas al la leganto ĝui la flekseblecon kaj riĉecon de nia lingvo.

Okazas al mi, kiam mi legas Esperantan verkon, ke mi tute forgesas la ekziston de aliaj lingvoj. — afero ne tre stranga, ĉar krom kelkaj vortoj, kiuj enmigris ĉe nin, mi konas nur mian propran kaj Esperanton. Se katalune oni parolas al mi pri *soirée*, mi komprenos; se oni parolas pri *matinée* vi tiam jam devos perforti mian cerbon por ne kompreni, ke la afero okazas matene. Sed kiam en Esperanto mi renkontas fremdajn vortojn — plie laŭvorte tradukitajn — tiam mi nenion komprenas kaj la klopodo doloras min. Tiel okazis al mi kun la frazo *kap-al-kapo kun la granda Naturo*, (p. 28), kiun eĉ francoj mem ne povas kompreni se ili pensas en Esperanto.

Kurioza esprimo troviĝas en la paĝo 20^a. «Du muloj paŝas proksime de mi, paro da Geparis'anoj balanciĝas sur iliaj dorsoj, laŭ la kadenca paŝado de la portilbestoj. Tiuj ĉi estas juna virino...» *Tiuj ĉi estas la portilbestoj!* Aliflanke, *tiuj ĉi* postulas post virino, la vorton *kaj* kaj klarigon pri la alia membro de la paro, kiuj ne troviĝas en la frazo. — Kial *Geparis'anoj*, kun ĉefa G kaj apostrofo. Aŭ *Geparisanoj*, aŭ *Geparizanoj* aŭ *ge' Paris'anoj*. — La interpunkcio estas libera laŭ klarigo de la Majstro; tamen oni trouzas tiun liberecon kaj nun en multaj verkoj kaj Bultenoj oni nur apartigas per komo apartajn propoziciojn, kiuj postulas punkton inter si. Ekzemple: «Du muloj paŝas proksime de mi, paro da Geparis'anoj...». La klareco multe malgajnas, kaj la logikeco ankaŭ.

«Tiu ĉi fumo, kiu malplaĉas al vi, ĝi plaĉas al mi...» (p. 22) ĝi malmankas.

«Manko da tempo» (p. 41) kial da?! Tempo mankas, mi kuras; kuro de homo, manko de tempo.

«Internacia konkurso pri la tempolongoceco, rapideco kaj facilmoveco». Por ŝajnas multe pli bona.

«Provo de alpinista terminaro» de S-ro A. Jaquillard, troviĝas ĉe la fino de l'libro. Ĝi konsistas el 21 vortoj : kelkaj el ili bone trafitaĵoj, aliaj tre diskutablaj.

TAMEN

CURS PRACTIC DE LA LLENGUA ESPERANTO, amb les regles gramaticals, exercicis en Esperanto i en Català, i Vocabulari Català-Esperanto contenint prop de 800 mots. Segona edició, corregida i augmentada. *Frederic Pujulà*. — Biblioteca Popular de «L'Avenç», num. 134. Barcelona. Prezo, 50 cèntims (Sm. 0'200). Ĉe la librefo «L'Avenç», Rambla de Catalunya, 24, Barcelona, kaj ĉe ĉiu reprezentanto.

Ni ne rajtas paroli pri la verko mem de nia direktoro. Cetere ĝi estis juĝita, kiam antaŭ 5 jaroj la unua eldono aperis. Sed ni devas diri ion pri la libroj en kiuj la verko publikigis por sia granda honoro. La unua eldono aperis en la Biblioteko de la revuo «Joventut» kie S-ro Pujulà komencis la intensan propagandon de Esperanto en nia lando. Tiu Biblioteko pure literatura, tiu grava Biblioteko kiu diskonigis fremdajn ĉefverkojn, kaj naciajn verkistojn, kiuj tuj fariĝis klasikaj, surprizis la publikon diskonigante per la verkoj de nia direktoro, lingvon kiu krom *utopia* ŝajne kontraŭstaris la disvolvigon de la nacia por kiu la Biblioteko kaj la revuo mem laboris.

La fakto ke kataluna revuo ĝin apogis kaj helpis per sia Biblioteko kontribuis ne malmulte al la disvastiĝo de Esperanto en nia lando. La Asocio de katalunaj societoj, unuanime, en ĝenerala kunsido, rekomendis la lingvon al siaj gazetoj kaj membroj. La eldono elĉerpiĝis en du monatoj, malgraŭ ĝia alta prezo, trudita de la materiala kosto de la libro. Fininte sian antaŭdifinitan celon, «Joventut» kaj ĝia Biblioteko adiaŭis siajn legantojn, kaj la verko ne reldoniĝis.

Nur, dank' al entuziasmo, por nia afero, de sinjoroj Casas-Carbó kaj Massó-Torrents, gravaj katalunaj verkistoj kaj posedantoj de la grava eldonejo «L'Avenç» kies influo en la kataluna literatura movado estas de ĉiu konita, la «Curs Pràctic» de S-ro Pujulà trovis

honoran lokon en la «Biblioteca Popular» apud 133 pure literaturaj ĉefverkoj. Tiu escepto estas grava venko de nia movado, kaj ni neniel estos sufiĉe dankaj al la helpo de niaj eminentaj samideanoj, kiuj jam de longe estas gajnitaj al nia afero. Efektive, antaŭ ses jaroj S-ro Casas vojaĝis tra Dresdeno, kaj estis kortuŝita de kataluna flago kiu pendis ĉe l' facado de hotelo. Ĝi estis la flago de S-ro Pujulà, kaj ĝin alkroĉis... S-ro Bourlet mem! Li demandis, oni informis lin pri Kongreso de Esperanto. Pro la flago, simpatie, esperante renkonti samlandanon, scivoleme al Esperanto, li ĉeestis la gravan prezentadon de Ifigenio... Lia edzino estis la unua kiu aplaŭde salutis per poŝtuketo, kiel kutime ĉe ni... Efiko de Kongresoj! Se la 4^a nur varbis lin, kiom da centoj li varbos per la eldono!

La libro kostas nur 50 centimojn. Eĉ se la tuta eldono vendiĝos, ĝi donos nenium monan profiton. Oni faras libristan rabaton al la grupoj, ĉar nek aŭtoro nek eldonistoj eltiros profiton de ĝi. Ni insiste rekomendas ĝin por kuraĝigi la firmon al novaj malavaraj helpoj, kaj ni estos tre dankaj al afablaj alilandaj samideanoj, kiuj helpos nin sendante gratulon al la eldonistoj (strato Rambla de Catalunya, 24. Barcelona).

La verko estas oficiala en la kurso de D-ro Pastro J. Coll ĉe la Universitato de Barcelono. Ĝi estas la *unua!!* kataluna verko studata en nia alta lernejo! — K. E.



KORESPONDADO

Esperanto Unuiĝo, Capodistria. Ni ne povas enpresigi viajn sciigojn. Domaĝe.— Redakcio de *La Vagabondo*. Ni notis pri via adresŝanĝo. — S-ro D. O., Tarragono. Aperas, kun la ŝanĝo. — Sinjoro J. C., Vic. Ni notis la adresŝanĝon. La raporto aperos iom mallongigita. Ni dankos la tujan elekton de korespondanto. — S-ro J. R. Mallorca. Ni rimarkis ĉe la traduko du aŭ tri ŝanĝetojn, kiuj supozigis, ke ĝi ne estas simple kopio. K. E. permesas kopion de siaj artikoloj, kondiĉe ke ili aperu kun noto pri sia deveno. Ni dankas por afabla kaj tuja respondo. Vian kotizaĵon ni ricevis. — *Nova Semo, Tarragono Esperanta*. Dankon por via akurateco. — *Centro Esperantista de Buenos Aires*. Ni faris koncernen noton. P-tro P. P., Ventalló. — Ĉu vi ne povus ŝanĝi la pseŭdonimon? Tiu, kiun vi elektis, estas jam de longe uzata de redaktoro de K. E.

KATALUNA ESPERANTISTO

ĈIUMONATA OFICIALA ORGANO

DE LA



JARO V^a : MARTO 1914

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO DE «KATALUNA ESPERANTISTO»

<i>Direktoro</i>	FRED. PUJULÀ
<i>Redakcia sekretario</i>	JOSEP GRAU
<i>Redaktoro</i>	E. PELLICER
<i>Administristo</i>	JOAN PIFERRER
<i>Administraciaj sekretarioj</i>	{ MANUEL BORDAS JOAN HORTA

REDAKCIAJN KORESPONDAĴOJN SENDU AL REDAKCIA SEKRETARIO:
STRATO CARME, 30 : BARCELONO

KORESPONDANTOJ

Enric Aguadé	Reus
Pere Solanas	Rubí
Josep Vidal	Tarragona
Marià Solà	Terrassa
Francisco Guitart	Vendrell
Josep Albagés	Vich

Ankoraŭ unu fojon ni petas la Prezidantojn de grupoj bonvolu elekti en sia urbo korespondanton por KATALUNA ESPERANTISTO laŭ la kondiĉoj aperintaj en la numero de Januaro, paĝo 13.

En la urboj, kie la 30^{an} de Majo korespondantoj ne estos elektitaj de la grupoj, la Redakcio mem elektos ilin.

KATALUNA ESPERANTISTO

ĈIUMONATA OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

SEN PAGA POR LA ĜEFEDERACIANOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
12, strato Gracia. — SABADELL
KATALUNUJO


Redakciajn korespondaĵojn bonvolu
sendi al «Redakcia Sekretario : strato,
Carme, 30; Barcelono».

NIA DEVIZO : «MARI ESTAS GUTARO»

ENHAVO : *Pri...*, Fred. Pujulà. — *Deka Universala Kongreso de Esperanto.* — *Kaatje*, K. E. — *Tra Germanujo*, Fred. Pujulà. — *V^a Kongreso de la K. E. F.*, Josep Grau. — *IV^a Literatura Konkurso de la K. E. F.* — *Ol post antaŭ*, E. Boirac. — *Oficiala Parto.* — *Bibliografio*, Tamen. — *Enlanda Movado.* — *Korespondado.* — *Kurioza dokumento.*

PRI...

EL NOSTRE MOVIMENT

acosta ràpidament l'època de la celebració del 5.^t Congrès de la Federació, i creix l'impaciencia i l'entusiasme de tots aquells que s'interessan per la prosperitat de l'Esperanto a Catalunya. Nombroses són les lletres que rebem demanant-nos detalls, solucions de dubtes, fent-nos preguntes que'ns sorprenen per inesperades, però que'ns il·lustren sobre l'estat de l'opinió.

A tots per un igual responem i respondrem lo mateix : Paciencia, fe, entusiasme. El Congrès de Sant Feliu serà, si això és possible després dels èxits anteriors, més important que cap. Una vegada més, reunits en fraternal assemblea demostrarem la cohesió dels nostres organismes i farem evident a l'Esperantisme dels altres països que pot comptar amb nosaltres, que, fermes com sempre, malgrat totes les dificultats, ens mantenim en el nostre lloc.

Alguns, ben pocs aquests, pregunten si el Congrés tindrà lloc, si poden fer-ne propaganda sense por d'haver-se'n de desdir després. Ja sabem que algunes persones aconsellen el retraïment, que laboren per a restar importància a la nostra Assamblea, que sota-mà fan córrer les més absurdes notícies i consells usant de la bona fe dels samideanos a qui es dirigeixen. Creien aquelles persones que'l retard en la sortida del KATALUNA ESPERANTISTO era la mort d'aquest, i que no's podrien rebatre les actuacions perjudicials que elles emprèien.

No sols el K. E. no és mort, sinó que ara més que mai té vida plena i sòlida; i l'entusiasme dels que s'han apressat a pagar llur quota per solucionar les dificultats administratives que la nostra sinceritat no volia deixar sense solució, dóna més autoritat als que estàn disposats a treballar per l'ideal comú. Una vegada per sempre sigui dit que les pàgines del KATALUNA ESPERANTISTO estàn a la disposició de tothom. Tot aquell samideano que se'ns dirigeixi per a parlar en defensa de ses opinions mentre sigui en bé de la Federació (és a dir, mentre ell cregui fer-ho en bé de la Federació, car nosaltres podríem equivocar-nos si ens erigíssim jutges d'aquella bondat), té les portes d'aquesta revista obertes de bat a bat. Ella és l'orgue dels federats, i a llur disposició està sempre. Un cop això dit, tot seguit se comprendrà lo sospitós de totes aquelles comunicacions fetes *subterraniament*, fóra de la revista. Els bons federats ja saben a què atènr-se. Som partidaris de la publicitat de les idees, siguin quines siguin, i, per damunt de totes, de les dels que'ns ataquen, car res rebut tant bé la falta de raó com la publicitat de la mateixa falta. Per això nosaltres esperem el 5.^a Congrés com la més gaia de les festes que, donant publicitat a totes les actuacions amagades, puguin fer més esclatant l'entusiasme dels federats i l'èxit de la Federació.

Mentrestant, treballem! Treballen els amics de Sant Feliu amb un fervor admirable, el Comitè en la llorda tasca que se li encomana cada any, tots i cadascú en la propaganda dels nostres ideals. No hi fa res que, a tanta feina, s'hi afegeixi la de vèncer els entrebancs dels que, no tenint temps ni per a aprendre l'Esperanto, usen el que'ls queda per a restar energies. Aquestes no's perdràn. El nostre vaixell bogarà joiós cap als horitzons lluminosos, deixant endarrera els naufragés que s'hauràn entoçudit en navegar dintre la clova de nou de llurs incoherències i polèmiques ridícules.

Treballem tots pel Congrés; portem-hi la nostra presència, el nostre entusiasme i totes aquelles idees que poden ésser útils a la prosperitat de la causa.

FRED. PUJULÀ

Deka Universala Kongreso de Esperanto

SCIIGOJ EL LA «KONGRESA GAZETO»

DANKE al klopodoj de Generalo Sébert kaj de S-ro Noblemaire, la vojaĝo al Parizo kun reiro, sur la ses francaj frevoj (Nord, Est, P. L. M., Orléans, Midi, Etat) estas por ĉiuj gekongresanoj malaltigita je rabato de 50 %.

Dum la Kongreso okazos Oratora Konkurso, en kiu povos partopreni, post aprobo de la juĝantaro, ĉiu kongresano. Por detaloj oni turnu sin al S-ro R. Ch. Pichon, redaktoro de la Gazeto de la Deka Kongreso.

La nombro de la kongresanoj ĉe la fino de Februaro estis ĉirkaŭ 1400.

Por la korespondado. — La sola adreso de la Kongreso estas 3, place Jussieu, Paris. Kelkaj samideanoj erare sendas siajn leterojn al Palaco Gaumont, kies oficistoj tre afable resendis ilin al ni, sed du aŭ tri tagoj estas fuŝuzitaj. Plie, la Kongresanoj estas petataj montri la numeron de sia provizora karto, kaj tre legeble skribi sian nomon.

Blinduloj. — Prof. Th. Cart, prezidanto de la Blindula Komisiono, komunikas al ni la jenon: Lia Moŝto S-ro Ministro por Internaj Aferoj kaj S-ro Mirman, direktoro de la Publikaj Helpado kaj Higieno, afable metis je la dispono de la Organiza Komitato, por loĝado de la Blindaj Kongresanoj, la Nacian Institucion de la Junaj Blinduloj. 51, Boulevard des Invalides. Interesatoj sin turnu al Prof. Th. Cart, 12, rue Soufflot, Paris.

Ekspozicio (Muziko). — La muzikkomponistoj kaj eldonistoj, kiuj deziras enmeti en la Ekspozicion siajn *esperantistajn* verkojn kaj eldonaĵojn, estas petataj ilin sendi donace po unu ekzemplero, antaŭ la 1-a de Junio, al S-ro F. de Ménéil, 21, rue de l'Hotel-de-Ville, Neuilly-s.-Seine (Seine), Francujo.

Teatro. — Oni memoras, kiel lerte kaj fajre, dum la Kvina, la Barcelona Aktoraro «kreis» la Esperantan «Mistero de Doloro». La Organiza Komitato interkonsentis kun la sama aktoraro, kiu ludos dum la Deka, ĉe poste fiksitaj datoj. Ĉi tiun fojon klasikajon ludos la realistaj artistoj de Adrià Gual, nome «Georgo Dandin» de Molière (pron.: Moljér), en la traduko verkita de nia Majstro. Nedubeble estas, ke la pure Esperanta elparolado kaj perfekta metikapablo de niaj katalunaj aktoroj igos la prezentadon de «Georgo Dandin» granda propaganda festo kaj kortuŝanta soleno de Beleco kaj Arto.

Kaatje

LA 11^{an} de Marto, oni ludis por la unua fojo en la direktita de S-ro Adrià Gual barcelona teatro «Auditorium», kie sidas la «Akademio de Kataluna deklamado», ĵus fondita de la Barcelona Deputitaro, — la versan katalunan tradukon de *Kaatje* verkitan de nia direktoro S-ro Fred. Pujulà.

En tiu belega nova teatro, kaj antaŭ aristokrata publiko, el kiu konsistis la «Asocio por protekti la katalunan Dramarton», kiu elektis la verkon por sia unua kunveno, *Kaatje* estis sukcese akceptita, kaj la kurteno leviĝis kelkajn fojojn post ĉiu akto.

La dua prezentado, al kiu estis akceptita la publiko, estis ankoraŭ pli granda sukceso, kaj la tradukinto devis aperi sur la scenejo saluti la publikon, kiu vokis lin per insista aplaŭdado.

La gazetara sukceso estis granda kaj unuanima. En ĉiu ĵurnalo aperis longaj artikoloj priskribante la verkon kaj laŭdante ĝin; la teatraj revuoj publikigis fotografajojn de aktoroj kaj scenoj; virina revuo «Feminal» reproduktis krom la portreto de *Kaatje*, la francan kaj katalunan tekston de la por tiel diri *punta balado*, por montri la fidelecon de la traduko kaj la beleco de la verko. Kaj ĉiu teatra kritikisto sin okupis ne nur pri la verko mem sed pri la stato de la belga literaturo ĉi tie nekonita.

Pro tio ĉi lasta ni parolas en tiuj ĉi paĝoj pri verko de nia direktoro, kaj li estas devigata tion permesi. Ni ne forgesu ke *Kaatje* estas verko kunligita al la Esperanta vivo, de post kiam ĝi tiel profunde emociigis nin dum la Antverpena Kongreso. Ni ne forgesu, ke dank'al Esperanto ĝi estis konita de S-ro Pujulà. Ĉu ni bezonas aldoni komenton? Ĉu la fakto mem ne sufiĉas? Ĉu estas necesaj aliaj argumentoj por montri al literaturistoj la helpon, kiun Esperanto povas doni al la disvastiĝo de naciaj literaturoj tra la mondo?

Al kio, se ne al Esperanto, la belga literaturo ŝuldas la interesiĝon, kiun ĝi vekis en nia lando?

Ni, tre fieraj pro la sukceso de nia samlanda samideano, sendas al la belgaj samideanoj nian gratulon pro tiu de ilia aŭtoro S-ro Spaak kies nomo de nun estos populara ĉe ni.

K. E.



Tra Germanujo¹

III

PEGOUD flugas... kiel diri?... antipode. Kaj mi devas fari paroladon en Offenbach... Kompreneble, kun muziko. Ĝi okazos en balo, en unu el tiuj tre germanaj kunvenoj, kie oni dancas, manĝas, trinkas kaj kantas. Sed mi deziras vidi Pegoud-on, kaj miaj geamikoj ankaŭ. Ni iras unue al la flugejo, kie inter la miloj da ĉeestantaj personoj, la kunrulita flago kunportita de frankfurta samideano estos renkontsigno por ni, kaj mirigilo de la spektatoroj. La hazardo venigas al ni seson da katalunaj vendistoj de fruktoj. Mi ne diros, ke ĉiu fruktovendisto en Germanujo naskiĝis en nia lando, sed mi povas certigi, ke ĉie troviĝas butikoj, kie katalunoj de l'kontinento aŭ de l'Insuloj disvendas daktilojn, oranĝojn, bananojn, arakisojn kaj melonojn. Mi ne scias ĉu ili iam kunvenos por festi «Fruktajn Ludojn» rememore al patrolando. Mi scias pri barcelona dolĉajisto, kiu facile vojaĝas por siaj negocoj tra la sudo de Rusujo per helpo de la multenombraj katalunoj, kiuj tie komercadas per ovoj kaj kokinoj. Se ni estus pli praktikemaj, nia deputitaro organizus konsulejojn en ĉiu urbo el tiuj landoj... Ni ne diskonigu la aferon. Tial ke iom da kelneroj en la mondo ĵargonas francan lingvon, multaj francoj vidas en Esperanto atencon kontraŭ la intelekta suvereneco de Francujo. Se iu diskonigas la ekziston de tiaj katalunparolantoj en Eŭropo ni riskos atakojn kiel malamikoj de nia lando.

La pluvo falas kvazaŭ el siteloj; ĉiuj veturiloj malaperis. Sen pluvombreloj, ni revenas al la urbo trempitaj ĝis la ostoj. Dum la iro, unu sinjoro kun pako envolvita en nesorba tolo sub la brako, haltigas kaj alparolas min esperante. Ni rapidas frenezigitaj de la terura pluvo. Li vidis la flagon, li ĝojas.

— Ĉu esperantistoj!

— Jes. Vi, ĉu enurbano?

— Ne. Holandano. Mi vojaĝas disvendante kartojn.

Miaj kunvojaĝantoj miras. Mi ankaŭ. Sed la pluvo, la konfuzego, la svarmo de l' diskuranta amaso disigas nin.

— Mi sola vojaĝis al Offenbach. Miaj geamikoj prudente restis en la hotelo apud la varmigiloj. Mi, malseka kiel fiŝo, faris la paroladon en la festo. Unu samideano tradukis ĝin. Aŭdante lin, mi miris

1. *Sekvo*. Vidu antaŭajn numerojn.

ke mi povis inspiri al li, tiom da por mi nekompreneblajn sonojn!... Dum unu momento mi sentis frosttremon. Mi pensis : «Nun, se tiu bona samideano estus ŝerculo kaj dirus : Jen, tiu sinjoro ĵus diris, ke vi estas aro da sentaŭguloj. — Ĉu tiuj bravaj homoj ne bastonos min ĝis la ostoj?» Ha, tiuj komercistoj, kiuj komercadas per interpretoj... ĉu ili estas certaj, ke...?

Mia tradukinto certe tradukis malbone, ĉar... oni aplaŭdis.

— Mi devas prezenti miajn komplimentojn al la Agentejo Cook por la bona funkciado de ĝia informejo, kaj ankaŭ por sama kaŭzo al la «Societo por Propagando de la urbo» de Frankfurto.

Jam antaŭ kelkaj jaroj, dank'al la bonaj informoj de Cook mi faris kun karavano la plej fantazian vojaĝon de Aachen al Kolonjo, mi maltrafis kelkajn vagonarojn, trakuris nokte Aachen kun miaj kunvojaĝantoj, kiel aro de malbonaj aktoroj forpeditaj de urbo, kaj nun ankoraŭ mi ne revis ĉiujn membrojn de la karavano. Certe kelkaj el ili nun loĝas en Germanujo, kie ili restis *lasciante ogni speranza* pri eliro.

Ni akiris biletojn por vojaĝi ŝipe tra la Rejno, de Majenco ĝis Kolonjo. Kun la biletoj, ni ricevis la hortabelon de la ŝipoj. En Frankfurto, ĉar mi havis dubojn pri la bonaj informoj de la blonda oficisto de la Pariza *Place de l'Opéra*, mi min turnis al la Urba Oficejo, kie mi profitis la okazon ekparolante Esperante kaj distribuante kelkajn ŝlosilojn. Ankaŭ, ironie demandita pri Ido, mi devis trankviligi la senkonfidan oficiston. Tiu ĉi donis al mi ĉiun detalon pri la horoj de ekvojaĝo de la Rejnaj ŝipoj, kiuj estis la samaj donitaj de Agentejo Cook. Plej konfide ni veturis al Majenco, kiun ni atingis post horduono da vojaĝo. Kaj ... efektive, neniuj ŝipo plu vojaĝas de post dekkvin tagoj. Ni estas en la aŭtuna sezono. La informistoj *nur* forgesis diri tion. Ni veturis tra ĉiu enŝipiĝejo, mi firme, insiste demandis, ne povante kredi ke tiuj informistoj povis erari kaj forgesi tiun *detalton*. Ĉie oni rigardis nin kun miro. Se en Barcelono, oficisto informus nin malbone pri aferoj okazantaj en loko malproksima je horduono, ni krius ĝis oni aŭdus nin de la infero... Mi supozis ke la Frankfurta oficisto perdis sian tempon imagante *idistajn* ironiojn.

Ni veturis vagonare al Kolonjo, kie pro tro frua alveno ni ne tuj renkontis sinjoron Junker, kiu tre afable antaŭsendis al mi bonegajn informojn.

FRED. PUJULÀ

(Daŭros)



V^a Kongreso de la K. E. F.

FEBRUARA numero de KATALUNA ESPERANTISTO estis tuj presota, kiam venis al la Redakcio la sciigo pri prokrasto de la kongresa dato, decidita de la Komitato de K. E. F. kaj de la Organiza Komitato de nia V^a Tial en pasinta numero povis aperi nur mallonga noto en la fako *Oficiala Parto*. Kiel en ĝi estas dirite, la prokrastan decidon motivigis atentinda peto de entuziasmaj samideanoj loĝantaj en urboj, kie la lundo de pentekosto (ĉiujare 1^a de Junio) estas tago, kiun oni ne konsideras kiel feston. Kaj la Komitatoj fiksis la novajn datojn de la Kongreso por la tagoj 28^a kaj 29^a de Junio, kiuj estas festotagoj en nia lando.

Certe, senpacienco suferigos multajn kunfederacianojn, kiuj trovos longaj la tagojn, ĝis kiam ili povos partopreni en la festo de la Federacio, kiu renovigas ĉiujare niajn entuziasmojn, liverante al ni plej grandajn plezurojn ĉe la renkonto kaj mallonga kunvivado kun bonaj amikoj, kiuj restas dum la tuta jaro silentaj unu malproksime de alia, kvankam okupitaj de sama tasko, kaj povas kuragiĝi sin reciproke nur dum la Kongreso, montrante al ĉiuj per siaj raportoj pri farita laboro kaj akirita sukceso, la vivon de nia ideo kaj la vastecon de nia movado.

La kortuŝanta saluto de la delegitoj de ĉiuj grupoj al la ceteraj kongresanoj, la solena festo de la Floraj Ludoj, la frata kaj amika festeno, la ekskursoj kaj plezuroj de la kongresaj tagoj forte gravuriĝas en ĉiuj koroj kaj estas kvazaŭ spronoj pikantaj ĉiun kongresinton, kiu de post la fino de l'jaro komencas revii pri la venonta Festo kaj stimuli sin kaj la amikojn al ĝia partopreno.

Nu, tiun senton de spirita juko, kiu trapenetas nin des pli multe, ju pli fariĝas proksima la Kongreso de nia organizaĵo, ankaŭ ni sentas. Ĝi puŝas nin al persista kaj senlaca laboro. Ni pensas, ke ĝi ankaŭ instigas vin; kaj eble, en kelkaj, ĝi vekas ian strangan timon, similan al tiu premanta la korojn kiam ŝtormo proksimiĝas.

Ĉu vi memoras, amikoj, la grandan ĝojon de korpo kaj animo, kiam la amasigitaj de l'vento nigraj nuboj, kun fulmo kaj tondro verŝintaj riverojn da akvo, dispeliĝas antaŭ la forto de l' somera suno, kaj senvaligas la lazuron, kiu brilas antaŭ ni kun heleco kvazaŭ neniam vidita? Kia trankvilo tiam cirkaŭas la teron, kian novan kuragon portas al la homo la sunaj radioj kaŝitaj de l'nubegoj kaj reaktintaj sian oran nuancon!

Forsiru el via koro ĉiun timan senton! Plenigu ĝin per kuraĝo kaj laboru entuziasme por nia Kongreso! La suno de nia triumfo brilos helege disfandinte ĉian nebulon.

Plej granda sukceso atendas nian Kongreson; ĝi estos la ĉies premio!

JOSEP GRAU



IV^a Literatura Konkurso de la Kataluna Esperantista Federacio

Ni esprimas plej koran dankon al la redakcioj de la jenaj gazetoj, kiuj bonvolis helpi al la sukceso de la Floraj Ludoj publikigante entute aŭ parte la programon de la Konkurso:

Esperanto, Germana Esperantisto, Kataluna Katoliko, La Movado, La Ondo de Esperanto, La Revuo, La Suno Hispana, Lingvo Internacia.

LISTO DE DEVIZOJ DE L' VERKOJ RICEVITAJ

Noj. 1, Ravo. — 2, Kiu? — 3, Mi scias nur, ke mi nenion scias. — 4, Marina. — 5, Tra la valoj alitone kantas ĝi. — 6, Amo superas morton. — 7, Mi revis tutan mondon de feliĉoj. — 8, La mondo estas trafendita sonorilo. — 9, Ruto. — 10, Ave Maris Stella. — 11, Ĉiu fadenero faras sian ombron (Goëthe). — 12, Neniu fariĝis maristo lerta per maro trankvila. — 13, Rapidu ni al ĝoj' de l' vivo! — 14, Skizo en ĉarma tempo. — 15, Ni, estu ni! — 16, Mortinto. — 17, Fantazio. — 18, Sub la sankta signo de l'espero...

Verkoj n.^o 15 kaj 17 venis sen koverto entenanta nomon de l'aŭtoro. La respektivaj verkintoj bonvolu sendi ĝin.

— Responde al unu demando ni klarigas, ke oni *devas* sendi sub sama devizo kun sia manuskripto, koverton kun sia nomo kaj adreso, tial ke per tiu rimedo la akcepto de verkoj povas daŭri ĝis dato pli proksima al la Floraj Ludoj, ol se la manuskriptoj estus plene anonimaj; ĉar tiamaniere estas ŝparata la multa tempo necesa por publikigo de la Verdikto kaj ricevo de la atestoj pri aŭtoreco, necesaj por prepari la solenon, kiuj foje venis nebaldaŭ. Se oni agus alima-

niere povus okazi ke la Komitato ne konu siatempe la nomon de la premiito per la Natura Floro, aŭ per alia premio, kiel okazis jam kun S-roj Bicknell kaj Broekhuizen, kaj tial komplikiĝus la perfekta aranĝo de la Festo.



Ol post antaŭ¹

EN la decembra numero de KATALUNA ESPERANTISTO aperis noto redaktita de S-ro Pujulà pri la uzo de la formo *antaŭ ol* kaj en la januara numero de *Oficiala Gazeto* S-ro E. Boirac, prezidanto de la Lingva Komitato, publikigis artikolon pri la sama temo. Mi rapidis atentigi nian eminentan samideanon pri la koincido, kaj el lia respondo mi eltiras la jenon: «Mi estas tre ĝoja, ke mi renkontiĝis kun S-ro Pujulà sur la sama temo. Strange estas, ke neniuj, antaŭ li kaj mi, rimarkis, ke se oni povas diri *antaŭ ol*, estas logike ke oni povu ankaŭ diri *post ol*. Tamen la fakto estas tia. Cetere, ŝajnas ke la vorto *ol* estas kvazaŭ fremda por preskaŭ ĉiuj esperantistoj: ili ne facile uzas ĝin. Kion ili opinius ekzemple pri jena frazo: *Kontraŭ ol vin malami, li estas preta oferi por vi sian vivon? Ĉu ĝi ŝajnos komprenebla?»*

Ankaŭ ni kopias la artikolon aluditan pri la esplorita demando, kiun S-ro Boirac plej kompetente respondas. — J. G.

PRI antaŭ ol. — Oni scias, ke laŭ la gramatiko entenata en la Fundamento de Esperanto, oni devas uzi antaŭ la verbo la esprimajon *antaŭ ol* por montri rilaton de tempo inter du statoj aŭ agoj, ekzemple: *antaŭ ol mi forveturos, pretigu por mi valizon.*

Cetere Doktoro ZAMENHOF, en siaj verkoj kaj paroladoj, ĉiam uzadas tiamaniere *antaŭ ol*, kaj lia ekzemplo estas sekvita de preskaŭ ĉiuj esperantistaj aŭtoroj. Nur kelkaj el ili enŝovis lastatempe la esprimajon *antaŭ kiam* kvazaŭ por respondi al la esprimo *post kiam*, enkondukita ankaŭ lastatempe kaj ne trovebla, se mi ne eraras, en la Zamenhofaj verkoj.

Nun stariĝas la demando, kiun mi ofte pripensis, ne sen ia miro kaj ia dubo. En tiu esprimo *antaŭ ol*, kion signifas tiu konjunkcio *ol*? Kia estas ĝia ofico? Kiamaniere oni povas klarigi ĝin?

1. Vidu numeron 44-45.

Primitive kaj esence la konjunkcio *ol* montras komparon, rilaton de supereco aŭ malsupereco inter du terminoj, unuvorte kvantan diferencon, kiel ekzemple : *Via frato estas pli maljuna, ol vi; mi preferus morti, ol vivi en sklaveco*, k. t. p. Eĉ oni trovas *ol* uzata kun la vorto *alia*, kiu montras ian ajn diferencon, kiel ekzemple : *maljuniĝante, li jariĝis tute alia, ol li estis dum sia juneco*. Estas do supozeble, ke kiam oni uzas *ol* kun *antaŭ* tio estas por montri ankaŭ komparon, rilaton de kvanta diferenco. Efektive *antaŭ* havas tute la saman sencon kiel *pli frue*, kiel ekzemple : *Li venis antaŭ mi*. Ĉu tio ne signifas : *Li venis pli frue (ol) mi (venis)*? Sekve tute nature kaj logike *antaŭ* postulas post si la konjunkcion *ol* por kuniĝi kun verbo, same kiel postulas *pli frue*, kies ekvivalento ĝi estas.

Sed de tio sekvas konsekvencoj, kiujn estas interese rimarki. Se *antaŭ* kun verbo egalvaloras *pli frue* kaj postulas *ol*, same la prepozicio *post* egalvaloras *pli malfrue*, kaj devas ankaŭ postuli la saman konjunkcion. Oni do devus diri : *Post ol la kurteno ĵalis, oni longe aplaŭdis la aktorojn*. Same kiel oni diras : *Antaŭ ol la kurteno leviĝis, oni ekbruligis la lampojn*; kaj ankaŭ : *post ol manĝi, la pastro diris : Deo gratias*, same kiel : *Antaŭ ol manĝi, la pastro diris : Benedicite*.

Tamen estas certe, ke neniu aŭtoro uzis jam tiun esprimajon *post ol*. Ĝi estas ne trovebla en la verkoj de D-ro ZAMENHOF. Ŝajnas, ke neniu eĉ ekpensis pri ĝi. Kiam oni sentis la bezonon havi specialan esprimajon por tiu ideo, oni elpensis *post kiam*, kvazaŭ ne memorante la jam ekzistantan *antaŭ ol*, nek atentante la necesan rilaton inter *antaŭ* kaj *post*.

Eble la kaŭzo estas, ke la unuaj verkistoj en Esperanto estis precipe Slavoj, kiuj sentis la bezonon havi specialan esprimajon rilate al *antaŭ*, sed neniel sentis tiun saman bezonon rilate al *post*. Efektive en frazoj enhavantaj du verbojn, el kiuj unu esprimas agon aŭ staton okazantan post ago aŭ stato esprimata de la alia, ŝajnis al ili sufiĉe, kiam la du verboj havas unu saman subjekton, uzi por la unua verbo la partecipan modon kun estinta tempo. Ekzemple, anstataŭ diri : *post ol aŭ post kiam li kantis, aŭ li estis kantinta, li salutis la publikon kaj deiris*, ili diris tute simple : *kantinte, li salutis*, k. t. p.

Aliparte, kiam la du verboj havas malsamajn subjektojn, ŝajnis ankaŭ al ili sufiĉe antaŭmeti *kiam* al la unua propozicio, kiel ekzemple : *kiam li estis kantinta, mi deiris*. Tute ne ŝajnis necese diri : *post kiam li estis kantinta, mi deiris*.

Ankoraŭ nun, multaj esperantistoj uzadas tiujn esprimajojn, kiuj laŭ mia opinio estas multe preferindaj, kiel vere konformaj al

la propra spirito de la lingvo. Sed la personoj, kiuj ne povas sin senigi, eĉ skribante aŭ parolante esperanton, de la kutimoj de sia nacia idiomo, precipe Francoj, penante traduki laŭvorte *après que*, estis ĝenataj ne trovi en Esperanto responĉan esprimaĵon, kaj tial elpensis: *post kiam*, aŭ eĉ *dum ke* (anstataŭ simple *kiam*), k. t. p., k. t. p.

Ni konkludu, ke en la nuna stato de la lingvo ekzistas du paroj da esprimaĵoj, por la tempaj rilatoj *antaŭ*, *post*, uzeblaj kun verboj, kaj kiuj kvazaŭ konkurencas inter si. Unue *antaŭ ol*, jam uzata de D-ro ZAMENHOF kaj sole konforma al la Fundamento, kaj *post ol*, ne ankoraŭ uzata de D-ro ZAMENHOF sed plene aprokata de li, laŭ tio, kion li diris al mi, kiam mi petis lian opinion pri tiu gramatika punkto dum la Berna kongreso; due *antaŭ kiam*, uzata nur de malmultaj aŭtoroj, kaj *post kiam* pli ofte trovebla, eĉ, se mi ne eraras, en la lastaj verkoj de D-ro ZAMENHOF.

Kredeble, la uzado mem de la Esperantistaro fine elektos inter tiuj du paroj, kiuj estas ambaŭ logikaj kaj povas esti egale defendataj per bonaj argumentoj, kvankam la unua ŝajnas havi por si la aŭtoritaton de la Fundamento.

E. BOIRAC



Oficiala parto

Erare ni diris en la pasinta numero, ke oni ricevis leteron de pastro Coll, kiu insistis pri la akcepto de sia eksigĉo.

Kion diras pastro Coll en la aludita letero, estas : ke li konsideras sin eksigita, el la Komitato de K. E. F., ĉar tiu-ĉi ne konsultis lin pri unu afero. La Komitato de tiu-ĉi Federacio skribis al D-ro Coll esprimante al li sian surprizon pri tio, ĉar en la Komitato oni ne pensis iam pri lin eksigi el ĝi.

— Oni avertas al ĉiu grupo aliĝinta al K. E. F., pri tio, ke nur estos diskutataj en nia Kongreso tiuj proponoj, kiujn ni ricevos akurate por ilin publikigi en la paĝoj de la numero de K. E., apartenanta al monato antaŭa al tiu, en kiu okazos la Kongreso.

Oni petas al ĉiuj proponontoj, sendi siajn proponojn *tuj* al la Sekretario de K. E. F., Str. Carme, 30, pral., Barcelona. Ĉiun alian korespondaĵon, rilate al tiu-ĉi Komitato, sendu ankaŭ al sama adreso.
— MANUEL BORDAS, *Sekretario*.



BIBLIOGRAFIO

DICIONNAIRE USUEL FRANÇAIS-ESPERANTO. — E. Grosjean-Maupin. Kolekto de La Revuo. — Hachette et C.^a. Paris 1914. Prezo. fr. 3'50.

Tiu ĉi vortaro, redaktita laŭ la samaj principoj, kiuj tiel multe valorigis la «Dictionnaire Complet» de la sama aŭtoro estos tre taŭga kaj pli ol sufiĉa por komencantoj, lernantoj, kaj ĉiuj, kiuj ne bezonas Esperanton por komplikitaj literaturaj tradukaĵoj. Pri la metodo, kiun sekvis la aŭtoro, ni jam parolis recenzante la kompletan vortaron el kiu la nuna estas inteligenta eltiraĵo. Ni ne bezonas aldoni ke tiu libro estas bonega kaj aĉetinda de ĉiu, kiu konante francan lingvon, ne konsiderus sufiĉaj la malgrandajn vortarojn, kiuj aperis ĉe ni.

ESPERANTO KATE

Ni ricevis folion kun la titolo supre dirita, kun la vorto *Hungarlando* stampita, kiu permesas al ni supozi ke la lingvo estas hungara, kaj kun la manskribitaj vortoj «Bonvolu recenzi».

Sed, kion kaj kiel ni povas recenzi?! Nur tie-ĉi-tie ni vidas la vorton *Esperanto*. Ĉu la folio propagandas por aŭ kontraŭ? Jen kio devus esti dirita de la aŭtoroj de tiuj eldonoj almenaŭ sur aparta folio.

PLENA RECENZO DE L' ESPERANTA GAZETARO. Septembro 1889-Septembro 1913. — Instituto de l' Esperanta Gazetaro aliĝinta al la Kataluna Esperantista Federacio, sub direkto de Joan Amades. — str. Peu de la Creu, num. 10, tenda. Barcelona.

Tre interesa kaj utila nomaro de ĉiu gazeto aperinta inter la du datoj supre diritaj. Pro ĝi ni gratulas nian amikon S-ron Amades.

Ni atendas koni bone la celon de la «Instituto» por doni nian opinion pri ĝia nomo.

ESPERANTA BIBLIOTEKO PROPAGANDA. — Num. 1. S. P. Rantov. «Internacia lingvo Esperanto» kun 2 portretoj. Prezo 5 sd.

— Num. 2. S. P. Rantov. «Esperanto en vilaĝo», «Animo de la lingvo Internacia» kaj «Interparolo kun urbano». — Prezo, 5 sd.

Deponejo : G. Fedulov. Sokolovaja, 112. SARATOV. — Rusujo.

Ĝi estas ĉio, kion ni povis legi kaj kompreni el tiuj broŝuroj, redaktitaj en rusa lingvo, kiujn ni ricevis por recenzo. Ni bedaŭras.

ESPERANTA HELPILO POR LERNANTOJ DE ESPERANTO

Bonegan ideon havis nia estimata samideano S-ro Johano Rosals, eldonante tiun faldeblan karton, kiun ĉiuj lernantoj de nia lingvo povos kunporti por konsulti en ĉiu loko kaj momento. La karto ne estas vendata, sed senpage disdonata de la eldonisto, kiun ni gratulas kaj dankas pro liaj ideo kaj malavareco.

DEKLARACIO PRI HOMARANISMO, de D-ro L. L. Zamenhof, Aŭtoro de la Lingvo «*Esperanto*». — Represo de «*Homaro*».

I^a eldono. — 1913. Eldonejo kaj Presejo de «*Homaro*», Pasaje del Comercio, 8, Madrid. (Hispanlando). (Dek ekzempleroj: 50 centimojn.)

LA VOJO DE L' VIVO. L. H. Tolstoj. Ĉapitro XXII. *La vorto*. Tradukis Paŭlo Medem.

Kaj li tradukis tre bone tiun interesan kolekton de pensoj pri la vorto. Aĉetu ĝin! Ĝi estas eldonita de Kovna Esperantista Societo, adreso : *G. Sadovaja d. de Rac. Kovno*. Prezo : 10 sd. (25 cent.).

BRESLAU. Vortpentraĵo de Hugo Kretschmer. La germanlingvan originalon esperantigis Germana Esperanto-Asocio. (Loka Grupo Breslau) 1913.

LA MONNAIE INTERNATIONALE, par René de Saussure. Genève. Imprimerie Henri Jarrys, Rue de la Treille. 1914.

Broŝuro por diskonigi la genian elpenson de nia eminenta samideano, kies enhavo estas eltirita el la teksto de la *Revue suisse de Numismatique*, t. XIX.

TAMEN

— Kompreneble, kiam en la lasta bibliografia fako ni diris ke la verko *Curs Præctic de Esperanto* estis kvankam kataluna, oficiala en la Hispana Universitato de Barcelono, ni tute ne intencis diri, nek komprenigi ke per aparta leĝo oni oficialigis ĝin. Nek ankaŭ ni intencis diri : ke la Katedrano D-ro Pastro Coll ĝin oficialigis en sia kurso, uzante rajtojn, kiujn ne havas profesoroj, kiuj eĉ ne rajtas simple permesi uzadon de kataluna lingvo. Nia kara amiko D-ro Pastro Coll estis la unua, kiu miris, kaj ni tre respektemaj al la Hispanaj leĝoj kaj katedraj kutimoj, rapidas klarigi la eraron. La «*Curs Præctic*» estas uzata pro la esperanta ekzercaro, kiun ĝi entenas, kaj D-ro Coll neniam proponis tiun aŭ alian verkon.

ENLANDA MOVADO

BARCELONO

S-ro R. S. Rocamora komencos la 14^{an} de Aprilo kurson de Esperanto per Berlitz-metodo ĉe sia loĝejo strato Angels, 1.

— Nia tre kara amiko, malnova kaj fervora esperantisto, sinjoro Ramón Soler, prezidinto de *Ĉiam Antaŭen* suferis gravan operacion, kiu restigas lin for de ni. Ni deziras, ke li baldaŭ kaj tute resaniĝu por ke ni povu havi la plezuron ricevi lian efikan kunlaboradon.

— Kelkaj barcelonaj esperantistoj deziras organizi amatoran teatran bandon por entrepreni la prezentadon de teatraĵoj dum esperantistaj festoj sub la direkto de nia kara amiko, S-ro Joan Viñas. Simpatiantoj al tiu ideo bonvolu esprimi sian aliĝon per poŝtkarto al S-ro Leonart Renom, str. Pere IV, 398, Barcelono.

— La 21^{an} de Marto okazis, ĉe *Esperanto kaj Patrujo*, balo organizita de ĝia propaganda fako, kiu bone sukcesis.

— La raporto pri la festoj organizitaj de la *Barcelona Esperantista Societo* aperas sur la «Bulteno de Barcelona Stelo».

— *Esperanto kaj Patrujo* malfermis la 9^{an} de Marto kurson de Esperanto, ĉe kies fino okazos konkurso inter la lernantoj aspirantaj al la premioj proponitaj. Matrikulo kaj rajto ekzamineĝi kostas 1 peseton. La kurso bone sukcesas.

— Ankaŭ kurson malfermis la grupo *Semo*, gvidatan de S-ro Manuel Bordas; ĝi okazas de post la 10^a de Marto ĉiumarde kaj vendrede.

MANLLEU

«*Esperantista Amikeco*» kiel kutime en la jarfino faris ŝanĝon de Komitato kaj restis elektitaj: *Prezidanto*: S-ro Joan Parés; *Vicprezidanto*: S-ro Pere Aixelà; *Sekretario*: S-ro J. Piguillem; *Vicsekretario*: S-ro A. Suriñach; *Kasisto*: S-ro J. Dorca; *Bibliotekisto*: S-ro J. Rafart; *Membro*: S-ro J. Prat.

VICH

De la komenco de la nuna jaro *Vika Esperantistaro* ŝanĝis sian loĝejon; nun ĉi tiu societo kunvivadas ĉe la meritinda «Círcol Literari» (strato Sant Hipòlit n.º 14) kie pro ĝia kvieta karaktero,

ĝia grava riĉa kaj nombrega biblioteko, kaj ĝiaj diversaj salonoj, ĝardeno k. t. p. estas sendube taŭga loko por la esperantistoj kaj inda akceptejo de ĉiuj gesamideanoj.

La nova Komitato por la jaro 1914^a konsistas : *Prezidanto*, S-ro Pastro A. Ribas; *Vic-prezidanto*, S-ro J. Miró; *Sekretario*, S-ro J. Comella; *Vic-sekretariino*, S-ino M.^a D. Bassols de Comella; *Kasisto*, S-ro J. Carreras; *Voĉdonantoj* : S-roj J. Francitorra kaj J. Carreras.

Tre grava malfeliĉo okazis en la Vich'a samideanaro; nia estiminda samideanino F-ino Rozo Cortinas mortis post longega malsano la 16^{na} Decembro. Ŝi estis ĉiatempe entuziasma de nia idealo. Tuj post la diskonigo de Esperanto ĉe Vich ŝi akceptis fervore la brilajn radiojn de la verda stelo kaj pro sia klera talento kaj lerteco baldaŭ sin kapabligis en la Zamenhofa lingvo. Pro sia afableco kaj dolĉa karaktero, sia amo kaj intereso por ĉio, kio al Esperanto rilatas, ŝi kaptis la estimon de ĉiuj.

Nia societo deziris montri publike sian grandan funebron kaj ankaŭ grandan estimon al la perdita samideanino per donaco de granda, funebra, blanka krono kies silkaj rubandoj havis la jenan esperantan enskribon : «Al nia neforgesebla samideanino, Vika Esperantistaro.»

La ĉerka sekvantaro estis ankaŭ vera pruvo de la ĝenerala doloro kaj preskaŭ ĉiuj la societanoj partoprenis en ĝi akompanante la ĉerkon ĝis la tombejo.

SANT FELIU DE GUIXOLS

La grupo *Esperanta Lernejo* elektis jene sian novan komitaton: *Prezidantino* : F-ino Rita Esteva. — *Vicprezidantino* : F-ino Rosa Vilaret. — *Sekretario* : S-ro Francisco Roca. — *Kasistino* : F-ino Ana Gimeno. — *Membroj* : F-noj Beatriu Rigau, Isabel Masmitjà, S-ro Josep Vilà.

La societa sidejo estas en strato Rutlla, 13, kie ĉiuĵaŭde okazas supera kurso ĵus malfermita.



KORESPONDADO

S-ro Prezidanto de «Ilepo» : Ni ne ricevas interŝange *Poŝta Esperantisto*'n. — S-ro Prezidanto de *Esp. Amikeco*, Manlleu : Bonvolu klarigi, ĉu S-ro B. Nogué estas elektita delegito de K. E. F. aŭ kores-

pondanto de K. E. — S-ro J. Costa. La artikolo pri la sama demando, kiun ni publikigas, faras superflua vian, por kiu ni plej kore vin dankas. — S-ro J. M. Vendrell. Dankon por la sciigoj. — S-ro Konkursonto. Tio povas dependi de persona opinio; via pri stilo gvidu vin kaj solvu la demandon. — S-ro J. C. Vich. Klopodojn por tio ni faradis sensukcese, tamen ni eble prosperos, sed ne antaŭ la Kongreso bedaŭrinde. Mi povas citi, kvankam ne plenumantajn vian deziron *Poŝvoortareton* kaj la *Vortaron* de S-ro Tudurí.



Kurioza dokumento

Kvankam niaj legantoj jam bone konas la de ĝi pritrakitajn faktojn, tial ke oficiale la Komitato publikigis ilin ĝiatempe per KATALUNA ESPERANTISTO, ni publikigas la jenan leteron senditan al Prezidantoj de niaj grupoj, por doni al ĝi la petitan publikecon. Ni respektas la stilon kaj ortografion de la dokumento.

« ROMULO S. ROCAMORA. Advokato; Supera Instruisto. Strato Angels 1. BARCELONO.

Sro. PREZIDANTO DE.....

Samcelano; en la lasta numero de la «Kataluna Esperantisto» subskribita de Sro Bordas, kiel Sekretario de la KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO, aperis artikolon.

Nun mi ne kredas oportune diskuti pri tiun artikolon; tamen mi kredas havi la rajton *por* diri al vi, kaj samtempe al viaj samgrupanoj;

I. — Ke mi ekŝigis el Prezidanteco de la KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO, *de* antaŭ ses monatoj.

II. — Ke Sro Coll, Ptro., Profesoro en la Barcelona Universitato, elektita Vicprezidanto de K. E. F. ankaŭ ekŝigis.

III. — Ke Sro Camdelacreu, Prezidanto de La RONDO, elektita Vicsekretario de K. E. F., ankaŭ ekŝigis.

Neniom plu mi *ne* devas aldoni momente; pro tio, mi tutkore dankas vin *se* vi komunikas tiujn sciigojn al viaj samgrupanoj.

Kun *la* respektplenaj salutoj, restas samideano via

RÓMULO ROCAMORA

Barcelona je la 6.^a de Marto de 1914^a. »

Ĉiu federaciano, kiu aligos al la K. E. F. tri novajn membrojn por la jaro 1914, povos laŭ sia deziro elekti kiel premion de la *Kataluna Esperantista Federacio* unu el la jenaj : I. Ne pagi la jaran kotizajon de 1914. II. Pagi ĝin kaj senpage ricevi duan ekzempleron de KATALUNA ESPERANTISTO ĉiumonate, kiun la Adm. sendos al lia adreso aŭ al la adreso de la persono elektita de la membro.

NOVAJ MEMBROJ DE LA K. E. F.

Aliĝinto

Aliĝinto

S-ro Daniel Marti, str. Llansa, 5, Vila-	} S-ro Gustau Galceràn, Vilanova i Gel-
trú	
S-ro Magí Soler, str. Correu, 29, Vila-	} trú
trú	
F-ino Bienvenida Lluís, str. Coso, 61,	} S-ro Joan Amades, Barcelona
Manresa	
S-ro Josep Cuatrecases, Passatge de la	} S-ro Fred. Pujulà, Barcelona
Mel, Fàbrica de Midó, Clot, Bar-	
celona	
S-ino Francisca Cuatrecases	} S-ro Fred. Pujulà, Barcelona
S-ro Joaquim Cuatrecases, Fàbrica de	
farines d'Encesa, Girona	
S-ino Joana Cuatrecases.	

Ĉiu membro de la *Kataluna Esperantista Federacio*, aŭ aboninto al KATALUNA ESPERANTISTO rajtos dufoje dum la jaro publikigi en la gazeto krom sia nomo kaj adreso 10 VORTOJN por peti korespondadon, interŝanĝojn de kolektaĵoj, informojn k. t. p. aŭ sciigi ŝanĝon de adreso.

D-ro J. Bremón Masgrau havas la honoron sciigi sian adresŝanĝon, kaj meti al la dispo de la samideanoj sian laborejon de Radioj X, str. Caspe, 66, Barcelono.

«*La Riĉamantoj*» (Kataluna Grupo Esperantista de Paris) kunvenas ĉiusabate, de la 9-a ĝis 11-a vespere, ĉe «Café du Départ», 1, rue Gay-Lussac (angulo Boulevard St-Michel). Prezidanto: J. Solsona, 44, rue Descartes, Paris (5^e).

S-ro Jaume Grau, str. Clarís, 72, Barcelona, deziras interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn.

S-ro Joan Amades, str. Peu de la Creu, 10, Barcelona, vendas kaj interŝanĝas ekzemplerojn de gazetoj esperantistaj.

Llista de delegats autoritzats per la administració de K. E. F. per a rebre les quotes

Arbós del Penedès	A. Romagosa	Major, 11
Badalona	«Badalona Stelo».	Sant Pere, 86
Balaguer	M. Espar Boquer.	Miracle, 7
Banyoles	J. Aulina	Turers, 49
Barbarà del Vallès	S. Arnella	Sant Pere, 21
Barcelona	Joan Rosals	Porta-ferrixa, 30
Begas	J. Esteve	Raval Sant Martí, 19
Berga	J. Cardona.	Apotecari
Blanes	S. Robert	Llarg, 42
Borjes Blanques	F. Rubinat.	Pou, 2
Calafell	J. Jané	
Cambrils	Josefina Maseguer	Hostal Nou
Cassà de la Selva.	N. Puig	Bisbal, 1
Castellar del Vallès	F. Blanquer	Fonts Calents
Centelles	J. Raurell	
Flix	«Verda Stelo».	
Girona	F. Anguet	Progrés, 20
Granollers	F. N. Pujadas.	Fonda d'Europa
Igualada	A. Mosella.	P. Constitució, 11
La Escala	J. Ximinis	Fàbrica géneros de punt
Lleida	Ll. Abadal	Major, 12 i 14
Manlleu.	«Esperantista Amikeco»	Pont, 38, 2 ⁿ , 1 ^a
Mataró	J. Solà	Sant Josep, 46
Mieras	R. Riera	Comerciant
Mollet	«Vojantaŭen».	
Olot	I. Juanola	Superior, 25, 2 ⁿ
Palafrugell.	J. Marquès.	Pals, 1
Pobla de Lillet	J. Llumà	Porxos, 19
Prades	T. Alsina, pvre.	
Premià de Mar	P. Alsina	Camí Reial, 81-79
Reus.	E. Aguadé	Presó, 15
Ripollet.	«Esperanta Akvofalo»	Nou, 20
Rubí.	J. Ratés	Sant Magí, 1 i 3
Sabadell.	Lloc Social.	Gracia, 12
Salàs.	P. Vivet.	Metge
Sant Feliu de Guíxols	J. Blanch	Caimó, 32
Sant Llorenç Savall.	J. Roma.	
Sant Quirse de Besora	J. Fossas	Metge
Santa Coloma de Farnés.	J. Gener.	Verge Maria, 1, 2 ⁿ
St. ^a Perpetua de la Moguda.	«Kamparo»	
Selva del Camp	J. Girona	
Tarragona	D. Obiol	Unió, 9, 3 ^r
Terrassa.	A. Oliart	Clarís, 24
Tivissa	F. M. Brú	Avall, 16
Torelló	C. Viñolas.	Sant Josep, 14
Vendrell	F. Guitart	Plaça Dr. Murillo, 7
Vich	J. Comella.	Plaça Major, 18
Vilafranca del Penedès.	A. Robleño	Puigmoltó, 14
Vilanova i Geltrú	F. Mestres.	Sant Antoni, 1 i 3

P

KATALUNA ESPERANTISTO

CIUMONATA OFICIALA ORGANO

DE LA



JARO Va : APRILO 1914

UNIVERSALA ESPERANTIA BIBLIOTEKO		
2294	Interŝange	1917

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO DE «KATALUNA ESPERANTISTO»

<i>Direktoro</i>	FRED. PUJULÀ
<i>Redakcia sekretario</i>	JOSEP GRAU
<i>Redaktoro</i>	E. PELLICER
<i>Administristo</i>	JOAN PIFERRER
<i>Administraciaj sekretarioj</i>	{ MANUEL BORDAS JOAN HORTA

REDAKCIAJN KORESPONDAĴOJN SENDU AL REDAKCIA SEKRETARIO:
STRATO CARMÉ, 30 : BARCELONO

KORESPONDANTOJ

Enric Aguadé	Reus
Pere Solanas	Rubí
Josep Vidal	Tarragona
Marián Solà	Terrassa
Francisco Guitart	Vendrell
Josep Albagés	Vich

Ankoraŭ unu fojon ni petas la Prezidantojn de grupoj bonvolu
elekti en sia urbo korespondanton por KATALUNA ESPERANTISTO
laŭ la kondiĉoj aperintaj en la numero de Januaro, paĝo 13.

En la urboj, kie la 30^{an} de Majo korespondantoj ne estos elek-
titaj de la grupoj, la Redakcio mem elektos ilin.

KATALUNA ESPERANTISTO

ĈIUMONATA OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

SEN PAGA POR LA ĜEFEDERACIANOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
12, strato Gracia. — SABADELL
KATALUNUJO

Redakciajn korespondaĵojn bonvolu
sendi al «Redakcia Sekretario : strato,
Carme, 30; Barcelono».

NIA DEVIZO : « MARO ESTAS GUTARO »

ENHAVO : *Tra Germanujo*, Fred. Pujulà. — *Deka Universala Kongreso de Esperanto*, Th. Cart. — *Al sinjoro Ch. Brunet*, Fred. Pujulà. — *V^a Kongreso de la K. E. F.*, Josep Grau. — *Alilanda Movado*. — *Bibliografio*, Tamen, Malgrau. — *Enlanda Movado*. — *Oficiala parto*. — *Korespondado*.

Tra Germanujo¹

IV

MULTE mi povus rakonti pri Kolonjo, multe pri Magdeburgo, kiun ni vizitis ankaŭ, se mi volus raporti mil vojaĝajn anekdotojn tre interesajn... por mi mem. Mi ne falos en tiun tedigan abismon kaj mi tute ne postulas dankojn de l' legintoj tial ke mi ne trudas al ili rakontadon pri ĉiu detalo de nia vivado kaj priskribon pri ĉiu mirindaĵo nin miriginta, kaj sen ia ajn raporto al Esperanto. Ne por ili, sed por mi mem mi silentas tiajn aferojn eĉ riskante ke oni supozu ke ni vojaĝis kiel pakaĵo de mano al mano de samideanoj. Tiam, tamen, oni devos supozi ke la pakaĵo estis seka. Kaj tiu rimarko ne estas senutila post la pluvo de Fran-

1. *Sekvo*. Vidu antaŭajn numerojn.

kfurto, kaj en la urbo Kolonjo, kie en miaj du antaŭaj travojaĝoj, mi ricevis tiom da pluva akvo sur la korpo, ke ne nur mi ne povis viziti la urbon kaj devis resti admirante tro longatempe la internaĵojn de la Katedralo kaj Stacidomo, sed ankaŭ mi komencis nekompreni la kaŭzon de la kareco de la *Akvo de Kolonjo*, tiel malavare disverŝita de la nuboj kaj tiel seninterrompe. Tiun ĉi fojon la suno helis, kaj sen la klasika venteto, kiu fame ĉiam blovas sur la Katedrala placo, mi estus ofte demandinta, ĉu mi efektive troviĝas en Kolonjo, kiun mi nur konis kaj imagis sub pluvo kaj malsekeco.

Kolonjon bone nun mi konas kaj miaj geamikoj ankaŭ, dank'al la afableco de S-ro Junker, plej simpatia viro, kiu estas unu kaj ne la malplej fervora radio de la *Ora Rondeto*, kiun kun sinjoroj Diemer, Wilbert kaj aliaj, li subtenas, kun la esperanta parolo en la lipoj kaj la biera glasego en la mano.

Banalaĵo estus paroli pri la fratemo, kiun ni ĝuis inter ili. Neniu esperantisto tion nekonas. Afablecon ni renkontis en Kolonjo, ĝin ni retrovis en Magdeburgo kaj ĉie. Unu fojon por ĉiam ĝi estu dirita.

Miaj kunvojaĝantoj estis mirigitaj : por ili tio certe estis novaĵo. Gesinjoroj Cuatrecases insiste min demandadis, ĉu mi jam antaŭe konis tiajn komplezajn sinjorojn, kaj miris ke mi nenian rilaton antaŭhavis kun ili. Sed la efiko de nia lingvo montriĝis klare dum la vizito al kelkaj oficejoj, kie la miro de la germanaj oficistoj kuniĝis al tiu de miaj Katalunaj geamikoj, kiam ili interkompreniĝis kaj aranĝis negocojn pere de du homoj parolantaj esperante. Sama interpretado okazis en Magdeburgo, kie akompanataj de S-ro Gohring ni vizitis la fabrikejon Krupp, interparolis kun la inĝenieroj, stoike subskribis dokumenton ĉe la eniro renuncante al ĉiu rajto pri nia kara vivo,— kaj en aliaj oficejoj kaj fabrikejoj, kiujn ni vizitis kun sinjoroj Rockmann, Wotrich, kaj nia simpatia samideanino fraŭlino Margarete Küster. Kiaj agrablaj tagoj, tiuj pasigitaj en Magdeburgo — la vespero ĉe la varietea teatro kun la nomitaj Sinjoroj kaj iliaj respektindaj edzinoj, la seninterrompa tostado, la gajo de ĉiu kunveno, la malĝojo de la foriro!

Ni devas iri al Berlino. S-ro Rockmann prezentas min telegrafe al S-ro Schiff, kiun mi tre deziris persone koni. Per Esperanto ne nur certa kaj komforta loĝado, ne nur amikemo kaj afablemo ĉie, sed telegrafa prezentado... Eĉ kiam oni jam estas iom malnova esperantisto, oni nepre miras, kiel pro dek ses reguloj, kiuj povus esti skribitaj sur ungo, la mondo fariĝis tiel malvasta kiel ungo mem.

FRED. PUJULÁ

Deka Universala Kongreso de Esperanto

Paris, 2-10 Aŭgusto 1914

DOTELOJ. — La Komitato sukcesis ricevi tre malkaran dormejon por *sinjorinoj* aŭ *fraŭlinoj*. Ĝi enhavas 4 ĉambregojn po 20 litoj, do sume 80 litojn. La prezo estas por la nokto kun la matenmanĝo (teo, ĉokolado aŭ kafo) fr. 1,50. Se oni deziras viandon en la matenmanĝo, oni pagas ĝin krome. Ni devas aldoni, ke tiu dormejo ne sidas proksime de la Kongresejo, sed la tempo necesa por iri per tramvojo de unu al la alia estas nur 25 minutoj.

Oni rezervigu al si *jam de nun* unu liton, aŭ pli, en tiu dormejo, ĉar nur la 80 unuaj mendintinoj estos kontentigitaj. Direktu la petojn al la Organiza Komitato.

BLINDULA KONGRESO : ALVOKO

Permesu, karaj legantoj, ke mi ree turnu min al vi kun arda alvoko por la blinduloj.

Vi scias, kiel grava ŝajnas al mi tiu ĉi demando ne nur el problindula vidpunkto, sed ankaŭ el nia pure esperanta.

Mia konvinko estas, ke, kiam oni konstatos la praktike grandan utilecon alportatan de internacia lingvo al la tutmonda blindularo, oni ne plu povos nei ĝian utilecon por ĉiuj ajn homoj ankaŭ.

Tiun pruvon, sur la blindula kampo, mi tre dezirus montri fakte dum nia Deka Kongreso, en Parizo.

Sed ebla ĝi estos nur, se ĉiuj helpos al mi laŭ sia povo kaj forto.

Jam la franca Ministro de Internaj Aferoj bonvolis pruntedoni al ni senpage por la geblinduloj dormoĉambregojn en la *Nacia Instituto por junaj geblinduloj*.

Aliajn ĉambregojn ili havos por siaj laborkunsidoj, en kiuj ili diskutos ne la lingvon, ho ne! sed la praktikajn aferojn, kiuj ilin koncernas : enkonduko de Esperanto en iliajn lernejojn, blindulkribilaroj, internacia biblioteko, rabatoj por la poŝtsendado de puntreliefaj libroj, masaĝlernejoj, k. t. p.

Pri la nutrado dum la Kongreso ni zorgis, kaj ĝi ankaŭ nenion kostos al niaj blindaj samideanoj.

Sur la francaj fervojoj, kiel ĉiuj kongresanoj, ili havos gravan rabaton, kaj de tiu ĉi flanko ankaŭ por ili ne tro granda estos la elspezo.

Fine la Kongresa Komitato konsentas al la neriĉaj inter ili, kiel jam okazis en Cambrigde, diversajn tute ŝatindajn donacojn.

Aliparte oni nun organizas en Parizo grandan komitaton de Sinjorinoj, Esperantistinoj aŭ simple blindulamikinoj, el plej altaj kiel modestaj klasoj, sub espereble eminenta patronado, kies celo estos alporti iom da distraĵo, da ĝojo, da tutmonda lumo, al la geblinduloj pere de nia kara internacia lingvo.¹

Tion nun mi petas de vi, amikoj, ke, se eble, vi starigu en via lando, en via urbo, en via grupo, samajn komitatojn, turnante vin ne nur al la koro kaj bonfaremo de l'Esperantistinoj, sed al tiu de ĉiuj blindamikinoj, de ĉiuj virinoj.

Kun ilia helpo vi sukcesos sendube altiri la ĝeneralan atenton kaj ĝeneralan simpatian sur niajn esperantistajn blindulojn, — plej grava profito ne nur por la blindularo, sed ankaŭ por Esperanto, — kaj vi plie trovos rimedon por sendi Parizon lertan, Esperante bone parolantan blindulon, kiun vi povos preni kun vi, kaj al kiu ĉiumaniere vi povos faciligi la veturadon. Tute necese estas, por ke utila kaj konvinka estu nia blindula kongreso, ke sufiĉe multaj, diverslandaj kaj elokventaj estu la en ĝi partoprenantoj.

Ne rifuzu, amikoj, vian kunlaboradon al la Blankbarbulo kaj pardonu lian certe ne tro oftan insistemon.

TH. CART

P.-S. — Sciigojn donos tre volonte : por *Anglujo*, S-ro Adams, Plynlimon Terrace, Hastings; S-ro P. O. Merrick, Elvetham, Shep-

1. *Protekta Komitato de Esperantistaj Blinduloj.* — 1) Okaze de l'internacia Kongreso de Esperantistaj Blinduloj, kiu havos lokon en Parizo dum Aŭgusto 1914, estas fondita Protekta Komitato de Esperantistaj Blinduloj.

2) La celo de tiu ĉi Komitato estas faciligi al la Blinduloj la lernadon de *Esperanto*, kiu havigas al ili altvaloran distraĵon, alportas al ili grandan ĝojon, plivastigante ilian horizonton ĝis la blinduloj de plej malproksimaj landoj kaj, jam nun, faras al ili grandan servon, tial ke, dank' al ĝi, ili povas per reciprokaj sciigoj kunlabori internacie por la plibonigado de sia sorto.

3) La Komitato konsistas nur el protektantaj sinjorinoj, de kiuj oni petas antaŭ ĉio kaj precipe la moralan apogon de ilia nomo kaj de ilia simpatio.

4) La titolo de *Protektantino* kunportas kun si neniun kotizaĵon, nek ian ajn specialan devon, se ne, ke oni interesiĝu al la progreso de Esperanto en la tiel kortuŝanta mondo de la Blinduloj.

5) Tiun ĉi progreson oni konigos al la protektantaj sinjorinoj per paroladoj aŭ cirkuleroj.

La helpa Sekretariino:

MARIE LARROCHE

55, rue de Vaugirard (Paris)

La Sekretario:

TH. CART

12, rue Souffiot (Paris)

perton; por *Belgujo*, Frato Isidore, Woluwe-Bruxelles; por *Bohemujo*, Prof. Wulff, Nyhavn, 34, Kopenhago; por *Germanujo*, Gesinjoroj Zapater-de-Chalmot, Neue Mastrichterstr. 15, Koln; por *Rumanujo*, S-ro Prezenti Levi, Vatra Luminoasa, Bukarest; por *Svedujo*, S-ro H. Thilander, 12, Majorsgatan, Stockholm.



AL SINJORO CH. BRUNET

Nia distinginda amiko S-ro de Ménil, publikigis en la aprila numero de *La Revuo*, kiun li direktas, belegan versaron «Festo ĉe la violoj» verkitan de S-ro Ch. Brunet el Bordeaux kaj dediĉitan al la katalunaj samideanoj, al fraŭlinoj E. kaj T. Rosell, kaj al mi mem. La versoj estas rimitaj laŭ la maniero de Manel de Cabanyes uzita de niaj laŭreatinoj en sia nun fama verko «Vi kial ne venas!» Al sinjoro direktoro de «La Revuo» kies amikeco al katalunoj estas konita, ni silentas nian dankon ĉar li bone scias kiom multe li estas amata de ni ĉiuj. Al S-ro Brunet kun kiu ni ankoraŭ ne havis okazon konatiĝi, ni devas ion pli diri, por ke oni ne juĝu nian silenton sendankemo. En mia propra nomo, en la nomo de fraŭlinoj Rosell, kaj en tiu de la katalunaj samideanoj, mi prezentas publike al li nian profundan dankon pro lia delikata afableco dediĉi al ni sian poeziplenan rimorican verkon, kie la rimoj modeste sin kaŝas kiel humilaj *violoj* en la floraro de la versoj. Kaj ni gratulas lin, kiu per tia belaĵo montris artistan talenton, kiu helpas efike al popularigo de tiu formo de li tiel bone komprenita.

Ni estas tre fieraj pro tiu dediĉo, sed pli ankoraŭ pro la verko mem, ĉar ĝi montras al ni ke niaj *Floraj Ludoj* estas efikaj, kaj ke nia pacienca laborado ne estas vana kaj senutila. Niaj katalunaj gesamideanoj certe trovos kompenson al ĉiu peno kaj klopodo en la simpatio de S-ro Brunet kaj en la beleco de lia verko.

FRED. PUJULÀ



V^a Kongreso de la K. E. F.

LA federacianoj certe memoras la amuzan kuntrinkon, kiun la okulvitruloj esperantistoj faris dum nia lasta kongreso en Olot; ĝi ja ne estis el la malplej interesaj aferoj de la festo, kaj akiris gravecon tute ne atenditan, kiam S-ro Pujulà, kortuŝita de l' sorto de la kuntrinkantoj, kiuj senhelpe restis sub ties pezo, faris dediĉon al ili de la sprita *himno* publikigita en niaj paĝoj. La nunan jaron la kuntrinko de okulvitraj kongresanoj antaŭ la oficiala festeno fariĝos protokola festo, kaj mi scias — kaj rapidas tion trumpeti, por ke ĉiu ŝirmu siajn orelojn — ke kelkaj el ili decidintaj konstatiĝi por posta pripostulo la klasrajtojn donis la himnon al originala komponisto, kiu ĝin enmuzikigos. Ho, ve! Mi timas, ke senagorda kantado de l' preskaŭ-blinduloj instigos la kunkongresanojn aŭ propramove almozdoni, aŭ surmeti *orelvitrojn* nepre *nigrajn*, por kontraŭbatali la *helecon* de l' ĝena kantado!

La Organiza Komitato eldonos serion de koloraj poŝtkartoj kun bildoj el la kongresurbo, kiujn espereble la kongresanoj prefere aĉetos por helpi la financan aranĝon de l' Kongreso, kiu sola profitos el tiu vendado. La beleco de la urbo Sant Feliu — pri kiu niaj amikoj povos juĝi, helpe de la suplemento kun gravuraĵoj aperonta en la maja numero de KATALUNA ESPERANTISTO — supozigas, ke la esperantistoj volos konservi pri ĝi belajn memoraĵojn, kiaj estos la bildkartoj, kiujn la Organiza Komitato eldonos kaj kiujn jam de nun la federacianoj povas mendii de ĝi.

Por faciligi la veturadon al la urbo de nia V^a Kongreso, la Komitato klopodas ricevi de la fervojkompanioj specialan rabaton por ĉiuj kongresanoj, kiun certe ĝi atingos. Se tio okazos, en nia numero de Majo la federacianoj trovos la karton por la fervoja rabato, krom la insignoj de kongresano, la bildoj kaj la priskribo el St. Feliu kaj la hortabeloj de vagonaroj kaj veturiloj kaj prezaro de la hoteloj, kiujn ankaŭ per ĝi ni publikigos.

JOSEP GRAU



ALILANDA MOVADO

EL ARGENTINA RESPUBLIKO

En la granda urbo Rosario de Sta. Fe nia afero lasttempe progresegis dank' al forta laborado de nia kataluna samideano S-ro Santiago Gomis. Li faris kursojn, paroladojn, ĵurnalajn artikolojn, ktp. kaj li venkis ĉiajn barojn. Lastmomente efike kelpis lin S-roj Manuel Casas, Francisco Llusá, J. Cancho kaj aliaj.

La 15^{an} Februaro okazis grava paroladara festo por inaŭguri la Oficialan Esperantistan Klubon en Argentinujo, kies sidejo troviĝas en Rosario de Santa Fe (strato Sta. Fe 1647). La membroj de ĝia Komitato jen estas : S-ro Santiago Gomis, *prezidanto*; S-roj Francisco Llusá, J. Adrián kaj L. Reinás, *voĉdonantoj*; kaj S-ro J. Cancho, *sekretario*. Plie, estas fondita Konsulta Komitato konsistanta el S-ro Delfí Dalmau (en Bahía Blanca), *prezidanto*; kaj S-roj Julián Merino, Erasto Piñero kaj Emiliano Alonso (en Berabevú), *sekretarioj*. En la nomita festo elokvente paroladis pri Esperanto kaj Esperantismo S-roj Gomis, Aprie, Orriols kaj Suárez. Kaj oni legis entuziasmajn komunikajojn senditajn de S-ro Torres (en Acebal), S-roj Merino, Alonso kaj Piñero (en Berabevú), S-ro Muñoz (en Montevideo), S-ro Delfí Dalmau (en Bahía Blanca).

En Bahía Blanca la ĵurnaloj ofte sciigas pri Esperanto kaj mi ĵus komencis kurson. — DELFÍ DALMAU.

EL GERMANUJO

La «Internacia ekspozicio de libroindustrio kaj grafikaj artoj» havos lokon dum 1914 en la germana grandurbo Leipzig, la centro de la librokomerco. Dank' al la monoferoj de multaj gesamideanoj, dank' al la penadoj de la Saksa Esperanto-Instituto troviĝos ĉe la «strato de la nacioj» apud la pavilonoj de la diversaj nacioj ankaŭ *Esperanto-Pavilono* enhavonta ĉion, kio rilatas al la esperanta movado. Kvankam la efektivigo de la esperanta pavilono estas nun certa, ni tamen denove petas :

HELPU PER MONDONACOJ, por ke la pavilono fariĝu granda, efikega propagandilo, inda al nia afero. Ju pli da mono por la pavilono kaj ĝia enhavo, des pli granda la tutmonda sukceso. Ankaŭ malgrandaj

monsumoj, eĉ respondkuponoj, estas danke akceptataj. Kiel pri la ĝisnunaj monsendaĵoj (pli ol 3000 markoj) la Saksa Esperanto-Instituto kvitancos estonte en «Ĉirkaŭ la Mondo». La nomita instituto, substaranta al la ministerio de la internaj aferoj, prizorgas la aranĝon kaj organizadon de tiu gravega afero, kiu estas kapabla, havigi al la esperanta movado grandegan kaj rapidan sukceson, ĉar multaj miloj da ĉiunaciaj vizitontoj vidos, ke Esperanto jam nun estas grava faktoro de la moderna kulturo. Ĉu pli bona propagando estas ebla?

Por ke la pavilono enhavu ĉion valoran por Esperanto, ni bezonas gehelpantojn, kiuj sendas al ni tion, kio estas efika kaj valora por nia ekspozicio. Esperanta literaturo, gazetoj, bildoj de eksterlandaj grupoj, esperantaj propagandiloj, poŝtkartoj, sigelmorkoj k. t. p. estas tre dezirataj. Precipe ni petas pri *gvidfolioj kaj gvidlibroj*, kiuj estas almetotaj en aparta loko de la ekspozicio. Tial ni petas: HELPU SENDANTE MATERIALON ELMETOTAN!

Antaŭ ĉio la Saksa Esperanto-Instituto intencas propagandi per *vera statistika materialo*. La Instituto volas desegnigi mondkartojn, kiuj tre videble enhavos la urbojn kaj lokojn, kie troviĝas esperantaj grupoj. Krom tio la instituto aldonos plej kompletan jarlibron. La ĝisnuna materialo estis tre duba. Tial ni petas ĉiujn gesamideanojn precipe ĉiujn grupestrojn, ke ili sendu al ni tuj la deziritajn respondojn. Ankaŭ por aliaj statistikaj aŭ alispecaj sciigoj ni tre dankas. *La grupoj ne respondintaj estos troveblaj nek en la jarlibro, nek sur la mondkartoj.* HELPU SENDANTE STATISTIKAN MATERIALON!

Plue la Saksa Esperanto-Instituto havas la mendon de *kelkaj registaroj*, kolekti por alia parto de la mondekspozicio *ĉiuspecajn reklamafiŝojn* (ne nur esperantajn!) el la diversaj landoj; ĉi tiu risorto montru la diversajn reklammanierojn de la popoloj. Ĉar oni ne sciis, kiamaniere ricevi tiajn afiŝojn, oni petis la Esperanto-Instituton pri tio. Nun ni esperantistoj havas okazon, pruvi, ke jam nun nia lingvo estas praktike utila. Tial ni petas ĉiujn gesamideanojn, kiuj ekkonis la gravecon de tiu afero: HELPU SENDANTE ĈIUSPECAJN REKLAMAFIŜOJN, por ke tiu elmontro, super kiu oni legos la vortojn «*kolektita per Esperanto*» estu kiel eble plej kompleta. En la festhalo de la ekspozicio okazos la Germana Esperanto-Kongreso dum la pentekostaj tagoj.

Karaj gesamideanoj! Helpu! Respondu tuj! Ne prokrastu! Ĉiu helpo estas dankege akceptata. — Saksa Esperanto-Instituto, Leipzig, Dolzserstr. 1 (Germanujo). — D-ro Schramm.

— *Ekspozicio de la pedagogia gazetaro tutmonda* la unuan fojon estas okazonta en la fako «lernejo kaj libroindustrio de la Internacia Ekspozicio de libroindustrio kaj Grafiko» en Leipzig. Pripensante, ke sole en Germana lingvo eldoniĝas proksimume 450 pedagogiaj gazetoj kaj ĵurnaloj plej diversspecaj, oni certe povas esperi, ke, se partoprenos ĉiuj nacioj, tre interesa kaj instrua entrepreno prezentigos. Por konsideri ankaŭ la historian vidpunkton, karakterizaj ekzemploj el la evolucio de la pedagogia gazetaro, ĉu originaloj ĉu reproduktaĵoj, estas elmétotaj. Oni klopodos, ekspozicii numerojn, kiuj enhavas historie gravajn artikolojn aŭ paroladojn de eminentaj pedagogoj de l'estinteco. Detale oni per apartaj grupigoj montros la intensan multspeciĝon de la pedagogia gazetaro : ĵurnaloj, kiuj speciale servas al virina instruado, propagandas la ideon de l' laborinstruado, celas iun apartan fakon de l'instruado ktp., estos kunmetataj. La pedagogia gazetaro negermana estos ordigita laŭ landoj. Per tabeloj kaj desegnaĵoj, oni provos montri statistikon pri nombro, grupigo, disvastiĝo, evolucio k. t. p. de la pedagogia gazetaro. Fine estos ekspoziciata la literaturo, kiu sin okupas pri la pedagogia gazetaro, ĉu laŭ historia aŭ bibliografia vidpunkto, ĉu alimaniere. Kunlaborado, alsendo de ekzempleroj kaj de alia materialo, precipe informoj pri eksterlandaj pedagogiaj ĵurnaloj, rilate iliajn titolon kaj eldonejon estas insiste petataj. Pri la aranĝo de la supre citita fako de l'ekspozicio estas komisiita instruisto kaj redaktoro Max Doring, Uhlandstr. 29 II; *Leipzig* (Germanujo).

EL BELGUJO

La Federacio de la Bruselaj grupoj esperantistaj havas la plezuron sciigi, ke la «Senpaga informoficejo» starigita sub la patronado de la komunuma administracio el Bruselo, kaj lokata 19, passage du Nord, estas sub la dispono de ĉiuj gesamideanoj, kiuj vizitante la belan, interesplenan belgan ĉefurbon, deziras iajn ajn informojn (adresoj por loĝado, pensiono, vidindaĵoj, k. t. p.)



BIBLIOGRAFIO

ALKVESTO PRI EVOLUADO DE ESPERANTO KIEL LINGVO VIVANTA
V. V. Tiĥomirov. Doktoro en Medicino. — Moskvo. 1914.

La unua vorto de la titolo montras sufiĉe la karakteron de la verko. En la teskto, krom frenezaj modifoj ni renkontas la plej komikajn proponojn. La aŭtoro ne nur deziras, ke ni enkonduku ekzemple la vorton *amara* (!), sed li klarigas aliajn per klarigoj, kiuj revigis nin: ekz : *biedo - malhoror. Malhoror!*... Kion li dirus se ni proponus *triedo - malminuto*? Oni vidas per aliaj proponoj, ke S-ro Tiĥomirov lernis latinan lingvon, kaj li deziras profiti la uzitan tempon.

Mi ne juĝos lin. Kiam unu fervora samideano bonfide verkas literaturaĵon kaj eraras pri vorto aŭ sintakso, ni ne mortkondamnas lin, ĉar ni ne rajtas; sed ni rigore uzas kontraŭ lin la plej akrajn vortojn, en la limoj de l' bonkonduto. S-ro Tiĥomirov ne devas esperi ke ni estos kontraŭ li malpli nek egale severaj. Ni estos multe pli. Ĉar imago ne mankas al li — li tion pruvis per sia akuŝaĵo — bonvolu elpensi la plej akrajn vortojn. Ilin al li ni dediĉas eĉ kun lia ortografio kaj leksikono. Ni finas bedaŭrante ke ni perdis tempon legante lian sensecaĵon.

PRI SOLIDARECO INTER ESPERANTISTOJ. A. Nedoŝivin. Traduko de B. Kotzin. Kovno. Ruslando. Eldono de Kovna Esperantista Societo. Prezo 10 sd. 1913 (Presejo de Sokolovskij kaj Ko. Kovno) (La rusa teksto : 25 sd.)

Tre interesa raporto farita en rusa lingvo dum la jara kunveno de Kovna Esperantista Societo en Aprilo de la pasinta jaro, por montri al la ne esperantistoj, kia estas kaj de kio venas la solidareco inter la partianoj de lingvo internacia. S-ro Kotzin bone tradukis.

Mi ne povas aprobi la frazon de S-ro Nedoŝivin, kiam, ĉe la fino, sin turnante al la samideanoj diras : «vin subtenu la konscio, ke vi faras grandan kulturan kaj kristanan aferon, portontan al la tuta homaro utilon kaj feliĉon. Jena estu nia solidareco». Mi ne scias, kion komprenas S-ro Nedoŝivin per la adjektivo *kristana*, sed se li volas esprimi amajn kvalitojn mi timas, ke ne ĉiu homo bone komprenos, kaj ke hebreoj, mahometanoj, japanoj, hindoj, kaj ceteraj, kaj ĉiuj

apartenantaj al neni religio, kaj tamen esperantistoj, havos dubon pri tia solidareco. S-ro N. povas tuj vidi la tro metaforan karakteron de sia esprimo, anstataŭante la vorton *kristana* ekzemple per *budana*. Ne nur de la neŭtrala vidipunkto, sed ankaŭ de la leksikona la esprimo estas erara.

TAMEN

HISTORIO KAJ TEORIO DE IDO, kun antaŭparolo de R. Brandt. — B. Kotzin, 1913. — Librejo «Esperanto» Moskvo, Lubjanskij projezd, 3. Prezo 50 kop. Sm. o'53.

Feliĉe oni ne povas kulpigi nin, ke ni partoprenas en la *konspiro de silento* kun kiu ne konsentas S-ro Kotzin. Ido ne migris inter nin; tial la interesa kaj per bona Esperanto verkita *Historio kaj Teorio* nuntempe ne povas taŭgi al ni por kontraŭbatali la partianojn de Esperanto kripligita. Kaj ni deziras, kaj certe sinjoro K. kun ni, ke ni neniam estu devigataj uzi la bonajn argumentojn, kiujn la vere enciklopedia libro havigas.

SOLECAJ ANIMOJ, (Esp. teatro n.º 1) unuakta gajaĵo; el Homunkulus, tradukis Oskar Süßmann. — Prezo Sm. o'10. — Egera presejo en Eger, Hungarlando. 1913.

Simpla epizodo prezentita per kvar personoj en kvin scenoj vige verkitaj, ĝenerale bone tradukitaj. Ni ne komprenas tamen kial la tradukinto esperantigis la nomon Max, ne farante same kun Fritz; ankaŭ ni rimarkis uzon de Asra aŭ Asro, sendistinge. Nia opinie estas pli bone, aŭ alpreni finiĝojn esperantajn por *ĉiuj* propraj nomoj, aŭ lasi ilin en natura formo, ol uzi intermiksita nomojn en esperanto kaj en natura lingvo. Ni devas laŭdi la eldonan firmon por ĝia intenco havigi al ni serion de mallongaj esperantaj teatraĵoj facile ludeblaj en esperantistaj kunvenoj.

MALGRAU



ENLANDA MOVADO

S-ro Lluís Governado, nia bona amiko kaj kunfederaciano el la barcelona grupo *Semo*, mortis. Pace ripozu!

Al lia familio ni prezentas en la nomo de l' tuta samideanaro sinceran kondolencon.

VENDRELL

S-ro S. Esvertit, la delegito de K. E. F. en tiu urbo forveturis el nia lando, kaj tial ŝanĝiĝis la Komitato de la grupo *Frateco*, kiu konsistas el la jenaj sinjoroj : *Prezidanto*, Joan Martorell; *Sekretario*, Francisco Guitart; *Kasisto*, Pere Esvertit; *Bibliotekisto*, Pere Bonsoms.

La nova delegito estas S-ro Francisco Guitart, Pl. Dr. Murillo, 7.

TERRASSA

La 12^{an} de Aprilo multaj el la grupanoj de *Lumon* iris matene al la stacidomo, atendi la barcelonajn samideanojn ekskursantajn al nia urbo kaj al Rubí. Je la oka kaj duono alveturis la vagonaro kaj vidiĝis tuj sur la kajo la bela standardo de *Barcelona Stelo* sub kies faldoj ariĝis kvardeko da esperantistoj, kiujn bonakceptis la enurbaj verdstelanoj. Manifestacie la esperantistoj iris al la sidejo de *Lumon*, kie nome de la grupo bonvenis la ekskursantojn per elokventaj vortoj S-ro Solà, al kiu respondis por la barcelonanoj S-ro Grau.

Vizitinte la kunvenejon kaj la belan teatreton aranĝitan de la terrassa'aj grupanoj, ĉiuj marŝis al la preĝejoj de Sankta Petro, kiuj estis detale vizitataj sub la direkto de sinjoro paroĥestro kaj de nia inteligenta samideano S-ro Bassó. La antikvaj — el V^a jarcento — romartaj konstruaĵoj, kies arĥeologian riĉecon oni admiris, tre plaĉis al la vizitantoj, kiuj poste trairis la urbon kaj vidis kelkajn el ĝiaj interesajoj.

Je la 11^a, granda grupo el 70 gesamideanoj, kiujn antaŭiris la standardoj de *Lumon* kaj *Barcelona Stelo*, ekmarŝis al Rubí, kaj faris dumvoje efikan propagandon, disdonante flugfoliojn, reklamilojn esperantajn, k. t. p.

En Rubí okazis la festoj raportataj aliloke; kaj partopreninte en

ili kaj adiaŭinte la barcelonajn amikojn, la geanoj de *Lumon* reveturis hejmen je la 8^a vespere tre kuraĝigitaj de la bela propagando farita.

RUBÍ

La tuta grupanaro de *Esperanta Burĝono* kun multaj amikoj kaj sinjoro Benigno de Luna speciale invitita de la prezidanto de *B. S.* atendis ĉe la limo de l' vilaĝo la alvenon de la samideanoj de Terrassa kaj Barcelona, kiuj jam de malproksime salutis per la flagoj la atendantojn.

Post reciprokaj prezentoj kaj salutoj la amaso de pli ol cent personoj eniris en la vilaĝon, sur kies stratoj oni rigardis scivoleme la esperantistojn, kiuj iras al la kunveno de *Esperanta Burĝono*. La paso de tiu nombro da personoj tra vilaĝo el 4000 loĝantoj vekis tuj interesecon kaj antaŭpromesis efikon rimarkindan.

En la grupejo S-ro Solanas, prezidanto de *E. B.* donis la bonvenon al la alvenintoj, kiuj per la prezidanto de *B. S.* dankis la afablan akcepton.

Kaj ĉar estas jam tagmezo oni iris al la salono apud la teatro Doménech, kie estis preparita la manĝotablo por la anoncita festeno.

81 personoj sidiĝis al la tablo, kies prezidejon okupis la prezidanto de *Lumon* S-ro Alavedra, F-no Cortés, S-ro de Luna prezidanto de *Frateco* el Zaragoza, F-no Puig, S-ro Grau prezidanto de *Barcelona Stelo*, F-no Rey, la provizora prezidanto de la *K. E. F.* S-ro Rey, F-no Sicart, S-ro Solanas prezidanto de *Esperanta Burĝono* kaj S-ro Serrat.

La menuo, konsistanta el fiŝa rizo, bovidaĵo, fritita merlango, rostita kokido, desertoj, kafo, estis tre bone servita, meze de la bruo kaj ĝojo de l' kumnangantaro, komentaria la sukceson de la festo.

Ĉe la deserto S-ro Grau proponis ekspedi al D-ro Zamenhof la jenan telegramon, kiu vekis ovacion entuziasman : «Nome de *Barcelona Stelo*, *Lumon* (Terrassa), *Frateco* (Zaragoza), *Burĝono* (Rubí) festenantaj en Rubí salutas Majstron : Grau, Alavedra, Luna, Solanas.»

La tostojn komencis S-ro Ventura, el Terrassa, per bela parolo en esperanto, salutante la naskiĝon de la *Barcelona Esperantista Societo* kaj dezirante al ĝi por bono de Esperanto grandan sukceson. S-ro Solanas, el Rubí, katalune eldiris la dankon de la *Burĝonanoj* por la festo okazanta, kiu forviŝos el iliaj samvilaĝanoj rememoron pri okazinta sensukcesa esperantista ekskurso, kiu faris baron al efiko de la propagando. S-ro Luna, el Zaragoza, kastile parolis kaj el-

montris sian entuziasmon, renovigitan de la kuraĝiga festo, en kiu li kun plej granda ĝojo partoprenas. En la nomo de la aragonaj samideanoj salutis la katalunajn kaj esprimis sian deziron, ke nia lingvo sukcesu inter liaj samregionanoj, tiel multe kiel ĉe ni. S-ro Serrat el Barcelona deklaris, ke li nenion scias diri kaj promesis pli longan paroladon por la propagando farota posttagmeze. S-ro Rey en la nomo de la *Kataluna Esperantista Federacio* gratulis la partoprenantojn kaj deziris, ke similaj festoj estu pli oftaj por la plej bona prospero de nia agado. La parolintoj, kiujn aplaŭdoj salutis, aŭdis ankaŭ brujajn aplaŭdadojn post siaj elokventaj tostoĵ.

S-ro Grau, unue dankis kiel prezidanto de *B. S.* la helpon de ĉiuj al la bona sukceso, salutis ĝentile la multajn belajn fraŭlinojn, kiuj faras rava la feston, kaj parolis poste per trafaj esprimoj pri la tasko farinda de la *B. E. S.*-anoj, kiujn li kuraĝigis al obstina laboro, por montri klarvidige, ke nur per la kuniga kaj fratiga forto de Esperanto estas eble starigi super la emo al personismo de katalunoj organizaciojn inspiratajn de malegoismaj celoj, kiuj devas ilin fari superaj al la malaltaj pasioj kaj malvirtoj, manĝetantaj ĉiun socian movadon. Diris, ke li havas esperon al la entuziasmo de la samideanoj alestantaj, kiujn li stimulis subteni konstantan propagandon por konstati, ke ne nur Esperanto utilas ĉe materialaj aferoj, sed ankaŭ ke ĝi bonefikas en la perfektigo de l'moralaj kvalitoj.

Lia esperanta parolo flamigis la aŭskultantaron, kiu starante aplaŭdis la noblajn ideojn elmontritajn.

Post la festeno oni rapidis al la teatro Domenech, kiun jam plenigas la publiko dezirema aŭskulti la oratorojn. La prezidanto de *E. B.* cedas la prezidan lokon al S-ro Rey, kiu donas la parolon al S-ro Alavedra.

Tiu diras belajn vortojn pri la neceseco disvastigi Esperanton, kaj sin turnante al la esperantistoj speciale, admonis ilin aliĝi al la *K. E. F.* por kontribui al la subteno de tiu organizaĵo, kiu per nur sia ekzisto estas jam pruvo de l' forto de la kataluna samideanaro.

S-ro Serrat, kies bonhumoron ĉiu konas, duonserioze kaj ŝerce parolis pri gravaj aferoj kaj elokvente esprimis la valoron kaj utilecon de nia lingvo kaj la multajn profitojn, kiujn la homoj ricevos el la enkonduko de internacia lingvo, kia Esperanto. Li sciis tiel multe sin komprenigi de la aŭskultantaro, ke multfoje ĝia aplaŭdado interrompis lin, kaj ĉe la fino de lia parolado bruis tre forte.

S-ro Grau, salutis ĉiujn nome de S-ro Pujulà, kiu neforlaseblaj familiaj aferoj restigis hejme, kaj parolis pri la socia forto de Esperantismo, kiun ĉiujare vidigas ĝiaj Universalaj Kongresoj. Analizis,

kial Esperanto estas necesa, kaj komentariante la aluditajn Kongresojn, sin tenis kelkatempe ĉe la kvina kaj montris kiom multe Barcelono ŝuldas al la esperantistoj, kiuj disportis tra la mondo justan famon pri ĝi, kiun okazintaĵoj malfeliĉaj estis malbonigintaj. Diris kelke da vortoj pri la X^a Kongreso okazonta en Parizo kaj invitis ĉiujn fariĝi gutoj de l' maro Esperantismo, kies forton kreskigas eĉ plej humilaj alvarbitoj. La aplaŭdoj dediĉitaj al la oratoro, kuniĝis al tiuj de saluto al S-ro Rey, kiu faris resumon kaj finis la feston.

La oratoroj iris poste saluti la aŭtoritatulojn, kiuj venis aŭskulti ilin, kaj dankis la vilaĝestron por la akcepto farita de liaj regatoj al la esperantistoj.

Ĉe salono de la Kazino la ekskursantoj partoprenis en la balo al ili dediĉita, kaj fine ili disiris ĝojaj pro la farita tasko. La barcelonaj amikoj forveturis per duradaj veturiloj al Papiol, de kie vagonaro portis ilin al Barcelono. La samideanoj el Terrassa restis pli longtempe ĉe ni kaj je la 8^a vespere ili reveturis hejmen.

Esperanta Burĝono presigis kaj disdonis prospektojn pri la oratoroj, kiuj venigis al la paroladejo pli ol 500 personoj, inter kiuj estis disdonitaj propagandaj markoj, flugfolioj, programoj de esperantistaj festoj, k. t. p. La efekto de l'tuta propagando estis tre bona inter nia loĝantaro, kaj certe nia grupo prosperos ankaŭ bone.

KATALUNA ESPERANTISTO esprimas sian koran dankon al la barcelonaj ĵurnaloj *El Día Gráfico* kaj *La Publicidad*, kiuj publikigis fotografaĵojn kaj raportojn pri la festoj de Rubí.



SAMIDEANOJ:

Aĉetu kaj aĉetigu la propagandajn markojn eldonitajn de la KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO. Vi prosperigos nian aferon!

100 ekz. = 1 peseto

S-RO ADRIÀ GUAL KAJ ESPERANTO

Ĉiu konas bone la aŭtoron de *Mistero de Doloro* ludita dum la 5^a Int. Kongreso. S-ro Gual estas fatale esperantisto kaj esperanteca. Li direktos la aktoraron, kiu ludos *Georgo Dandin* dum la 10^a en Parizo. Sed, ekster la aferoj pure Esperantistaj, li ankaŭ iel montras eĉ nevole kontaktajn punktojn kun nia movado. Jen ekzemple.

Li estis nomita direktoro de la ĵus fondita teatro *Auditorium* en Barcelono. La unua verko, kiun li prezentis, estis verko lia, do, verko de aŭtoro ludita dum la 5^a Kongreso. La dua verko prezentita estis *Ifigenio en Taŭrido*, ludita dum la 4^a en Dresdeno. Poste li prezentis *Misteron de Doloro*, kaj fine *Kaalje'* on la verkon de la 7^a en Antverpeno. La teatro *Auditorium* de Adrià Gual ŝajnas kataluna ĉo de la kongresaj teatraj prezentadoj!

Oficiala parto

Okazis kunsido de la Komitato ĉe la sekretario, la 2^{an} de Aprilo kun ĉeesto de Sinjoroj Rey, Horta kaj Bordas.

Krom aliaj, oni prenis la jenajn decidojn.

Aprobi la programon de festoj okazontaj dum nia Kongreso en S. Feliu, kaj lasi en la absoluta libereco la Organizan Komitaton, pri la konstruo de arko aŭ okazigi feston de grekaj dancoj. El ambaŭ festoj ni akceptos tiun, kiun la O. K. konsideros pli efika aŭ sukcespova.

Doni permeson al S-ro Amades, kiu petas ĝin de tiu-ĉi Komitato, por ke li povu eldoni markojn pri niaj Floraj Ludoj, nia Kongreso kaj K. E. F.; sed, kondiĉe ke li havos la afablecon montri al ni la desegnaĵon, antaŭ ol eldoni la markojn. — *Manuel Bordas, Sekretario.*

KORESPONDADO

S-ro E. P. Reus. Jes, ĉiam volonte al via servo. — S-ro A. D. Barcelono. Ŝajne ni estas nun sur bona vojo. — S-ro J. C. Turnu vin al la Esperantista Centra Oficejo.

AVÍS D'ADMINISTRACIÓ

Per a evitar envíos repetits dels exemplars del KATALUNA ESPERANTISTO, preguem a tots els federats que, en cas de canviar de domicili, se serveixin comunicar a l'Administració de la K. E. F. la nova adreça.

Així mateix fem present a tots els que vulguin donar-se de baixa, l'obligació que tenen, al comunicar aquella, de retornar tots els números rebuts

**La V Kongreso
de la Kataluna
Esperantista
Federacio okazos
en Sant Feliu de Guíxols
la 28-29 de Junio 1914**

SAMIDEANOJ, ĈEESTU!

SUKCESIGU LA JARFESTON DE NIA FE-
DERACIO!

KE ĜI ESTU INDA JE LA ANTAŬAJ!

KATALUNA ESPERANTISTO

ĈIUMONATA OFICIALA ORGANO

DE LA



JARO Va : MAJO 1914

Reglament de la

Federació Catalana d'Esperantistes

Article primer. — Queda constituïda amb el nom de «Federació Catalana d'Esperantistes» la federació d'esperantistes en terres de llengua catalana.

Art. segon. — L'objecte de la «F. C. d'E.» es l'unió de tots els esperantistes en terres de llengua catalana per a la divulgació i propaganda de l'Esperanto, per als fins de la representació aconsellada en la reunió general del V Congrés Internacional d'Esperanto a Barcelona, i per donar compliment a tots els acords i consells, que afectin als esperantistes en col·lectivitat, provinents dels Congressos Internacionals o dels nuclis directors de la llengua del Dr. L. L. Zamenhof.

Art. tercer. — Per al millor compliment de l'article anterior, la «F. C. d'E.» publicarà una revista gratis per als federats, l'organització de la qual serà determinada per un reglament especial interior publicat pel cos de redacció i previa acceptació del Comitè Directiu.

Art. quart. — La «F. C. d'E.» constarà únicament de membres individuals, que contribuiràn al seu sosteniment amb la quota mínima de TRES ptes. anyals pagades per endavant.

No obstant, tota societat o grup podrà entrar a la «Federació» amb els mateixos drets i atribucions que'ls membres individuals i llurs membres podràn pagar les quotes per mensualitats. Per a aquest fi els Presidents s'entendrán amb el Caixer-administrador directament.

Els Presidents dels grups adherits formaran un Consell Consultiu de la «Federació», an el qual podrà dirigir-se el President de la mateixa per conèixer la seva opinió en els casos en que ho cregui convenient. El Consell informarà mensualment al Comitè de la «Federació», sobre afers esperantistes, fixant especial atenció en lo que fóra de desitjar per a la millor marxa de la «Federació» i de la propaganda esperantista.

Art. quint. — La «F. C. d'E.» serà regida per un Comitè Directiu compost de President, Vice-president, Caixer-administrador de la revista, Vice-caixer-administrador, Secretari i Vice-secretari.

Aquest Comitè serà censor de la revista. El càrrec de Caixer-administrador serà permanent. El que'l desempenyi continuarà en el càrrec fins a ordre de la Junta que farà ratificar pel pròxim Congrés.

Art. sisè. — Els federats de cada localitat elegiran un delegat que tindrà a son càrrec: recollir les quotes dels federats, fer les comunicacions necessaries per als efectes de l'article segon i demés assumptes del regim de la «F. C. d'E.» i ésser l'intermediari entre'l Comitè Directiu i els seus representants.

Els delegats podràn retenir-se, si ho creuen convenient, en concepte de despeses, un 5 per 100 de les quotes que cobrin.

Art. setè. — El Comitè de la «F. C. d'E.» cridarà almenys una vegada l'any, en diferent localitat, durant la primavera i en dia festiu, a tots els seus federats, en Assemblea o Congrés general, en el qual, previa ordre del dia, se donarà compte als assistents dels treballs i gestions fets pel referit Comitè Directiu durant son exercici, s'acordarà el lloc on hagi de celebrar-se el vinent Congrés o Assemblea, se nomenaràn els individus que hagin de formar el Comitè per al següent exercici, i es discutiran les proposicions que hagin sigut presentades abans de la sortida del número de la revista anunciant el Congrés o Assemblea, i incloses en l'ordre del dia.

Art. vuitè. — El Comitè estarà facultat per crear les seccions que cregui més convenients per a la prosperitat de la «F. C. d'E.» i de l'Esperanto; les Juntes de les quals seràn renovades per cada Comitè entrant.

Serà President nat de cada secció un individu del Comitè designat per aquest.

Art. novè. — Tots els acords de les Assemblees i Congressos seràn presos per majoria absoluta de vots dels socis assistents.

Art. desè. — Les esmenes que vulguin fer-se en aquest Reglament hauràn de presentar-se en temps convenient per ésser incloses a l'ordre del dia i publicades en llur totalitat, car únicament podràn ésser discutides i aprovades en les Assemblees o Congressos generals.

Art. onzè. — La llengua oficial serà l'Esperanto, podent ésser usada la catalana en les Assemblees.

Art. dotzè. — En cas de dissolució previ acord de la «F. C. d'E.», els fondos existents, o que resultin de la liquidació, passaran a la «Centra Oficejo», domiciliada a Paris, per a la propagació de l'Esperanto.

Article transitori. — La «F. C. d'E.» serà domiciliada a Sabadell, carrer de Gracia, 12.

KATALUNA ESPERANTISTO

ĈIUMONATA OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

SEN PAGA POR LA ĜEFEDERACIANOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
12, strato Gracia. — SABADELL
KATALUNUJO

Redakciajn korespondadojn bonvolu
sendi al «Redakcia Sekretario: strato,
Carme, 30; Barcelono».

NIA DEVIZO : «MARO ESTAS ĜUTARO»

ENHAVO : *Pri...*, Fred. Pujulà. — *Deka Universala Kongreso de Esperanto.* — *V Kongreso de la K. E. F.* — *Balanço de l'any 1913.* — *Proponoj al la Kongreso.* — *IV Literatura Konkurso de la K. E. F.* — *Tra Germanujo*, Fred. Pujulà. — *Festo de la violoj*, Ch. Brunet. — *Enlanda Movado.*

FIRMADA per un grupo de mitja dotzena de persones que no han format mai part de la Federació abans del Congrès d'Olot, i que s'adheriren després d'ell per les raons que's diràn a Sant Feliu, ha sigut distribuïda una fulla plena de falsedats, amb el sol objecte de crear divisions, dubtes i malentesos entre'ls esperantistes.

La fulla i sos autors seràn judicats com cal, en el moment oportú, pel bon criteri dels federats.

Són moltes les protestes que hem rebut, i per donar-hi satisfacció publiquem aquesta nota. Els amics de la Federació ens permetran que'ls recomanem una mica de paciència i que estiguin convençuts que's farà la justícia que cal a les coses i a les persones.

Sant Feliu ens espera, i a Sant Feliu demostrarem una vegada més el nostre entusiasme per l'ideal que'ns acobla i per l'èxit de la nostra Federació i dels nostres Congressos.

Visca Sant Feliu! Visca el V Congrès de la Federació!

LA REDACCIÓ

ANKORAU NOVA STRATO «DOKTORO ZAMENHOF»

LA gazetoj publikigas la oficialan decidon de la Urbestro de Sant Feliu de Guíxols alprenitan la 21^{an} de Aprilo laŭ kiu la strato de tiu urbo ĝis nun nomita «Travesía de Guíxols» alprenos la nomon de «Doktoro Zamenhof».

Mi estas certa, ke neniŭ loĝanto en tiu strato kontraŭstaros la decidon malgraŭ la ĝeno, kiun momente okazigas la ŝanĝo de strata nomo al komercistoj kaj eĉ simplaj personoj, kaj ke post la Kongreso de nia Federacio — dato interkonsentita kun la Urbestro por la malkovro de la tabulo — ni havos en Katalunujo, kvar stratojn de kvar gravaj urboj kun la nomo de nia glora, de nia kara kaj amata majstro.

La fervoro de la Giŝola Urbestro ne estas nova. Tuj de la unua momento ĝi apogis nian celon kaj movadon, ĝi aliĝis al la V^a Internacia kaj voĉdonis helpmonon por sendi Delegiton; ĝi gastas la kursojn de Esperanto en la urba lernejo, postulas ke la Profesoro havu la Diplomon de la Federacio kaj pagas al li ducent spesmilojn ĉiujare. Nun ĝi voĉdonis saman kvanton por festi niajn kongresanojn. Jam antaŭ du jaroj, Sant Feliu de Guíxols gastis la Kongreseton de la Ĝerona Ligo, kaj oni povis tiam konstati la entuziasmon de la urbo kaj ĝian afablecon.

Kiam antaŭ dek jaroj mi estis invitita fari paroladon en Giŝols, kiun mi faris kun sinjoro Sabadell, kiu okaze trapasinte la komarkon akceptis akompani kaj helpi min, la milo de personoj — preskaŭ ĉiuj laboristoj kun edzinoj kaj infanoj — kiuj nin aŭskultis, jam estis fervoraj al nia ideo. Ni ne forgesu, ke la loĝantaro de Giŝols estas respublikana, el la partio de tiu eminenta viro Pi y Margall, prezidinto de la Hispana Respubliko, kiun ni devas rigardi kiel unu el la plej gravaj propagandistoj de nia lingvo.¹ Ni ne devis elspezi grandan laboron en dek jaroj por fari el Giŝols fortikaĵo de nia movado. Du fojojn ankoraŭ mi publike propagandis — unu el ili kun mia edzino; alian parolis S-roj Sabadell, Dalmau, Coll kaj Grau. Tio sufiĉis. Nun la urbo decidis pruvi al ni ke niaj paroloj ne estis senutilaj kaj la urbo de la bela haveno, kie la bluego de l' akvo enkadriĝas en la

1. Vidu gazeton «El Nuevo Régimen».

mirindaj okroj de l' rokaro, la urbo de la eleganta promenejo, de la orkolora sablejo, de la vivoplenaj fabrikejoj kie la laboro ŝajnas ludo, tiu urbo liberigema, progresema, lulilo de verkistoj kaj pensuloj, kie la spriteco de la popolo, la trajtoj de l' vizaĝoj, la pagana sento de la vivo memorigas la pragrekojn, kiuj tie haltigis siajn ŝipojn, tiu urbo juvelo de nia lando, estis de nun por ni ankaŭ la urbo de la strato «Doktoro Zamenhof».

Kiam en ĉiu urbo kaj urbeto troviĝos unu strato, unu promenejo kun la nomo de la elpensinto de Esperanto, kiam ĉiu urbestro, aŭ almenaŭ la plej gravaj el nia lando estos montrinta tiel la opinionon de la popolo pri la Lingvo Internacia, kia Parlamento kuraĝos ne atenti iliajn postulojn kaj ne obei la premantan volon de tiu originala plebiscito?

Ni laboru konstante, konfidante al la estonteco, sen senpripensa rapidemo, kaj ni iru amase al Giŝols danki la urbon kaj la urbestaron je la persono de la urbestro Sinjoro Duràn, kiam li oficiale malkovros la tabulon sur kiu estos ĉizita la nomo de nia Majstro.

Tiam, post la soleno, ni povos telegrafi al la Barcelona Urbestro kaj demandi ĝin : kio fariĝis la dokumento per kiu ĉiu societo, deputito, kaj politika partio de Barcelono petis de la Urbestro de Barcelono, ke ĝi donu la nomon de nia Majstro al grava strato? Kio fariĝis la promeso, kiun la tiama urbestro faris al Sinjoro Sabadell prezentinto de la dokumento? Ĉu tiu dokumento, tiu promeso, dormas en ŝranko malgraŭ la volo de l' popolo?... Ni bruos, ni vekos ĝin...

Se en kataluna lingvo *esperari* signifas ankaŭ *atendi*, en Esperanto ne; kaj ni estas esperantistoj.

FRED. PUJULÀ



DEKA UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Paris 2-10 de Augusto 1914

Dum sia lasta kunsido, la organiza Komitato, interkonsente kun la Konstanta Komitato de la Kongresoj, decidis ke la kotizo al la DEKA KONGRESO restas fiksita je 15 fr. por ĉiu plena karto, kaj 10 fr. por ĉiu suplementa karto, ĝis la 15^a de Julio.

Al la personoj, kiuj jam sendis 25 fr. oni redonos la diferencon.

V Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio

PROVIZORA PROGRAMO

Dimanĉo, 28^a

Matene : 11^a, Oficiala alveno de la Kongresanoj — 11'30, Oficiala akcepto ĉe la Urbdomo — 12^a, Sardanoj. — *Posttagmeze* : 3^a, Oficiala malfermo de la Kongreso. Unua labora kunsido. — 6^a, Kunsido de la Kataluna Katolika Ligo. — 7^a, Sardanoj ĉe la mara promenejo. — *Vespere* : 10^a Societa balo en la Nova Kazino «La Constancia» dediĉata al la Kongresanoj.

Lundo, 29^a

Matene : 8^a, Meso kun kantoj en la paroĥpreĝejo. Predikos esperante D-ro Josep Casanovas, el Ĝerono. — 9^a, Kunsido de Ĝerona Esperantista Ligo. — 10'30, Dua labora kunsido kaj fermo de la Kongreso. 12^a, Inaŭguracio de la marmora tabulo ŝanĝanta la nomon de unu el la urbaj stratoj per tiu de D-ro Zamenhof. — 1'30, Oficiala festeno. — *Posttagmeze* : 4^a, Festo de la Floraj Ludoj. — *Vespere* : 10^a, Bukeda balo.

Ekzamenoj

Dimanĉo 28^a — 5'30 h. posttagmeze : Skribaj.

Lundo 29^a — 6'30 h. posttagmeze : Parolaj.

KONGRESAJ SCIIGOJ

La Comisió Organizadora, en sesió del dia 29 d'abril prop-pasat, prengué els acords següents:

1.^r Fer avinent a tots els federats que desitgin assistir al Congrès que se serveixin comunicar-ho al President d'aquesta Comisió (carrer de la Penitència, 11).

2.ⁿ Fixar la quota de 5'25 ptes. per al banquet. S'agrirà als congressistes que desitgin prendre part en aquest acte que ho comuniquin lo més aviat possible.

3.^r Rellevar del pagament de la quota de congressista de G. E. L. a tots els associats a la mateixa.

4.^t Pregar a tots els grupos assistents al Congrès que no s'oblidin de la senyera o estendard que'ls representi.

Tabelo de la Hoteloj

Nova Hotelo, 6 p-toj ĉiutage — Hotelo «Marina», 6 p-toj ĉiutage — Hotelo «Centro», 5 p-toj ĉiutage — Hotelo «Las Noyas», 6 p-toj ĉiutage — Hotelo «Comercio», 5 p-toj ĉiutage.

Hortabelo de la vagonaroj, kiuj veturas inter Ĝerono kaj Sant Feliu de Guixols.

El Ĝerono :	7'10,	9'15,	15'55,	18'05	(12'05) ¹
alveturas en Sant Feliu :	9'05,	11'05,	17'50,	19'50	(14'05)
El Sant Feliu :	3'45,	6'35,	13'20,	15'15	(9'15) ¹
alveturo en Ĝerono :	5'30,	8'30,	15'10,	17'10	(11'05)

Hortabelo de la aŭtobusoj, kiuj veturas al Sant Feliu de Guixols

El Palafrugell :	9'30,	13'30.
Alveturo en Sant Feliu :	10'30,	14'45.
El Sant Feliu :	8'30.	
alveturo en Palafrugell :	9'20.	

Prezo : 2 ptojn. ĉiu vojaĝo.

El Sant Feliu :	10'30,	14'45	(Dimanĉe kaj lunde : 4'30)
Alveturo en Caldes de Malavella :	11'30,	15'45	(id. id. : 5'42)
El Caldes :	17'30	(Dimanĉe kaj lunde : 8'19)	
Alveturo en Sant Feliu :	18'15	(id. id. : 9'20)	

Prezo : 2'25 ptojn ĉiu vojaĝo.

Hortabelojn de vagonaroj al Ĝerono, Caldes de Malavella kaj Palafrugell ĉiu povas peti en la stacidomoj. Ni ne povas ilin publikigi, ĉar ni estus devigataj presigi la tabelaron de l' tuta fervojreto kataluna. Ni esperas, ke niaj dubgitoj kaj korespondantoj klopodos publikigi per la enurbaj ĵurnaloj la antaŭajn tabelojn.

Ni publikigas la belan suplementon kun vidaĵoj el Sant Feliu de Guixols, kiun la Organiza Komitato de la V^a Kongreso de K. E. F. eldonis por instigi la federacianojn ĉeesti en la festoj, kiujn la gastama urbo preparas por la esperantistoj.

Kun tiu ĉi numero estas sendataj la insigno de kongresano kaj la karto por fervoja rabato, kiujn la K. E. F.-anoj devas uzi por la Kongreso.

1. Nur lunde, ĵaŭde, sabate kaj dimanĉe.

Balanç de l'any 1913

ENTRADES A CAIXA

	Pessetes
Existència en caixa en 1/1/1913.	230'85
Cobro de 20 quotes de 1912	60
Cobro de 419 quotes de 1913.	1,257
Augment voluntari de 1 ptes. de les <i>Membro-kartoj</i> núms. 29, 30, 90, 99, 370, 411, 511.	7
Import d'11 quotes d'examen per a <i>profesoreco</i>	55
Import de 2 quotes d'examen per a <i>kapableco</i>	6
Venda de K. E. <i>ponumero</i>	39'70
Venda de sagells de propaganda.	109'30
Import provinent de la sotscripció oberta per a la bandera K. E. F.	227'55
<i>Total</i>	1,992'40

SORTIDES DE CAIXA

Mes	Dia		Pessetes
Janer	23	Factura «L'Avenç»	100
»	31	Factura «L'Avenç»	25
»	31	Correu i remesa revista.	8'50
Febrer	26	Factura «L'Avenç»	145
»	28	Correu i remesa revista	11'35
Març	9	Viatge Girona preparació Congrés Olot.	16'40
»	10	Entrega a J. Horta a compte.	125
»	31	Correu i remesa revista.	11'70
Abril	2	Factura «L'Avenç»	105
»	13	Factura J. Garriga, prev.	25
»	18	Factura «L'Avenç»	100
»	30	Correu i remesa revista.	9'25
»	30	Factura «L'Avenç»	135
»	30	Factura J. Horta.	100
Maig	29	Per a 2 exemp. A. Dürer	15
»	31	Correu i remesa revista.	11'10
Juny	26	Factura «L'Avenç»	100
»	30	Correu	1'25
Juliol	30	Correu i remesa revista.	15'75
Agost	30	Correu i remesa revista.	9'85
Setembre	4	Entrega «L'Avenç»	125
»	30	Correu	1'50
Octubre	15	Entrega «L'Avenç»	75
»	30	Correu i remesa revista	14'30

Mes	Dia		Pessetes
Novembre	30	Correu i remesa revista	1'10
Desembre.	29	Factura de J. Altura	135'50
»	31	Saldo factures «L'Avenç»	414
»	31	Correu i remesa revista	15'45
»	31	Despeses de Presidència durant l'any	52'40
»	31	Quota de 1913 a la C. O. París	22'55
<i>Total.</i>			1,926'95

RESUM

	Pessetes	
Despeses generals	1,926'95	
Valor 5 % retingut per diversos delegats, sobre ptes. 576	28'80	
Existència en caixa en 31/12/1913.	36'65	
<i>Total.</i>		1,992'40

El President accidental, *Dr. Joaquim Coll*. — El Secretari, *Manuel Bordas*

El Caixer-Administrador, *J. Piñerrev*



Proponoj submetotaj al la aprobo de la Kongreso

El sots-signat sotmet a l'aprovació del V Congrés Esperantista Català les següents proposicions:

1.^a Que, atenint-se a lo prescrit en el primer article dels Estatuts de la K. E. F., el qual diu : «Queda constituïda la Federació d'esperantistes en terra de llengua catalana, l'acció de la K. E. F. es faci extensiva a Mallorca; i, no podent-se'n fer a València, Rosselló i altres països de parla catalana, per tenir, aquestos, federacions creades, se pacti amb ells una confederació catalana.

2.^a Que'ls professors de la K. E. F. es constitueixin a manera d'institut o academia esperantista catalana, que hauria de dedicar-se a estudis d'Esperanto en relació amb la llengua catalana : per exemple, fer traduccions, cercar l'equivalent amb Esperanto a paraules catalanes difícils de traduir, determinar el gir que s'hagués de donar a frases i modismes catalans d'interpretació difícil, etc.

Aquest cos és el que hauria de consultar el Comitè Directiu de la K. E. F. sempre que s'hagués de resoldre algun punt lingüístic; po-

dent també, aquell, ésser utilitzat com a cos consultiu. Aquest institut hauria de regir-se per un Estatut redactat per una ponència nomenada a l'efecte. — J. AMADES.

1.^a Car la pràctica demostra que no és possible en un sol examen, i en la forma un poc precipitada que ha d'usar-se en els Congressos, conèixer totalment les aptituds dels examinats, no's donarà el títol de PROFESORECO de la K. E. F. sens abans haver obtingut el de KAPABLECO.

2.^a Amb el fi de facilitar l'adquisició de títols de KAPABLECO, es faculta als tribunals examinadors dels cursos d'Esperanto (sempre que siguin formats amb professors de la K. E. F., o altres *esperantistes la competència dels quals acceptarà* previament el Comitè de la K. E. F. escoltat el consell favorable de la Delegació Catalana de Lingvokomitatanoj) perquè donin títols de KAPABLECO, segons el resultat dels examens, havent de subjectar-se, els examinats, a les condicions econòmiques establertes, i havent, els examinadors, d'enviar els originals escrits aprovats, i una certificació de l'examen.

3.^a Car l'èxit dels Congressos depèn del nombre d'assistents als mateixos, a fi de fomentar aquesta existència *no's podrà* canviar la data de llur celebració una vegada assenyalada, fóra cas de força major, a judici del Comitè de la K. E. F.

4.^a Amb el fi de regularitzar els Congressos i aconseguir que siguin profitoses les tasques llurs, s'estableix un *Reglament dels Congressos*. Per portar a cap aquesta obra es nomena una Comissió especial que, de lo practicat en els últims Congressos, extraurà unes bases que s'assajaràn i aprovaràn en el VI Congrés de la K. E. F. — DR. J. COLL i FRED. PUJULÁ.

Mi havas la honoron prezenti al la V^a Kongreso de la K. E. F. la jenajn modifojn farotajn al la Regularo de la Konservantaro de Floraj Ludoj.

Redakti jene parton de la III^a regulo:

Tiu elekto devos okazi aŭ dum la Kongreso de K. E. F. aŭ dum la du monatoj, kiuj sekvas post ĝi.

Nova redakto por regulo IV^a:

La membroj de la juĝantaro elektos el si la personojn, kiuj plenumos la oficojn de Prezidanto kaj Sekretario; tiu lasta plenumos ankaŭ la oficon de Sekretario de l' Konservantaro dum la intertempo de unu konkurso al la sekvanta.

Forigo de la vortoj el regulo IV^a : *Ankaŭ ili lektos la Jarkonservanton, k. c. ĝis fino de l' regulo.*

Forigo el la regulo IX^a de la vortoj : *La proponintoj* k. c. ĝis fino de l' regulo,

Aldono al la regularo:

La Konservantaro kunsidos dum la ĉiujaraj kongresoj de la K. E. F. por plenumi la I Regulon. En la kunsidoj estos permesata nur la lingvo Esperanto. — J. GRAU.

Condicions que hauràn de reünir els grops i les societats per a ésser federats a la K. E. F.

1.^a Constar almenys de 10 membres en els pobles de més de 1,000 habitants, i de 5 en els pobles de menys de 1,000.

2.^a Cap societat ni cap grop no's podrà federar-se si no estàn legalment constituïts.

3.^a Els grops i les societats actualment federats tindrà un mes de temps per a enviar a la K. E. F. copia del Reglament aprovat per l'autoritat corresponent, i una llista composta almenys de 10 o 5 membres, per comprovar que estàn en les condicions degudes. Els que no ho estiguin tindrà tres mesos de temps per a posar-s'hi.

4.^a Després de la celebració del V Congrès de K. E. F. no podrà ingressar a la Federació cap societat ni cap grop que no reuneixi aquestes condicions. — TARRAGONO ESPERANTA.



IV Literatura Konkurso de la K. E. F.

LISTO DE DEVIZOJ DE L' VERKOJ RICEVITAJ

N-roj 19, Timemulino, — 20, Tagiĝo, tagiĝo radias en rond'. — 21, Amo. — 22, Patrineto de Amo. — 23, Pli bela ol ondo, pli forta ol vento... — 24, La Reĝino de la Floroj. — 25, Omnia vincit amor, nos et cedamus amori (Virgilius). — 26, Se la tero estas ĉapelo de Dio. — 27, Reĝino Ĉiela. — 28, Encongida. — 29, Sub tiu ĉielo tiel blua. — 30, Fatima. — 31, La tri malamikoj. — 32, Tempo de feliĉo. — 33, Oja Niĉo de Veranca. — 34, Ĉar amas. — 35, Paska mateno — 36, Obstino, espero, pacienco. — 37, Ni verkas, ni verkas, neniam laciĝas. — 38, Ĉu mi? — 39, Heŭreka. — 40, Dolnjo. — 41, Kial ŝi timas. — 42, Mi volas liberecon. — 43, Amor che muove il Sole (Dante). — 44, Traduttore... Tradittore? — 45, Salix Babylonica. — 46, Ĉu vi ŝatas la bestetojn. — 47, Volo estas povo. — 48, Eĉ unu velk-

floro. — 49, Merkuro. — 50, Lumo kaj vivo. — 51, Stranga efekto de komprenebla kaŭzo. — 52, Gothland. — 53, O tempora! O mores!. — 54, La monto de la verda suno. — 55, Eble. — 56, Caritas. — 57, Mater Amabilis. — 58, Tra la maro... ondaro. — 59, Brako ĉe brako irante. — 60, «E vidi una leggiadra donna e bella su l'erba...». — 61, Frato, mi amas vin! — 62, Herder. — 63, Amdeziro. — 64, Pekoj kaj eraroj estas ecoj de l' homaro.

Post la dato fiksita kiel limo por akcepto de verkoj, estis ricevita verko kun devizo «Jen.»

La Verdikton la komitato konigos per la enlandaj gazetoj antaŭ la Kongreso.



Tra Germanujo

V

SINJORO Oskar Fromm kun dankinda afableco sendis al mi bonegajn informojn pri Berlino. Li eĉ, ne povante persone veni al la stacidomo, petis de S-ro Luczenbacher, hungaro, ke li plenumu tiun taskon. Mi multe deziris premi la manon de S-ro Fromm kaj parole danki lin; tamen, la afableco de ĉiuj malebligis la mian, S-ron Fromm mi ne povis eĉ viziti. Mi de ĉi tie lin redankas.

Mi konservas inter miaj memoraĵoj tre kuriozan portreton memore desegnititan de S-ro Schiff sur la telegramo, kiun li ricevis de S-ro Rockmann, por ke S-ro Luczenbacher rekonu min. La portreto estas tre trafita, sed videble S-ro Schiff ne estis tre konvinkita pri siaj desegnistaj kapabloj kaj la simileco, ĉar li mem persone delasis siajn multajn aferojn por akcepti min persone.

La afablaj berlinanoj ebligis al mi verki senfinan raporton pri nia vizito al la germana ĉefurbo, sed mi promesis paroli malmulte kaj nur pri aferoj rekte rilatantaj al la lingvo.

Kun S-ro Luczenbacher ni vizitis kelkajn fabrikojn kaj ankorau ni mirigis oficistojn. Miaj kunvojaĝantoj jam ne miras, sed ili ĉiam pli bedaŭras ke ili ne lernis Esperanton kaj ripetas siajn promesojn lerni ĝin tuj kiam ili revenos en la hejmon. Cetere, ni pasigas kelkajn horojn en la vagonoj, mi klarigante regulojn, ili lernante frazojn.

S-ro Luczenbacher certe estas konvinkita pri tio, ke ni ne estas seriozaj personoj, de kiam li vidis nian sistemon varbi al Es-

peranto belan fraŭlinon, kiu veturas en nia vagonfako. Mi rakontos la aventuron. Aŭdante nin paroli nian lingvon, la fraŭlino ridetis. Ni decidis esperantistiniĝi ŝin. Per signoj Joakimo Cuatrecasas montras la steleton, ke li bedaŭras ne scii la germanan. Ŝi demandas germane: «Ĉu vi estas fremdaj?» Mi deziras ridi, sed serioze eltiras ŝlosilon, kiun mi donas al ŝi, kaj skribas sur papero: «Ni est'as ankoraŭ pli malproksim'a'j». La fraŭlino deĉifras, kaj tordiĝas de rido. Ŝi redonas la ŝlosilon mirigite. Mi reskribas: «Ni parol'as Esperant'on. Vi devas lern'i ĝi'n». Ŝi deĉifras, jesas per la kapo, kaj redonas la ŝlosilon. Kaj Joakimo Cuatrecasas skribas «ĉar vi estas tre bela!». Ŝi deĉifras... kaj ne plu redonas la ŝlosilon. Ŝi lernos.

Unu rakontinda aventuro, ankaŭ pro lingvo, kvankam ne internacia, okazis al ni en Berlino. Ni eniras en novan restoracion rekomenditan al ni de S-ro Schiff. Ni estas ok personoj... Ĉiuj manĝotabloj estas okupitaj escepte unu por ok personoj, kiu nur estas okupita de sinjoro, kiu grave manĝadas. Ni sidas tamen. Ni konsideras lian mienon kaj faras kelkajn rimarkojn pri li, ĉu li estas tuj finonta, ĉu li havas ankoraŭ apetiton. La sinjoro manĝas kaj silentas.

La problemo de la manĝoj estis tre grava precipe por la sinjorinoj, kiuj ne ŝatis la germanan kuirarton. Mi devas klarigi la pladaĵojn kaj raportojn pri la spicoj, gustoj, grado de kuireco, entenaĵoj, antaŭ ol ili decidiĝas riski elekton. Feliĉe la sinjoro manĝas aferon, kiu vide plaĉas al la sinjorinoj. «Mendu tion, kion manĝas nia samtablano, — ili diras — Tiu bovidaĵo aspektas bone». Sed la sinjoro, sin turnas al la sinjorino kaj diras katalune «*Dispensi senyora, però això és llomillo*» (Pardonu, sinjorino, tio ĉi estas porka lumbaĵo...) La sinjoro estas tute *simple* mia samliceano Alquiza, kies lito en la liceo estis apud la mia, kiun mi ne vidis de antaŭ dudek kvin jaroj! Kvankam li iom loĝis en Barcelono, sub sia barbo li estis por mi maskita, kiel mi kun la mia estis nekonebla al li, kiun mi devas renkonti en Berlina restoracio post kvarono de jarcento... dank' al nia kataluna lingvo! Kompreneble, nia lingvo estas la plej bona en la mondo!... Se ni estus parolintaj Esperanton certe ni ne rekonus nin reciproke.

Unu tagon, la tago, kiun oni dediĉas al mortintoj, post longaj traserĉoj ni trovis la tombon de kara amiko mia, kiu malproksime de siaj lando kaj familio tragike mortis en Berlino. Kelkaj katalunaj vortoj ĉizitaj sur la ŝtono, memorigas lin al la pasantoj. Li estis fervora esperantisto. En Berlino mem mi lernigis al li la lingvon antaŭ kelkaj jaroj. Ni dediĉis unu penson al la boneco de la samlandano kaj samliceano. Estis nokto, pluvetis, kiam ni forlasis la tombejon. Malgajaj

lumetoj trairas la avenuojn. Kelkaj malfruiĝintoj tie ĉi tie ankoraŭ kaŭras siajn ombrojn super la tomboj, elŝiras herbetojn, ordigas flo-rojn... Berlino bruas malproksime kaj ni revenas en la urbon avidante reenspiri ĝian vivon.

La afableco de S-ro Hahn en Leipzigo, tiu de S-ro en Munĥeno ne estis escepto de la afableco ĉies kaj ĉiea. Ni pasigis belajn momen-tojn en ambaŭ lastaj urboj, kaj en la unua ni laboris ankaŭ per Espe-ranto. Rimarkinda estas la hotelo, kie ni loĝis en Munĥeno, la Hotel Reischoff, granda, komforta firmo, kies mastro S-ro Bischoff, liaj filinoj, lia kasistino, parolas flue Esperanton kaj akceptas la sami-deanojn kun samideana afableco. Mi rekomendas ĝin al ĉiu, kiu trapasos la belan Bavaran urbon.

Tia estis nia vojaĝo tra Germanujo per Esperanto. Per ĝi mi varbis al nia movado kvar novajn geadeptojn, kiuj neniam forlasos nin, ĉar antaŭ ol kun la lingvo mem ili praktike konatiĝis kun la interna sento de la lingvo.

FRED. PUJULÀ



FESTO ĈE LA VIOLOJ¹

Al S-ro Frederic Pujulà.
Al F^{inoj} Eulalia kaj Teresa Rosell,
Al katalunaj Gesamideanoj,
tiujn versojn kun rimado je la maniero
de Manel de Cabanyes.

Ĉe l' rando herbplena de l' granda arbaro

Okazis la festo dum milda vespero...

Ĉi-tagon la tero ellasis la vivon

Al multaj burĝonoj.

Akceptis, Violoj, angule de ŝtupo,

Tulipojn, diantojn je helaj koloroj,

Je dolĉaj odoroj liliojn kaj rozojn

Kaj... ĉiujn venintajn.

1. Kelkaj niaj legantoj petis, ke ni konigu la poezion aluditan de S-ro Pujulà en lasta numero de K. E. por ke ili povu ĝui tiun belan verkon. Kun la afabla permeso de *La Revuo* ni povas komplezi la petintojn kaj, ni esperas, ankaŭ la ceterajn federacianojn.

Je branĉoj vidiĝis globetoj konvalaj
 En kiuj por lumi brilegis lampiroj.
 Nu! laŭ la flordiroj, l' ornam' eleganta
 Plej bone aspektis.

Post tint' sonorila ĉe tur' de l' preĝejo,
 La festo komencis per rava koncerto.
 Violoj kun sperto ja estis dungintaj
 Kardelojn por ludi...

Okazis — tre strange — konkursoj diversaj,
 Eĉ veraj florldoj; luktad' papilia.
 Petalo lilia ja estis premio
 Al glora venkinto.

Sed ludis l' orkestro ĉe branĉo de kverko.
 La paroj turniĝis. Kaj iom ebriaj
 Pepadoj ekkriaj aŭdiĝis ĉe nestoj:
 Birdetaj kisetoj!

Ĉe mezo de l' festo la steloj sin montris
 Kaj lumis al floroj, ĝis kiam Mateno
 Alvenis kun peno levadi de l' nokto
 Vualon la nigran.

La tagon, la floroj, dormantaj, tro lacaj
 Ne povis odori aŭ esti koketaj;
 Sed ĝojis la etaj humilaj violoj
 Pro sia sukceso.

CH. BRUNET (*Bordeaux, Francujo*)



Krom la suplemento, insigno kaj rabatkarto por fervojo oni trovos folion de belaj markoj propagandaj, el donitaj okaze de la Kongreso, de nia amiko S-ro Amades, kiujn li donacas al ĉiu federaciano. La eldono estis farita en 5 diversaj koloroj. La samideanoj, kiuj volas posedi la ceterajn markojn, povas sin turni rekte al la eldoninto, S-ro Amades, Peu de la Creu, 10, Barcelona.

ENLANDA MOVADO

BARCELONA¹

La 4^{an} de Aprilo je la deka vespere komenciĝis en la kunveno feste ornamita de *Supren*, kien iris amaso da samideanoj el ĉiuj enurbaj grupoj, la koncerto kaj festo anoncitaj. La dancistaro de «Casal Nacionalista Martinenc» sub gvidado de nia samideano, eminenta folkloristo, S-ro Aureli Campany dancis kelkajn el la antikvaj popolaj dancoj katalunaj, pri kiuj S-ro Campmany faris paroladeton rakontante ilian originon, epokon kaj ceterajn detalojn.

Oni admiris la ĝustecon kun kiu estis dancataj la *Patatuf*, *Bulangera* kaj la ceremonian *Ball de l'Indiot*. La solena *Ball Pla*, nobela danco *Espunyolet*, *L'hereu Riera* kaj la *Ball del Ciri*, eleganta danco ankoraŭ en uzo dum la jaraj ĉefestoj en kelkaj vilaĝoj katalunaj, ĉarmis nin kaj havigis al la dancistoj varmajn aplaŭdojn. Ankaŭ la *esperantistaro*, kunmetitan el motivoj de katalunaj popol-dancoj, dancon *La Rondo* la geanoj de «Esbart Dançaire» dancis tre bone.

Gefratoj Eulalia kaj Josep M.^a Soler ludis flute kaj pianе diversajn kompoziciojn, kiujn aplaŭdis brue la ĉeestantaro.

La partopenintoj estis laŭpove regalataj de la Komitato de B. E. S. kiu dankis nome de ĉiuj samideanoj la helpon, kiun ili donis al la festo.

Post fotografado la festo daŭris per balo, kiu finiĝis je la 2.^a postnoktomeze. Ni ne citas nomojn de karaj amikoj ĉeestintaj kiujn ni salutis kun plezuro, por ne riski forgesojn bedaŭrindajn. Ni ripetu nur, ke el ĉiuj grupoj barcelonaj venis sukcesigi la feston multaj samideanoj.

La tria festo de la programo estis propaganda publika paroladaro, kiu havis lokon en la *Esperanta Racionala Grupo* la 5^{an} de Aprilo. Ĉiuj ĝeĉeestantoj estis laboristoj, multaj el la kvartalo de Poble Nou.

S-ro Caballero, prezidanto de *E. R. G.* komence salutis ĉiujn kaj cedis la prezidan lokon al nia samideano S-ro Grau, kiu tuj donis parolon al S-ro Renom.

Per flua dirmaniero li vidigis la efikon nobligan de *Esp.* inter la laboristoj, kiuj eltiras el ĝia studado gravajn plezurojn kaj profitojn per la konatiĝo kun medioj novaj kaj interrilatiĝo kun amikoj kaj kamaradoj el la tuta mondo. Faris konsiderojn pri tio kaj stimulis al lernado de nia lingvo. Ricevis multajn aplaŭdojn.

S-ro Serrat flame kaj konvinke parolis pri la praktika uzebleco

1. La sekvantan raporton jam kompostitan por la *Bulteno de «Barcelona Stelo»* ni publikigas, ĉar tiu grupo devis ĉesigi la eldonon de sia Bulteno, tial ke ĝia kasisto S-ro Pascuet malaperis el Barcelono forportante la tutan monon de la grupo.

de Esperanto en la interrilatoj ĉiuspecaj kaj prezentis pri tio ekzemplojn. Diris, ke Esperanto estas fakte plej bona rimedo por proletariaj bezonoj, tial ke ĝi nepostulante grandan penon liveras al laboristoj solvon de l' malfacilaĵoj, kiujn ili renkontas pro malsameco de lingvoj ĉe la internaciaj organizacioj kaj rakontis pri kelkaj utiloj de Esperanto de li mem spertitaj en fremdlando. Finis sian paroladon per varma alvoko al la studado de Esperanto. Aplaudado aŭdiĝis post lia bela parolo.

S-ro Grau parolis esperante por kuraĝigi la samideanojn kaj montri al la neesperantistoj la belecon kaj parolfacilecon de la Zamenhof'a lingvo. Diris, ke la ĝuoj ricevitaĵoj pro Esperanto, la profitoj de ĝi donitaj, la partopreno en la internacia mondo tute fermita por la laboristoj, kiuj ne konas Esperanton — kreas al la esperantistoj ŝuldon, kiun ili devas pagi per propagando senlaca. Citis kelkajn manierojn propagandi en diversaj rondoj kaj montris ke almenaŭ pro egoisma utiligo de la lingvo, kies efiko kreskos des pli granda fariĝos ĝia kampo, oni devas ĝin diskonigi. Komparis la organizon de laboristoj al organizo de la esperantistoj kaj rekomendis disciplinon, kiel sole bonan certigon pri triumfo. Aludante al la individueco de katalunoj, parolis pri la intensa ĝojo de konsciulo, kiu partoprenas en organizacio lin respektanta kaj diris, ke nenio estas pli agrabla kaj kuraĝiga, ol senti sin libera en paca armeo, kiun oni tial helpas per tuta forto kaj valoro. Rememorigis ĉiujn, ke la devo de persono samopinianta kun movado bona, kiun li juĝas malbone gvidata, estas ne apartiĝi de ĝi, sed en ĝia interno klopodi senlace por vidigi la eraron kaj korekti ĝin.

Dankis la ĉeestantojn por la atento per kiu ili aŭskultis la parolintojn kaj fermis la feston meze de entuziasmaj aplaŭdoj al lia parolado.

REUS

Completament agens an aquesta qüestió, i planyent de debò les enemistats entre *samideanoj*, publiquem la següent lletra, la responsabilitat de la qual va a càrrec de son autor. Els companys de *Tarragono Esperanta* tenen aquestes pàgines a llur disposició. A uns i altres preguem concretin, i diguin en poques paraules llurs arguments. ¿No fóra possible dir un sol mot : *samideano*, i allargar-se la mà d'amic? Nosaltres serem ditxosos si de l'exposició de càrrecs públicament ne resulta un públic renuament de relacions. — K. E.

Senyor Director de KATALUNA ESPERANTISTO. — Barcelona.

Distingit senyor meu:

Marge-peu que motiva la present és la cridada feta en la plana 26 de la revista que vostè amb tanta cura dirigeix, i que és corresponent al febrer finit.

Faig-li avinent que redacto la present en català perquè son contingut quedi dins de casa, a fi que la gent forastera no prengui nota d'eixos afers.

Sense voler haig d'ésser un poc extens, per posar en clar aquelles notes contradictòries.

Nova Semo organitzà, i celebrà el dia 19 d'octubre de 1913, una Assamblea Esperantista, que vaig honrar-me en presidir. En ella el president de *Tarragono Esperanta*, en Domènec Obiol, amb caràcter de representant d'aquell grop, proposà la fundació d'una Lliga Esperantista Provincial, acompanyant un projecte d'Estatuts per a la mateixa. Els de *Tarragono Esperanta*, de primer antuvi, volien aprovar els Estatuts en aquell mateix acte; però desistiren al veure l'esperit general dels reunits, que era favorable a estudiar-lo previamente. Així les coses, s'otorgà un vot de confiança al que suscriu perquè enviés una còpia del projecte d'Estatuts presentats per *Tarragono Esperanta* a tots els *grops* de la província, i que a l'ensems els invités a reunir-se en el dia festiu que estimés oportú.

Complint aital comanda, vaig convocar la reunió de delegats per a l'11 de janer. En aquell dia vam reunir-nos en el Centre de Lectura, de Reus, els delegats de 17 *grops* esperantistes, que's nomenen en el K. E. de febrer. Aprovarem per unanimitat els Estatuts de la E. T. P. L., el text dels quals era completament distint del proposat per *Tarragono Esperanta*.

Se procedí acte seguit al nomenament del Comitè Directiu, i en la primera elecció, que fou la de President, s'entaulà discussió amb motiu d'haver-hi dos candidats: en Domènec Obiol, President de *Tarragono Esperanta*, i en Pere Aguadé, de Reus. No arribant a un acord, se procedí a votació, votant tots els delegats el Sr. Pere Aguadé, menys tres, que votaren el Sr. Obiol.

Aqueixa és l'història. Fàcil és comprendre perquè *Tarragono Esperanta* no s'ha adherit a la Lliga, segons diu el Sr. Obiol en la seva nota. No obstant, *Tarragono Esperanta*, de fet, és adherida a la Lliga des del moment que son delegat Sr. Vinyes va aprovar, en nom de *Tarragono Esperanta*, els Estatuts de la E. T. P. L. I perquè la majoria de delegats no van voler votar el Sr. Obiol per a la presidència de la Lliga, és per això que s'ha cercat un pretext, però tant minço com ho és el dir que posteriorment s'han enterat que hi havia delegats de *grops* que no estaven legalment constituïts.

Hi hauria moltes maneres de rebatre lo afirmat pels *samideanos* de *Tarragono Esperanta*, però consti que no vull fer-ho: només els demano que contestin, si poden, a una pregunta força senzilla: ¿Per què no estaven legalment constituïts els *grops* que enviaren delegats a la reunió en que s'aprovaren els Estatuts de la E. T. P. L., a quines delegacions prestà conformitat el delegat de *Tarragono Esperanta*?

Mercès, senyor Director de K. E., per haver donat cabuda a la present en les planes de la revista *orgue* de K. E. F., i sàpiga que resta de vostè afectíssim i atent s.,

q. l. e. l. m.,

E. AGUADÉ

Llista de delegats autoritzats per la administració de K. E. F. per a rebre les quotes

Arbós del Penedès	A. Romagosa	Major, 11
Badalona	«Badalona Stelo».	Sant Pere, 86
Balaguer	M. Espar Boquer.	Miracle, 7
Banyoles	J. Aulina	Tururs, 49
Barbarà del Vallès	S. Arnella	Sant Pere, 21
Barcelona	Joan Rosals	Porta-ferrissa, 30
Begas	J. Esteve	Raval Sant Martí, 19
Berga	J. Cardona.	Apotecari
Blanes	S. Robert	Llarg, 42
Borjes Blanques	F. Rubinat.	Pou, 2
Calafell	J. Jané	
Cambrils	Josefina Maseguer	Hostal Nou
Cassà de la Selva.	N. Puig.	Bisbal, 1
Castellar del Vallès	F. Blanquer	Fonts Calents
Centelles	J. Raurell	
Flix	«Verda Stelo».	
Girona	F. Anguet	Progrés, 20
Granollers	F. N. Pujadas.	Fonda d'Europa
Igualada	A. Mosella.	P. Constitució, 11
La Escala	J. Ximinis	Fàbrica gèneros de punt
Lleida	Ll. Abadal.	Major, 12 i 14
Manlleu.	«Esperantista Amikeco»	Pont, 38, 2 ^a , 1 ^a
Mataró	J. Solà	Sant Josep, 46
Mieras	R. Riera	Comerciant
Mollet	«Vojantaŭen».	
Olot	I. Juanola	Superior, 25, 2 ^a
Palafrugell.	J. Marquès.	Pals, 1
Pobla de Lillet	J. Llumà	Porxos, 19
Prades	T. Alsina, pvre.	
Premià de Mar	P. Alsina	Camí Reial, 81-79
Reus.	E. Aguadé.	Presó, 15
Ripollat.	«Esperanta Akvofalo»	Nou, 20
Rubi.	J. Ratés	Sant Magí, 1 i 3
Sabadell.	Lloc Social.	Gràcia, 12
Safas.	P. Vivet.	Metge
Sant Feliu de Guixols	J. Blanch	Caimó, 32
Sant Llorenç Savall.	J. Roma.	
Sant Quirse de Besora	J. Fossas	
Santa Coloma de Farnés.	J. Gener.	Metge
St.ª Perpetua de la Moguda.	«Kamparo»	Verge Maria, 1, 2 ^a
Selva del Camp	J. Girona	
Tarragona	D. Obiol	Unió, 9, 3 ^r
Terrassa.	A. Oliart	Clarís, 24
Tivissa	F. M. Brú	Avall, 16
Torelló	C. Viñolas	Sant Josep, 14
Vendrell	F. Guitart	Plaça Dr. Murillo, 7
Vich	J. Comella	Plaça Major, 18
Vilafranca del Penedès.	A. Robleño	Puigmoltó, 14
Vilanova i Geltrú	F. Mestres.	Sant Antoni, 1 i 3

**V Kongreso
de la Kataluna
Esperantista
Federacio**

**Sant Feliu de Guíxols,
28-29 de Junio 1914^a**

AMIKOJ!

MONTRU LA FORTON DE ESPERANTISMO

EN NIA LANDO!

IRU AMASE AL LA KONGRESO!

KATALUNA ESPERANTISTO

ĈIUMONATA OFICIALA ORGANO

DE LA



JARO Va : DECEMBRO 1914



AVÍS D'ADMINISTRACIÓ

Vistes les manifestacions de descontentament d'alguns delegats amb motiu de la circular que la K. E. F. envià a tots els federats sens distinció (tant als que estaven corrents de pagament com als que no ho estaven, per creure que a tots interessava per igual), i de la demanda feta an alguns delegats d'enviar la liquidació de les quotes an ells confiades; aquesta administració es veu obligada a declarar lo següent:

1.^a Que ni la K. E. F. ni l'administració tingueren el més petit intent de molestar a cap delegat ni a cap federat per medi de la circular ni de la demanda feta an els delegats, com ho prova el contingut d'un i altre document; havent sigut l'únic motiu del llur enviu el desig de posar en coneixement dels federats el veritable estat de la Federació i de recordar-los el compliment del llur dever.

2.^a Que, no tenint la Federació cabals de reserva per assegurar la publicació del K. E., ni disposant d'altres medis que l'import de les quotes dels federats, an elles té d'acudir per satisfer el cost de la revista i demés despeses a son càrrec.

3.^a Que trobant-nos ja en el començ del quart trimestre de l'any havent-hi encara, per cobrar, una gran part de les quotes de l'any corrent i fins de l'anterior, i no tenint la K. E. F. l'obligació de bestreure diners per sufragar les seves despeses, ni tampoc el dret d'atemptar contra l'integritat de la butxaca de cap federat, com ha tingut de fer per assegurar la publicació del present número de la revista; en compliment del que disposa l'article 4.^t dels nostres Estatuts, apremiarà a delegats i federats perquè envíin l'import de la quota a principi d'any, i no a sa fi, com fins ara venia succeint, per entendre que sols així podran complir-se els devers contrets envers els federats, i que sols llavors podran ésser justos en llurs reclamacions.

4.^a Que entenen ésser un dever de tot administrador el procurar els ingressos abans que contreure les despeses, el que sotscriu, d'acord amb la K. E. F., està disposat a no perdre moment ni ocasió, fins a arribar a aconseguir-ho, de procurar la reorganització total de l'administració.

Confiant en el bon criteri de tots els federats, esperem que, guiats per l'amor que senten per la Federació i l'Esperantisme en general, deixaràn de banda les petites deficiències propries de tota organització, i, en lloc de molestar-se ni posar obstacles deixant de satisfer puntualment l'import de les quotes, procurarán facilitar tots els medis perquè no tingui de suspendre's la publicació de la revista ni l'atenció de les demés obligacions.

Els en dona anticipades mercès l'Administrador

JOSEP SERRAT I PARÉS

KATALUNA ESPERANTISTO

ĈIUMONATA OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

SEN PAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO : 12, str. Gracia : SABADELL (KATALUNUJO)
Korespondaĵojn sendu sub la adreso : strato Aribau, 55 : BARCELONA

NIA DEVIZO : « MARO ESTAS GUTARO »

Denove



KATALUNA ESPERANTISTO mortis!...

— Kial ĝi de tiel longe ne aperis?

Kiom da fojoj estis ripetataj tiuj frazoj depost nia lasta numero de Majo pasinta, estas nekalkuleble. KATALUNA ESPERANTISTO tamen ne mortis; sed ĝi grave malsanis. Hodiaŭ, kiam denove ĝi eliras al la publiko, ni *povas* diri la kaŭzojn de la grava krizo. Ne nur *povas*; la espero, ke kompleta klarigo instigos niajn amikojn eviti rean malsanon al nia amata gazeto, trudas al ni la *devon* diri : La kutimo de certa nombro da federacianoj pagi la jarkotizon de la K. E. F. ĉe la fino de l' jaro, kaj la kutimo de certaj delegitoj reteni ĝis lasta momento la monsumojn ricevitajn, ili ambaŭ kaŭzas la plej gravan malhelpon al la bona funkciado de la organizacio kaj sekve al la regula aperado de ĝia bulteno KATALUNA ESPERANTISTO.

Efektive : per la ordinara tripeseta jarkotizo ĉiu aliĝinto al la «Kataluna Esperantista Federacio» akiras la rajton esti membro de la asocio, kaj tial havigas al si la plezuron subteni per efika maniero la esperantistan movadon, kio ja estas esperantista devo. Tia plezuro sufiĉas stimuli la plej grandan nombron de niaj samideanoj en la tuta mondo al bonvola donaco de tiu malgranda monsumo

profite de nia granda ideo. Ĉe ni, la aliĝinto al la K. E. F., paginte aŭ ne paginte la kotizaĵon, ricevas kvazaŭ premion, ĉiumonatan gazeton zorge presitan, belaspektan (ni ja ripetas laŭdojn de aliaj!), kiu kostas al la Administracio la dekduonon de l' tuta valoro de ĉiuj kotizaĵoj, do, fine de l' jaro, ĝi forprenas la tutan monon, enkasigitan dum ĝi. Vi, amiko leganto, komprenas klare, ke en la okazo se sufiĉe multaj federacianoj prokrastas sian pagon, la Administracio estas forte embarasata de la malagrabra cirkonstanco, ĉar krom la gazeto, estas ankaŭ subtenata de la Federacio per sama rimedo, la organizo de la Floraj Ludoj, kiuj ĉiujare donas al la kongresaj festoj ilian plej grandan brilon.

La unua numero de tiu ĉi jaro enhavas varman peton al ĉiuj kunfederacianoj; ĝi admonas ilin kaj petas, regule kontribui al la komuna entrepreno per ĉiuj ideoj, proponoj, kritikoj, kaj... kotizaĵoj. Bedaŭrinde, ne ĉiuj K. E. F.-anoj respondis akurate al la farita peto, kaj ili kreis al la Administracio la plej malfavoran staton, kiun nia Federacio ĝis nun travivis. Ili ŝajne forgesis, ke la abonon al kia ajn ĵurnalo oni devas antaŭpagi, des pli multe, kiam tiu ĵurnalo estas eldonata per la mono, ne de negocofaranta firmo, sed de nekomeranta sindonema asocio. Lasta nia numero aperis antaŭ la Kongreso de Sant Feliu de Guíxols; ĝin sekvis neniu alia, ĉar la Komitato *ne volis riski la definitivan pereigon de la K. E. F.*

Per la mono ricevita ĝis tiu tempo, la Administranto povis pagi ĉiun krediton, kaj kvitigi ia Federacion por la pasintaĵo; kaj li tion faris. Sed, ĉu la necerte ricevota mono povos superi la elspezojn necesajn por aperigi la gazeton ĝis fino de la jaro? Tiun demandon li, kun sperto, respondis; en fino de l' 1913^a la situacio estis simila, kaj tamen ĉiu K. E. F.-ano ricevis la numeron de la gazeto, kiu estis ankoraŭ pagota per la mono de la kotizado de l' sekvonta jaro, riskante la danĝeron de vera bankroto. Tial, la Komitato elektita en la V^a Kongreso decidis ne ripeti la senfruktan eksperimenton kaj haltiginte la publikigon de la gazeto, ekzameni funde la situacion. Unu sola solvo aperis: sciigi la geanaron pri la stato de la asocio kaj atendi, ke ĝi klopodos aranĝi ĝin; tiucele, ĝi dissendis fine de Oktobro cirkuleron kun detala klarigo. Ĝiaj rezultatoj estas jenaj:

Bonvolaj samideanoj, veraj amikoj de Esperanto, kies nomojn aliloke ni publikigas, donacis al la Komitato la monon necesan por aperigi tiun ĉi numeron, kiu estos sendata al ĉiuj, eĉ ne pagintaj la nunjaran kotizon, federacianoj. Tamen, al tiuj oni avertas ke la unua numero de 1915^a ne estos sendata al ili, ĝis kiam la Administracio estos ricevinta ilian kotizaĵon.

Dua rezultato de la cirkulero estas tre kontentiga; ĝi garantias la aperon de nia gazeto dum la tempo necesa por ricevi la kotizaĵojn de l' 1915^a jaro, ĉar kelkaj imitindaj delegitoj sendis tuj sumojn, kies tutaĵo, ĉirkaŭ 150 ptoj, permesos la funkciadon de la organizacio, ĝis plena renoviĝo de ĝia vivo.

Kiel vi vidas, tiu solvo estas la sola, kiun permesis la grava dilemo: aŭ presigi tutan kolekton de la oficiala organo de la Federacio, kondukante tiun lastan al certa bankroto kaj sekva malapero, aŭ presigi nur tiun ĉi numeron, savante je kosto de la bonaj samideanoj helpemaj la vivon de la K. E. F. Ni esperas, ke niaj amikoj povos nur aprobi. Rekompence, se ili daŭrigas sian apogon al la asocio, se ili klopodas aligi al ĝi novajn membrojn el inter siaj amikoj, eĉ se la nuna nombro da federacianoj duoniĝos, la apero de KATALUNA ESPERANTISTO estos garantiata dum la venontaj jaroj. Ni ne dubas, ke tio okazos, malgraŭ la malgajaj kondiĉoj de l' momento, kaj ke ni povos daŭrigi nian taskon pli fortaj, ol antaŭe.

LA REDAKCIO



Monkolekto por la eldono de Kataluna Esperantisto

S-ro Gustau Galcerán	25 Pesetoj
» Antoni Codorniu.....	25 »
» Gaietà Balcells	15 »
» Josep Serrat.....	10 »
D-ro Jascinto Bremón	10 »
» Joaquim Coll	5 »
S-ro Joan Rosals	5 »
» Joan Gili.....	5 »
» Joan Amades	5 »
» Josep Ventura	5 »
» Manuel Bordas	2 »

Entute..... 112 »

Ni esperas, ke multaj aliaj federacianoj bonvolos kunhelpi al laboro reporti nian gazeton al plena kaj forta vivo.



La Granda Milito

MILITO deligis sian furiozon en la tuta mondo depost la komenco de Aŭgusto, en la momento kiam la esperantistaro estis preta okazigi sian plej grandan kongreson, solenan feston de Paco. Ĉion avidanta, freneza torento, Milito forglutas el la mondo civilizita la plej noblajn sentojn, ilin anstataŭigante per malsuperaj semoj de malamo kaj ruinigemo. Milito malhelpas, renversas normalan vivadon de l' popoloj, minacante ilin per terura mizero. Milito disfalgas kaj premas la belajn idealojn kaj senrevigas la spiritojn. Ĝi malutilas, vundas, mortigas ĉion.

Al ni, esperantistoj, la granda milito kreis la plej gravan baron, kiun nia ideo renkontis en sia malfacila vojo. Ĝi detruis la jam florantan rezulton de penoplena longa agado, ĝuste kiam ni volis prezenti al la rigardanta homaro la konvinkan konstaton pri la efektiviĝo de *utopia* revo : starigo de lingvo internacia. Ni vidis, kun ega doloro, kiel degelas en niaj manoj la mirinda konstruaĵo, kies altan supron ni preskaŭ atingas, sub la arda blovo de l' milita ventego. Kaj ni perdis konscion.

En la nuna momento nian koron premeblas la penso, ke multe da niaj amikoj kaj samideanoj, same amataj de ni, troviĝas kun pafilo en la mano unuj kontraŭ la aliaj, pretaj por kruela mortigo, kvankam ili ankoraŭ kunvivas spirite ĉe la altaro de frateco. Ho, kiom dolora penso!

Ĝi vekas en ni, tamen — domaĝe, ke tiel multekoste — la deziron nin oferi denove al laboro efike disvastigi nian karan ideon, por eviti en la estonteco alian similan katastrofon. Ni vidas klare, kiom multe paco valoras, kaj en nia egoista baraktado por vivi ni komprenas, ke la savo ekzistas nur en la fratigaj idealoj, kies efektiviĝon malhelpis ĉefe tiuj homoj mem, kiuj nuntempe riproĉas al ili ilian nulan efikon kontraŭ la apero de milito. Jam de nun, kaj post ĝia fino des pli multe, instigos nin labori, la sentebla reago kontraŭ la malpacigaj kiopodoj, la ĝenerala orientiĝo al la humanaj solvoj, kiuj estos la rezultato de la hodiaŭaj sangaj batalegoj.

La Homaro, simile al individuo suferinta malsanon, evitos pro instinkto kiam ĝi resaniĝos je la abomena kancero, rodanta ĝian karnon, la ideojn portintajn tiel terurajn sekvojn, kaj akceptos volonte, tiujn — kiel la nia — celantajn al ĝia bono kaj perfektigo. Ni devos profiti de la okazo, kaj montrante la utilojn de nia lingvo sper-

titajn de ĉiuj batalantaj popoloj en tre diversaj cirkonstancoj, ĝian uzadon dum la milito por plej malsimilaj celoj, alligi al ĝia nobla ideo la progresemajn animojn, la sindonemajn homojn, kiuj ankoraŭ restas for el nia rondo. Ni devas montri al la mondo, kiu hodiaŭ povas nur admiri la dise restantajn ŝtonojn de nia konstruo, kiel bela ĝi estas, kiam post la nubego de malamo kreita de la malhumana batalado aperos la hela suno de Paco, brilante super la homoj reciproke sin amantaj kiel fratoj, danke al la glormerita laboro de la partianoj de nia kara lingvo.

JOSEF GRAU



Pro Milito

Nia kara Direktoro, S-ro Fred. Pujulà, kiu veturis Francujon okaze de la Dekka Kongreso por partopreni en ĝi kaj resti apud Parizo la tutan someron, estis mobilizita la 1^{na} de Aŭgŭsto, kaj enkorpusiĝis al 32^a Teritoria Regimento de Infanterio. Niaj kunfederaciaj komprenos nian ĉagrenon pro la foresto de nia amata amiko kaj lia danĝera restado sur la batalkampoj. La sciigoj, kiujn de li ni ricevis, estas sufiĉe kontentigaj : malgraŭ lia aktiva partopreno en la bataloj dum bajonetaj atakoj, daŭraj pafadoj, ĉe enterigoj. k. t. p., k. t. p., li bone fartas kaj konservas sian kutiman spriton.

Lia edzino, s-ino Rebours, sekretariino de la V^a Kongreso Internacia, suferis la bedaŭrindajn sekvojn de la germana invado, kaj devis forlasi sian patran domon en Lagny s. Marne kaj rifuĝi en Clermont Ferrand, kie ŝi naskis sanan kaj belan idon Jordi Pujulà, estonta kunbatalanto nia. Niaj gratuloj kaj bondeziroj por la okazo estas esprimitaj al ili kun ĉagrena koro pro la doloraj cirkonstancoj.

Ni deziras ke la Sorto estu favora al niaj geamikoj ĝis fino de la milito, por ke ili povu baldaŭ ĝui denove en sia hejmo sian vivon de l' pactempo.

— Alia samideano nia, S-ro Mattes, estis entirita al la milito, kiel franca soldato. Laŭŝajne li estis mortigita jam en la komenco de la milito, kvankam aliaj sciigoj diras, ke li estas kaptito de la germanoj. En tiu malgaja necerteco, ni preferas kredi la duan supozon kaj deziras plejbonon al nia kara amiko.



V^a Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio

Sant Feliu de Guíxols, 28-29 Junio 1914^a

28^a de Junio

ALVENO DE LA ESPERANTISTOJ

LA urbo Sant Feliu de Guixols estis skuata lastan monaton antaŭ la Kongreso de varmaj disputoj, kiujn okazigis la publikigo de cirkulero plena de malveraĵoj pri la Federacio kaj ĝia Kongreso, kiujn respondis per alia cirkulero la Organiza Komitato. Ĉar la publiko forte interesiĝis al la diskutado, la sinteno de la urbo antaŭ la Kongreso estis iom stranga, kaj tion bone povis rimarki la malmultaj samideanoj, kiuj la sabaton vespere alvenis al la urbo.

La sekvintan matenon, tio estas la dimanĉo, 28^a de Junio, kiam en Sant Feliu estis jam kelkaj esperantistoj el la proksimaj urboj, venintaj matene por akcepti kun la Organiza grupo la ceterajn samideanojn alvenontajn je la 11^a, la simpatio de la publiko iom post iom pligrandiĝis. Je la 11^a sur la trotuaroj de la stacidomo svarmis krom la esperantistoj *fruemaj*, multaj Ĝisol-anoj, kiuj venis konstati la anoncitan *malsukceson* de la Kongreso. Fine, la vagonaro aperas kaj desaltas*el ĝi amaso da samideanoj el ĉiuj katalunaj urboj, kiujn oni salutas per la majestaj sonoj de nia himno. Prezentoj, salutoj, cirkaŭpremoj, kaj en manifestacio la kongresanoj trairas la stratojn tre plenajn de scivola personaro, favore al la esperantistoj komentarianta ilian alvenon. Post la standardoj flagrantaj al vento, la kongresanoj venis al la Urbodomo, kie la Urbeŝtaro sub prezido de lia moŝto la urbestro, S-ro Duràn, la deputito S-ro Irla en reprezento de la Provinca Deputitaro kaj la urba juĝisto S-ro Callicó akceptis la esperantistojn per koraj vortoj, dezirante al la Kongreso grandan sukceson kaj trankvilan agadon. S-ro Pujulà en la nomo de la esperantistoj salutas la Aŭtoritaton kaj dankas la urbon por la bona akcepto, inda je ĝia internaciemo kaj kulturamo. S-ro Duran, urbestro, respondas dankante por la parolo de S-ro Pujulà kaj deklaras la Kongreson malfermita.

MALFERMO DE LA KONGRESO. UNUA LABORA KUNSIDO

La urbestro kaj la urbkonsilantoj cedas la prezidejon al la membroj de la Komitato de la K. E. F. kaj D-ro Coll kiel vicprezidanto,

petas la Kongreson, pro la specialaj cirkonstancoj, elekti D-ron Bremón, kiel sian prezidanton. Post la unuanima elekto D-ro Coll petas de D-ro Bremón, ke li volu okupi la prezidantan lokon, kion meze de la aplaŭdoj li faras.

D-ro Bremón dankas por la honoro, kaj esperas ke li estos senpartia arbitro, se oni devas diskuti pri malpaciĝoj, ĉar li sin tenis ĉiam flanke de ili. Li petas la reprezentantojn de grupoj, bonvolu prezenti la rajtigilojn kaj saluti, kiel kutime, la Kongreson.

S-roj Josep Ventura, el *Lumon*, Terrassa; Joaquim Costa, el *Studenta Juneco*, Girona; Leonart Renóm, el *Ĉiam Antaŭen*, Barcelona; Francisco Sagrera, el *Paco kaj Amo*, Palafrugell; Joaquim Rich, el *Lernejo kaj manĝejo*, Cassà de la Selva; Josep Armengol, el *Flugila Penso*, Ventalló; Josep Casanovas, pastro, el ĵurnalo «El Norte» kaj *Gerona Espero*, Girona; D-ro Joaquim Coll, el la gazetoj «El Correo Catalán» kaj «Gaceta de Cataluña»; Domingo Obiol, el *Tarragono Esperanta*, Tarragona; Josep Grau, el *Vika Esperantistaro*, Vic, *Universala Frateco*, Barcelona, *Ilerda Espero*, Lleida, kaj *Monta Grupeto*, Sant Llorenç Savall; Pere Costa, el *Esperanta Idealo*, Sta. Coloma de Farnés; Josep Planas, pastro, el *Esperanta Nesto*, Barbarà del Vallés; Joan Gili, el *Barcelona Stelo*, Barcelona; Joan Amades, el *Semo*, Barcelona; Ramón Martorell, el *Esperanta Semo*, Sabadell; Joan Aulina, el *Esperantisto Amikeco*, Banyoles, salutas siavice la Kongreson per varmaj vortoj, longe aplaŭdataj.

Aliĝas al la Kongreso telegrafe, S-roj Vilá (Ceuta), Perogordo (S. Ildefonso), Margarit (Sabadell), Ustrell, Costa, Romeu, Trujol (Sabadell), Rocamora, kiu protestas, tial ke la Kongreso okazas; *Martorelĵa Stelo* (Martorell), Pellicer (Barcelona), Galcerán (Vilanova i Geltrú), *Supren* (Barcelona), *Nova Semo* (Reus), familio Gili (Barcelona). Letero aliĝas ankaŭ S-roj Kurt Fritzching (New York), Joan Horta (Barcelona), Jaume Jané en nomo de la *Grupo de Calafell*, kaj la *Unione Esperantista Istriana* de Capodistria (Italujo).

S-ro Pujulà petas, ke ĉiuj staru unu momenton honore de S-ro Serdá, la pioniro de nia K. E. F., kiu mortis ĝuste antaŭ tri jaroj en sama tago kiel hodiaŭ. Poste, S-ro Rourich, prezidanto de *Fraterco* de St. Feliu, organizinto de la Kongreso, atentigas la kongresanojn, ke li kaj la grupo estas pretaj doni ĉiajn klarigojn pri la diskutoj kaj malpaciĝoj *pro kongreso* okazintaj.

S-ro Piferrer, administranto, klarigas pri la financa situacio de la K. E. F. kaj oni aprobas la bilancon, kiu aperis en la n.º 5 (50) de KATALUNA ESPERANTISTO.

Fine S-ro Bordas legas sekretarian raporton pri la tasko de la Direkta Komitato en la intertempo 1913^a-14^a. Ĝi estas dokumento verkita per flua stilo, kiun oni aplaŭdas. La Kongreso elektas S-rojn

Domenech (J.) kaj Planas vicprezidantoj apud D-ro Bremón, kaj sekretarioj, F-non Vilaseca kaj S-ron Gili, post kio la kunsido estas finita.

DUA LABORA KUNSIDO

Posttagmeze, je la 3.^a, sub prezido de S-ro Domenech (Josep), pro subita negrava malbonfarto de D-ro Bremón, komenciĝas la kunsido; S-ro Bordas agas kiel sekretario, kaj S-ro Gili, vicsekretario. La salono de la Urbodomo, kie okazas la Kongreso, estas tutplena de esperantis-toj, kiuj aŭskultas atente la legadon de propono subskribita de S-roj Pujulà, Gili, Grau, Renom, Navas, Leonor, Amades kaj Horta, per kiu la Kongreso estas petata : eksigi el la Federacio la barcelonan grupon *Fajro*, kaŭze de ĝia agado kontraŭ la sukceso de la Kongreso kaj de publikigo en la urbaj ĵurnaloj de insidaj sciigoj.

La prezidanto donas la parolon al S-ro Grau, kiu defendas la proponon per dokumentoj kaj pravaj vortoj. La propono estis apro-bata unuanime.

Estas legata alia propono, subskribita de S-roj. Pujulà, Gili kaj Grau, kiuj petas ke la Kongreso deklaru esti vidinta kun plezuro la memvolan eksigon de la grupo *Esperanta Lernejo* el St. Feliu de Guixols, ĉar tio ŝparis al la Kongreso la malagrablan necesecon eksigi tiun grupon el la *Kataluna Esperantista Federacio* pro la nekvalifikebla agado de la grupo rilate la esperantistojn de St. Feliu kaj la sukceso de la Kongreso».

S-ro Grau, defendas la proponon kaj oni unuanime aplaŭdas aprobante ĝin. S-ro Vilaret, el St. Feliu de Guixols, petas kelkajn klarigojn pri la propono. S-ro Grau respondas, ke kvankam la propono estas aprobita, li tamen donos la klarigojn se la Kongreso permesas. Li diras, ke li kaj liaj kolegoj konsideras la esperantan ideon supera al ĉiuj personoj, kaj agas en konsekvenco. Protestas pri la malvastema spirito, kiu inspiris la agadon, cirkulerojn kaj komunikojn de *Esp. Lernejo* kaj esperas, ke tiu ĉi ŝanĝos sian konduton. S-ro Vilaret reparolas, rakontante, kio okazis de post la Kongreso en Olot, por pravigi la agojn de *Esp. Lernejo*, kaj S-ro Grau respondas al li kaj legas dekon de oficialaj dokumentoj, kiuj montras la nejustecon de l' kritikoj de *Esp. Lernejo*, kiu estas kulpa je malaprobindaj agado kaj sinteno kontraŭ Esperantismo kaj la Kongreso. La Kongreso refoje aprobas unuanime la proponon per grandaj aplaŭdoj kaj S-ro Vilaret, el *Esp. Lernejo*, kiu ne povis pravigi siajn dirojn, foriras el la salono.

Post tiuj du urĝaj proponoj, oni komencas la diskutadon pri la tagordo, kiu entenas la proponojn publikigitajn en nia numero de-Majo.

S-ro Amades, kiu proponas ke la Federacio etendiĝu al Mallorca, kaj turnu sin al la Federacioj en Valencia kaj Rusiljono por kunfandi Konfederacion Katalunan, petas, ke oni sciigu lin pri la laboroj por la Iberia Konfederacio. S-ro Pujulà promesas doni la sciigojn, sed li petas iom da tempo, por ke li povu konferenci kun siaj kolegoj el la ties komitato. S-ro Amades bonvole konsentas.

Alia propono de S-ro Amades estas ankaŭ aprobita, kun modifo prezentita de D-ro Coll, kaj konkretiĝas en la senco, ke la profesoroj de K. E. F. konsistigu kvazaŭ instituton esperantistan katalunan, kiu dediĉos sin, helpita de la katalunaj lingvokomitatoj, al studado de la kataluna lingvo rilate Esperanton. Tiun korporacion devus konsulti la Komitato de la K. E. F. ĉe kiu ajn lingva dubo.

D-ro Coll proponas kaj la Kongreso sankcias, ke oni ne povos pretendi la diplomon pri *profesoreco* sen antaŭa posedo de la diplomo pri *kapableco*. La Kongreso aprobas ankaŭ laŭ propono de D-ro Coll, ke la ekzamenaj tribunaloj povos liveri diplomojn pri kapableco, kondiĉe ke ili submetiĝu al la kutimaj kondiĉoj kaj sendu la aprobitajn skribajn ekzercojn kun certigo pri la ekzameno al la Komitato de K. E. F.

Ankaŭ laŭ peto de D-ro Coll la Kongreso prenas rezolucion, ke oni ne povos ŝanĝi la datojn de Kongreso, kiam ili estos definitive fiksitaj, escepte en okazoj de absoluta perforto, laŭ opinio de la Komitato de la Federacio.

Por la redakto de regularo por la kongresoj oni elektas specialan komisionon, kiu per la spertoj de la antaŭaj kongresoj, fiksos bazojn de regularo, kiujn oni provos en la venonta Kongreso. Tia estas alia propono de D-ro Coll. S-ro Bordas, en nomo de la Komitato, klarigas, ke tiu ĉi estas preninta decidon efektiviĝi la proponitan aferon, pro kio la Komitato aliĝas al la propono, kiu estas aprobita. Oni elektas por la komisiono S-rojn Rosals, Coll kaj Grau.

Proponojn de S-ro Grau pri nova redakto de reguloj el tiuj de la Konservantaro de la Floraj Ludoj, oni aprobas post malmultaj vortoj de la proponinto.¹

S-roj Pujulà kaj Grau prezentas al la aprobo proponon, por ke la Kongreso decidu, ke S-roj Gustau Galcerán, Joan Rosals kaj Joaquim Coll estu oficiale prezentataj de la K. E. F. kiel kandidatoj al la Lingva Komitato. Unuanima aplaŭdado aprobas la proponon.

Kaj la prezidanto fermas la kunsidon je la 5'30.

1. Vidu antaŭan numeron de *Kataluna Esperantisto*.

DIVERSAJ AMUZOJ

Post la labora kunsido la tuta kongresanaro forlasas la Urbotomon, kaj iras al la sportkampoj de la «Ateneo Social» kie du bandoj ludas piedpilke, en honoro de la esperantistoj. Ĉirkaŭ la areno ni salutas la tutan pioniraron kaj la plej distingindajn familiojn el la urbo.

Tagmeze kaj vespere en tiu, kiel en la sekvanta tago, ludado de la popolaj dancoj *sardanes* okazis en la promenejoj kaj tie ni vidis multajn el niaj samideanoj partoprenantajn en la simbola rondo apud la enurbanoj, kiuj tre ŝatas jam la viziton de la esperantistoj, kies restadon en la urbo ili klopodas pliagrablyi.

Aliaj esperantistoj profitante je la longega krepusko faris ĉe la noktiĝo boatpromenadojn en kaj ekster la haveno, en kiuj partoprenis entuziasme ankaŭ multaj fraŭlinoj. Kantoj kaj ĝojaj krioj aŭdiĝis super la serena maro ĝis kiam por noktomanĝo oni albordigis.

Vespere je la 10^a la salono de la Nova Kazino «La Constancia» estis efektive troplena de gaja junularo. La solena balo dediĉita al la kongresanoj kunvenigis tien amasegon da personoj, kiujn ne povis komforte enteni la salono. Dancado daŭris post noktomezo.

29^a de JunioDISERVO KAJ KUNVENO
DE LA KATOLIKOJ ESPERANTISTOJ

En la paroĥa preĝejo okazis je la 8^a matene solena diservo, kiun la katolikoj organizis, kaj ĉeestis multe da kongresanoj. P-tro Casanovas, el la Ĝerona Seminario, faris elokventan esperantan predikon, ĉe kies fino li resumis katalune ĉion diritan, por montri al la katolikoj, ke ankaŭ ili povas kaj devas uzi Esperanton, kiu estas taŭga lingvo por ĉiuj interrilatoj.

Je la 5^a posttagmeze ĉe la teatra salono en la lernejo de *Hermanos de la Doctrina Cristiana* kunvenis la katolikaj Esperantistoj sub la prezido de S-ro J. Rosals, kiu malfermis la kunsidon per vortoj de kuraĝo kaj gratulo, tial ke la K. L. de K. E. estas nombrita per aliĝo de novaj grupoj kiel *Tarragona Katolika*; *Studenta Juneco*, el Ĝerona kaj *Flugila Penso*, el Ventalló (Ĝerona), kies delegitoj partoprenis tiun kongreseton, kaj ankaŭ *Stelanoj* el Molins de Rey (Barcelona).

La financa raporto de la jaro elmontris la prosperan staton de la kaso.

Krom aliaj interkonsentoj, koncernantaj ĉefe propagandon, oni decidis fondi konsultan komitaton, kiu konsistos el ĉiuj membroj kaj eksmembroj de la Direkta Komitato.

La novaj estraranoj de la *Kataluna Ligo de Katolikaj Esperantistoj* estos : *Prezidanto*, S-ro Johano Rosals, el Barcelona; *Vicprezidanto*, D-ro J. Casanovas, el Gerona; *Sekretario*, S-ro Antonio Miquel, el Barcelona; *Vicsekretario*, S-ro Johano Arnella, el Barbaŝ; *kasistino*, F-ino M. Gili, el Barcelona; *Voĉdonantoj*, S-roj Henriko Adam, el Sarria kaj Tomaso Penalva, el Sabadell.

TRIA KAJ FERMA KUNSIDO

Prezidas D-ro Bremón. Sekretarioj, S-roj Bordas kaj Gili. Je la 10^a komenciĝas la kunsido per legado de kelkaj komunikoj kaj de propono de S-ro Grau, per kiu li celas plibonigi la financan situacion de la K. E. F. La rimedo konsistas en pruntoj de 10 pesetoj ĉiu, al la Federacia kaso, kiu redonos ilin al la pruntedonintoj, kiam en kaso ekzistos certa monsumo. Partoprenas en la diskutado S-roj Grau, Rosals, Coll kaj Piferrer, kiujn por ekzameni la aferon la Kongreso elektas, rifuzinte proponon de S-ro Rosals plialtigi ĝis 4 ptoj. la kotizaĵon.

Estas unuanime aprobitaj la sekvantaj proponoj de D-ro Bremón subskribitaj de kelkaj aliaj kongresanoj.

— Sciigi la Societon por altiro de alilandanoj, de Barcelona, ke la kataluna esperantistaro vidos kun plezuro la represon de gvidlibroj esperantaj, kies redakton la K. E. F., se okaze, prenus sur sin.

— Proponi siajn servojn al la Urbeŝtaro de Barcelona por la organiza kaj propaganda laboroj de la Internacia Ekspozicio de Elektaj Industrioj.

— Rememorigi ĉiujn profesorojn de Esperanto, ke laŭ reĝa ordono oni povas instrui nian lingvon en ĉiuj oficialaj instruaj institucioj de Hispanujo.

— Peti de la «Mancomunitat Catalana» subvencion por publikigo de Antologio de katalunaj verkistoj, en Esperanto.

— Gratuli la barcelonan Urbkonsilantaron por ĝia decido permesi al la urbaj gardistoj la uzon sur la uniformo de esperantistaj insignoj.

— Danki la Urbeŝtaron de St. Feliu de Guixols por la alprenado de la nomo de D-ro Zamenhof por la strato «Travessia de Guixols».

Estas legataj la proponoj de *Tarragono Esperanta*, jam publi-

kigitaj. Ilin defendas S-ro Obiol, kaj partoprenas en la diskutado S-roj Costa kaj Grau, kiu donas la formulon de la solvo. Oni decidas, ke la grupoj aliĝintaj al la K. E. F. devas havi almenaŭ 5 membrojn en urboj ĝis 1000 loĝantoj; kaj pli ol 10 en la ceteraj urboj.

S-ro Pujulà donas la promesitajn sciigojn pri la Iberia Konfederacio, kaj S-ro Amades retiras sian proponon.

Post paŭzo de kelkaj minutoj por interkonsenti pri la elektota Komitato, oni reprenas la diskuton. S-ro Rey en la nomo de la Komitato prezentas al la elekto de la Kongreso la jenan kandidataron:

Prezidanto : S-ro G. Bellsells, Barcelona; *Vicprezidanto* : S-ro G. Galceràn, Vilanova i Geltrú; *Sekretario* : S-ro J. Ventura, Terrassa; *Vicsekretarioj* : S-roj J. Buyé kaj Ll. Renóm, Barcelona; *Kasisto* : S-ro J. Piferrer, Sabadell; *Administristo* : S-ro J. Serrat, Barcelono.

Longa aplaŭdado salutas la novajn komitatanojn, en kies manojn metas la esperantistaro kataluna la direktadon de la Federacio.

Por la VI Kongreso oni elektas la urbon Vilanova i Geltrú kaj la Kongreso prenas rezoluciojn, danki la malnovan Komitato de la K. E. F., la urbestron de St. Feliu, la Organizan komitato de la Kongreso kaj la Urbestaron de St. Feliu de Guixols.

Eniras en la salonon la urbestro kaj ceteraj aŭtoritatoj, kiujn S-ro Bremón salutas en la nomo de la esperantistoj kaj dankas por la afableco kaj gastamo de la enurbanoj, kiuj post iom da ŝanceliĝo volis fine helpi al la brilo de nia Festo. La Urbestro S-ro Durán en la nomo de la urbkonsilantaro bedaŭras, ke la restado de la kongresanoj en la urbo estas nur dutaga. Li sentas sin fiera pri la serena tasko farita de la Kongreso kaj gratulas la esperantistojn por la trankvilanimeco montrita. La elokventaj vortoj de S-ro Durán ricevas longan aplaŭdadon post kiu oni konsideras je tagmezo finita la Kongreson.

LA STRATO DE D-RO ZAMENHOF

Tra la bela mara promenejo, post la urbaj gardistoj en parada uniformo iras la tuta urbestro sub prezido de S-ro Durán, sekvata de ĉiuj esperantistoj kaj de multenombra publiko, al la nova strato de D-ro Zamenhof por malkovri la tabulon kun lia nomo.

Sur provizora estrado speciale lokita, aperas sinjoro urbestro kun la urbkonsilantoj kaj reprezentantoj de la esperantistaro. S-ro Durán faras tre belan paroladon: ni donis la nomon de la elpensinto de Esperanto al strato kuŝanta kontraŭ la maro, ĉar tiu ĉi

kiel Esperanto, faciligas la rilatojn inter la homoj. St. Feliu amas la maron, ĉar ĝi portas al la urbo la novajn sentojn de progreso kaj kulturo, kiujn Esperanto ŝirmas sub siaj faldoj; de nun St. Feliu amos ankaŭ pro sama kaŭzo la lingvon Esperanto. La tuta urbo, oni povas aserti, kiu ĉeestas la solenon, aŭskultis atente la belan parolon kaj aplaŭdis entuziasme S-ron Duràn, kiu post kiam S-ro Corbera, urba sekretario, legis raporton pri la oficiala decido alpreni la nomon de nia majstro, fortiris kurteneton kaj aperis la marmora tabulo, kiu ŝanĝas la nomon de la strato.

En la solena momento, estis ludata *La Espero*, kiun oni ape-naŭ povis aŭdi pro la bruego de l'aplaŭdoj de la publiko kaj de la krioj *vivu* de la esperantistoj. D-ro Bremón, kun emocia voĉo, dankas tre kore ĉiujn, kaj la tuta ĉeestantaro foriras, akompanante manifestacie ĝis la Urbodomo la Urbestraron kaj aŭtoritatulojn.

Estis jam unu horo posttagmeze, kiam la ceremonio estis finita, kaj la esperantistoj rapidis al kafejo ĉeesti la amuzan feston de la esperantistaj okulvitruloj. El ili, ĉirkaŭ trideko sidis apud la tabloj kaj solenigis la trinkadon de la vermuto per ĥora legado de la *Okulvitrula himno* de S-ro Pujulà. Ne necese diri, kiom da gajo estis ĉe la malserioza kuntrinko.

OFICIALA FESTENO

En la partero de la teatro «Novitats» oni disponigis la tablon *U'forman por la oficiala festeno*, kiu kunigis naŭdekon da kunmanĝantoj. Je la dua posttagmeze eniris en la teatron F-ino Rosa Batet, la Reĝino de la Floraj Ludoj, kiu volis honori nin, prezidante la fratan festenon. Aplauĝego salutis ŝin, kiu iras okupi la prezidan lokon inter la Urbestro S-ro Duràn kaj la Prezidinto de la Kongreso, D-ro Bremón. Dum la manĝado, gajaj ridoj kaj kora ĝojo aspektigis ĉarme ĉiun vizaĝon, kaj oni uzis la menukartojn por kolektado de aŭto-grafoj pli prefere, ol por konsultado de la menuo.

Kiam la ĉampano estis malŝtopita, komencis la tostojn S-ro Grau, kiu salutis la Reĝinon en la nomo de la Komitato de la Floraj Ludoj. Sekvis S-ro Rourich el la Organiza Komitato, S-ro Pujulà, D-ro Coll, la gajninto de la Natura Floro S-ro Domenech, la urbestro S-ro Duràn, la provinca deputito S-ro Irla kaj D-ro Bremon, kiu finis la serion. Iliaj inspiritaj tostoj vekis longajn aplaŭdadojn, kiuj mallongigis la horojn tiamaniere, ke oni devis forlasi la tablon tre baldaŭ, por faciligi la aranĝon de la teatro, kie estas okazonta post unu horo la Festo de la Floraj Ludoj.

La Festo de la Floraj Ludoj



BELEGA festo!

Ĝi estis sendube la plej ĉarma el ĉiuj la kongresokazoj, kaj ĝia rememoro neniam malaperos el la animo de tiuj, kiuj ĝuis la plezuron ĉeesti tiun tiel ravantan solenaĵon.

En la grandampleksa teatro «Novitats», la plej vasta kaj luksa el Sant Feliu, belarte ornamita, elbordigadis amaso de Ĝisul-anoj avidaj de sciigo pri la afero esperanta, kiu tiel dismovas la tutan vivon de la urbo dum tiuj ĉi du tagoj. Belegajn virinojn, riĉajn sinjorojn, la plej gravajn kaj distingindajn familiojn, la plej konatajn personojn el Sant Feliu, oni povis vidi tie jam de longe antaŭ la komenco de la festo montrante per siaj interparoloj la intereson en ili vekigitan pri nia afero. Tio-ĉi interne de la festejo.

Ekstere, la tuta geurbanaro, kiu ne estis povinta atingi invitkarton, amase restis apud la enirejo envieme rigardante tiujn, kiuj feliĉe povis montri la deziregatan enirilon, aŭ jen laŭlonge de la strato ĝi atendis la finon de la okazantaĵo, partoprenante entuziasme la aplaŭdojn de la enaj ĉeestantoj.

Unuvorte, ŝajnas kvazaŭ la tuta vivo de la urbo estis koncentrigita internen aŭ ĉirkaŭen de la teatro «Novitats».

Jen la festo komenciĝas. Sur la scenejo, oni vidas bele aranĝitan tronon, ĉe kies flankoj staras seĝegoj por la sekvantaro de la reĝino. Dekstre de la trono sidas la Konservantaro de la Esperantaj Floraj Ludoj kun la Juĝantaro, kaj maldekstre apud la aŭtoritatuloj, la Sekretario kiu tuj kiam la Urbestro, S-ro Duràn, elparolas la malferman frazon, *la festo komenciĝas*, leviĝas kaj en la religia silento de la ĉeestantaro legas la jenan raporton, per laŭta voĉo kiu povas apenaŭ potenci la bruon de la ĉeestantaro.

«Sinjorinoj kaj sinjoroj:

Se la plezura tasko prezenti al vi la bonodoran bukedon elŝiritan el nia literatura kampo ne venkus mian timon, mi ne kuraĝus per miaj vortoj senagordaj disrompi la ritmon de la ĉarma kanto, kiun akorde kun niaj koroj avidaj de ideala ripozo, faras tiu maro multkolora milde karesanta la senkomparan rokaron, apud kiu kuŝas la bela urbo nin gastiganta.

Vojon krutan ni trairas la tutan jaron kun la espero atingi supron, kie ripozi trankvile, kaj kvazaŭ ni volus forgesi unu momenton la dornojn, kiuj pikis nian korpon kaj la ŝtonojn, kiuj faletigis nin, ni kunvenas ĉiujare en la ravanta ĝardeno de nia poezio kaj ĝuas dum

halto la parfumon de ĝiaj floroj, el kiuj — kiel abeloj mielon — ni sučas kuraĝon por nova marŝado kaj forton por novaj bataloj. Hodiaŭ post la malkvieta kaj agitita longa penado, ni povas fine en la sereneco de tiu medio, kiun Naturo por ni plibeligas, ĝui per tuta koro la plej purajn emociojn.

Ni venis ĉi tien kun plenaj niaj sentoj de ĉiuj parfumoj, kiujn malŝpara kamparo disverŝas en la aeron; saturitaj de ĉiuj koloroj, kiujn suno kaj akvo rivalas naskadi; sentante en nia koro la ĝojon rigardi en la senfinon de sur tiuj mirindaj marbordoj, de kie nia animo ekflugus en alton dum nobla revo. Kaj ni venis, por partopreni en la triumfo de poeto, kiu sukcesis per sia inspiro kolorigi de belaj nuancoj la pure blankajn florajn naskiĝintajn en la bedoj de nia lingvo, kunigitajn en miriga bukedo, kiun li proponas al nia Reĝino. Kaj apud la poeto, kronitaj de laŭroj la fruntoj, genufleksos antaŭ ŝi aro da elektitoj, kies verkoj faras brilan kronon ĉirkaŭ la bela kanto, kiun la Juĝantaro de la Konkurso premiis per la Natura Floro.

Sed, jen la alta trono de l' Poezio restas ankoraŭ neokupita kaj estas jam tempo ke, por kontentigi vian deziron aklami la venkinton kaj la Reĝinon de li elektitan, mi malkaŝu iliajn nomojn.

S-ro **Arturo Doménech Mas** estas aŭtoro de la verko rekompetita per la Natura Floro.

Kaj en tiu solena momento, kiam mi devas proklami la nomon de la bela Reĝino, kiu prezidos nian Feston, mi volus, ceremonie paradante mian respekton al Ŝia Alta Moŝto, enkadrigi per nobela gesto miajn vortojn kaj resonigi ilin kun superbela muziko.

Gesinjoroj: Fraŭlino **Rosa Batet Vidal** estas nia Reĝino. Popolo ŝia, aklame salutu ŝin!

Je tiuj vortoj, ĉiuj ĉeestantoj, starante aklamas kaj longe aplaŭdadas, dum la belega fraŭlino Rosa Batet Vidal, sekvita de hela kortego de ĉarmaj fraŭlinoj eniras en la salonon, je brako de la poeto, kaj suprenirante la scenejon, okupas la tronon de poezio, meze de la ambaŭflanke sidanta sekvantaro. Kiam resilientiĝas, la Sekretario daŭrigas sian paroladon jene:

*«Reĝina Moŝto,
Hela Kortego,
Ekscelencaj sinjoroj,
Gesamideanoj:*

Mi volas antaŭ ĉio esprimi al vi mian dankon por la granda plezuro, kiun via elekto je mia persono havigis al mi, donante al mi okazon en du sinsekvaj jaroj ĉerpi kaj ĝui el la verkoj prezentitaj al Konkurso la belajojn entenatajn pli-malpli multe en ili ĉiuj, eĉ en tiuj mem ne meritintaj laŭrojn, kiuj havis tamen en si ion allogan devenantan mi ne scias ĉu de la lingvo mem, ĉu de la fido kun kiu ili estis verkitaj. Kaj mia danko estas tre granda, kvankam la plezuro senti post la plejmultaj verkoj la batadon de koro revanta je

venko kaj triumfo estis bedaŭrinde kompensita de la neeblo kroni ilin ĉiujn per premio kaj restigi tial ne realigitaj multajn iluziojn.

Malgraŭ tio, estis vera ĝojo por miaj kolegoj kaj por mi esplori kaj konstati la valoron de la verkoj, kiuj en multaj okazoj ŝanceligis nin, ĉar ili postulas grandan atenton por trovi en ili makulojn kapablajn klare vidigi ilian meriton. Tial, en kelkaj konkursoj ni decidis difini subpremiojn al verkoj, kiuj kvankam superataj de aliaj meritas esti distingataj el la ceteraj pro siaj specialaj kvalitoj.

La plej honoran premion la Juĝantaro aljuĝis al la verko atinginta la premion difinitan al *Versaĵo pri Amo*, ĉar ĝi estas la plej valora el ĉiuj verkoj prezentitaj al la kvar fakoj de la Ordinaraĵ temoj. Ĝi estas lirika versaĵo kun devizo *Volo estas povo*, riĉa je rimo kaj ritmo, verkita en la ĉarma formo de *reĝaj oktavo*j, per kiu aŭdigis siajn geniajn kantojn tiom da altaj poetoj.

Prosperis al la aŭtoro de tiu verko eviti kelkajn el la riskoj, kiujn prezentas la strofoj de li uzataj, por kiuj en la latindevenaj lingvoj, ĉefe en la hispana, ekzistas severaj leĝoj. La dekunusilabaj versoj, kiuj formas la *reĝajn oktavo*jn, povas akcepti nur du strukturojn, kiuj prezentas iajn malsimilajn rilate la komunan versafaradon en Esperanto. Dum ni ritmigas niajn versojn atentante precipe al la alterna sinsekvo de l' tonaj akcentoj, grupigante la silabojn en duojn aŭ triojn unuformajn, ĉe la versoj pritraktataj estas nur necese, ke la tonakcentoj restu sur la sesa kaj deka silaboj, aŭ se oni preferas la duan formon, ke la ĉefaj akcentoj falu sur la silabojn kvaran, okan kaj dekan. Tiujn ambaŭ formojn oni rajtas tamen enmiksi en strofo, kiel faris la aŭtoro de l' verko premiita. Oni riproĉas al tiu formo, ĝian iufojan malprecizecon, ĉar ĝi devigas ordinare la verkiston vastigi en multajn vortojn siajn pensojn, por ke ili alformiĝu al la ampleksa, malsimpla vesto. Tio estas ĝenerale evitita en la verko studata, kelkaj el kies strofoj estas plenaj de energio kaj vivo.

Rilate la rimon, mi povas diri ke ĝi estas perfekta en la tuta verko, kvankam en unu strofo ekzistas asonanco aŭ duonrimo inter la ne interrimantaj versoj; tamen, ĉar la asonanca rimo ne estas ankoraŭ bone konsciata de la esperantaj poetoj, la Juĝantaro ne atentis pri tio kaj konsiderinte entute la cirkonstancojn de l' verko aljuĝis al ĝia aŭtoro, S-ro **Arturo Domenech Mas**, el Barcelono, la Naturan Floron.▶

Nova aplaŭdado estas la eĥo de tiuj-ĉi lastaj vortoj, kiu daŭradas ĝis kiam la poeto deklame legas la premiitan verkon:

AmoDEVIZO : *Volo estas povo*

Amo! beninda nomo, kiu sonas
 por mi kvazaŭ belega melodio,
 dolĉega, sankta vorto, kiu donas
 la dolĉecon al kor' de l' ambrozio;
 dian, oritan liron mi bezonas
 por esprimi per dolĉa poezio,
 kiel vi sola estas por la homo
 la plej bela, ŝatinda, ĉarma nomo.

Sen vi la vivo estus nur malĝojo,
 bedaŭro, malfeliĉo kaj ĉagreno;
 sen vi estus por hom' la viva vojo
 plenda, larma ekzil', sencela peno;
 sed se vin ĝuas hom' por unu fojo,
 ŝanĝigas tiu mondo je Edeno
 kie anstataŭ larmoj kaj doloroj
 nur loĝas poeziaj, ĉarmaj floroj.

Pro vi varton, nutradon, kisojn, lulojn
 malŝparas la patrino por infano,
 kaj ruĝigas la plor' ŝiajn okulojn,
 aŭ kaŝigas en ŝia brust' vulkano
 da korpremaj ekĝemoj, kiam brulojn
 febrajn ardigas en filet' malsano.
 La dolĉa de patrin' am' emocias
 ĉar pli ol ŝi neniu ami scias.

Pro vi, kiam eksonas la signalo
 ke la patrujo estas en danĝero,
 la junularo kuras al batalo
 por prezenti al malamika fero
 siajn brustojn, por morti se fatalo
 ĝiajn korpojn restigos sur la tero;
 ĉar morto por patruj' ne kaŭzas ploron,
 ne, la patruja am' nur donas gloron.

Pro vi, la Bonfarad' la mondon regas
 kaj en la hospitaloj kaj aziloj
 jen maljunulon en malsano flegas,
 jen orfon vartas ĝiaj la gefiloj;
 gefiloj sanktaj, kies nomojn legas
 sur oraj paĝoj la homar' je miloj.
 Al vi sendas poet' vorton salutan,
 am', kiu amas la homaron tutan!

Pro vi, kaŝite en l' arbar' ĉestas
 feinoj ofte de l' fianĉ' l' amjesojn,
 dum en branĉaro jen silente restas
 birdaro aŭskultante la promesojn
 de l' gefianĉoj, jen ĝi ĥore festas
 per siaj triloj amajn la karesojn,
 kiam eksonas en l' arbara paco
 ĉu honta kiso, ĉu krakanta ŝmaco.

Pro vi, nur pro vi, ĉiam en Naturo
 resonas de la viv' la ĉarma kanto:
 am'! bruas de l' venteto la murmuro
 lulante papilion sur galanto,
 am'! zumas burd' trinkante kun plezuro
 la roson de l' florar' el diamanto,
 am'! trilas najtingal' sur branĉ' sonore,
 am'! eĥe la birdar' retilas ĥore.

Amo ĉie kaj ĉiam; eĉ la ondo
 de l' mar' bruante am'! lekas la rokon;
 eĉ la fulmanta el nubegoj rondo
 ĉirkaŭanta la monton tondras vokon
 al am'!, resonigante de la mondo
 eĉ la plej malproksiman, lastan lokon;
 ĉie, ĉie l' am' estas : en aero,
 en mar', en mont', en val', en tuta tero.

Amo! beninda nomo, vorto bela,
 por la lip' dolĉa kiel nektar' dia,
 rava por l' aŭdo kiel son' ĉiela,
 de ĉarmoj font', inspiro poezia,
 gajo de l' koroj, de la viv' cel' hela!
 Jen estas l' eĥo de la kanto mia:
 Amo! vi sola estas por la homo
 la plej bela, ŝatinda, ĉarma nomo.

ARTURO DOMENECH

Resonas denove la aplaŭdoj kaj daŭras la legado de la Sekretario:

«Kvar aliajn verkojn inter la multaj versaĵoj pri amo prezentitaj, la Juĝantoj konsideris citindaj kaj ekzameninte ilin atente, aljuĝis al ili la sekvantajn subpremiojn.

Unuan al la verko n.º 60 kun devizo *E vidi una leggiadra donna e bella su l' erba*. Ĝia aŭtoro estas S-ro Josep Rosselló Ordinas, el Sant Joan, Mallorca.

Duan al la verko devizita *Mortinto*, kiu ricevis la numeron 16, kies aŭtoro S-ro Karl Franke, mortis en Dresdenu (Germanujo) en

jaro 1911^a. S-ro Albert Brandel, kiu disponas pri liaj verkoj laŭ testamenta ordono, sendis tiun al la Konkurso, kaj la laŭron, kiun ĝi meritas, li metas sur la tombon de l' amiko malaperinta, je kies memoro kaj honoro mi petas vin, bonvolu stariĝi unu momenton.»

Kortuŝanta sceno! Je tiu peto, la tuta ĉeestantaro kvazaŭ risorte stariĝas kaj dummomente, per solena silento, tributas al premiita mortinto funebran rememoron.

«Tria subpremio estas difinita al versaĵo n.º 2, kun devizo *Kiu*, originale verkita de Fratinoj Teresa kaj Eulalia Rosell, el Vilanova i Geltrú.

Fine, kvaran subpremion ricevas la verko n.º 27, prezentita sub la devizo *Omnia vincit amor, nos et cedamus amori*, kies aŭtoro estas S-ro Clarence Bicknell, el Bordighera (Italujo).

La premio difinita al la prozaĵoj pri amo estas aljuĝita al la verko n.º 6, devizo *Amo superas morton*, kies korekta lingvaĵo estas rimarkinda. Ĝia aŭtoro estas S-ro **Paul Blanc**, el Toulon (Francujo).

Subpremion ni aljuĝas al la verko n.º 9 devizita *Ruto*, kiu pro sia stilo distingigas klare el la ceteraj. Aŭtoro estas F-ino **Louise Briggs**, el Armley (Anglujo).

Tradukojn de la versaĵo «Marina» de Apeles Mestres oni sendis naŭ al la Konkurso. La premio estas difinita al verko n.º 3, *Mi scias nur, ke mi nenion scias*, pro ĝia fideleco en la tradukado kaj tial ke ĝi konservas la originalajn rimon kaj ritmon. Ĝia aŭtoro estas S-ro **Josep Ventura Freixas**, el Terrassa.

Ankaŭ la proza peco «La enconĝida» de Raimon Casellas tentis la plumon de multaj samideanoj kaj kelkaj bonaj verkoj aspiris al la premio. Tamen neniu el ili plene kaj ĝuste tradukas la originalon, kies nuancojn oni ne konservas tute en la ekzamenitaj tradukoj. Pro ĝia flua stilo kaj pli multa ĝusteco, la premio estas aljuĝita al la verko n.º 28, devizo *Enconĝida*. Estas ĝia aŭtoro S-ro **Marià Solà**, el Terrassa.

En la *eksterordinaraj temoj* la premion «arta objekto» proponitan de la Nova Kazino «La Constancia» de Sant Feliu de Guixols, al verko pri la temo «Influo de Esperanto en la socia ekonomia problemo» ricevas la verko n.º 61, devizo *Frato, mi amas vin!* Aŭtoro : D-ro **Joaquim Coll Agramunt**, el Barcelono.

La 50 pesetojn premion donacitan de la «Ateneo Social de Sant Feliu de Guixols» la Komitato aljuĝas al la verko n.º 18, kun devizo *Sub la sankta signo de l' espero*, en kiu la temo proponita «Kiamaniere Esperanto povas kontribui al la socia movado» estas bone pritraktata. Aŭtoro : D-ro **Joaquim Coll**.

La grupo «Semo» el la Enciklopedia Popola Ateneo de Barcelona proponis premion da 25 pesetoj al la plej bona traduko de la ĉapitro VI de la fama verko de S-ro Prat de la Riba «La Nacionalitat Catalana.» Ses tradukoj aspiris al la premio kaj post esploro de iliaj kvalitoj, ĝi estas aljuĝita al tiu portanta devizon : *Tagiĝo, tagiĝo radias en rondo!* kiu estas la plej korekta. Aŭtoro : S-ro **Josep Ventura**.

Aspirante al la premio 50 pesetoj de la grupo «Frateco» de Sant Feliu de Guixols oni prezentis kelkajn verkojn pri laŭvolaj, diversaj temoj. El ili la Juĝantoj elektis la verkon n.º 55, devizitan *Eble*, kiu estas ĉarma teatraĵo por infanoj; ĝia alloga naiveco kaj korekta lingvaĵo faras ĝin tre ŝatinda. Aŭtoro : F-ino **Louise Briggs**.

Tri verkoj celis la malavaran premion 100 pesetoj, kiun Iliaj Moŝtoj S-roj Bonaventura Sabater, Miquel Matas, Vicens Folgado kaj Josep Irla, provincaj deputitoj, proponis por la interesa temo «Utilo alportota de helpa internacia lingvo al la komerco». Du el ili meritas rekompencon, sed ĉar la diferenco inter ambaŭ estas sufiĉe multa por ne devigi la Juĝantaron dividi la premion, ĉi tiun oni aljuĝas al verko, n.º 38, prezentita sub devizo *Ĉu mi?* Ĝia aŭtoro estas S-ro **Bruno Migliorini**, el Venezia, Italujo.

Al la alia verko n.º 49, devizo *Merkuro*, estas aljuĝita subpremio. Aŭtoro : S-ro Josep Monjonell, el Barcelono.

Du temoj restis ne konkursitaj : tiu proponita de «El Guixolense» pri la «Influo de Esperanto en la komerca disvolviĝo de l' nacio» kaj la temo de «La Revuo» «Verki originalan biografion de kataluna muzikverkisto». Ni bedaŭras, ke neniu prenis sur sin la taskon verki pri tiuj temoj, pri tiuj tiom da interesaj povus esti skribitaj.

La premio de la «Kataluna Katolika Ligo» proponinta kiel temon versaĵon al la Virgulino de l' Espero, estas aljuĝata al la verko n.º 10, devizo *Ave Maris Stella* tre flue versigita. Aŭtoro estas S-ro **Clarence Bicknell**, el Bordighera (Italujo).

Unuan subpremion ricevas la verko pri sama temo prezentita sub devizo *Reĝino Ĉiela*, kies aŭtoro estas ankaŭ S-ro Clarence Bicknell.

Duan subpremion ricevas la verko, n.º 57, *Mater Amabilis*. Ĝia aŭtoro estas Profesorino Rosa Junck, el Bordighera (Italujo).

Al verko de laŭvola temo S-ro Esteve Rey, provizora prezidanto de nia Kataluna Esperantista Federacio, proponis premion kaj por aljuĝi ĝin la Juĝantaro trarigardis ĉiujn verkojn prezentitajn sub la epigrafo «laŭvola temo» kaj elektis el ili la tre belan kvankam mallongan versaĵon, n.º 45, devizo *Salix Babylonica*, al kiu estas aljuĝita la premio. Estas ĝia aŭtoro S-ro **Clarence Bicknell**.

Ĉiuj premiitoj, unu post la alia, persone aŭ per siaj delegitoj ricevas de manoj de la Reĝino la premiojn, kaj legas la verkojn, kiuj estas varmege aplaŭdataj de la aŭskultantaro.

La Sekretario finis sian raporton per la jenaj vortoj.

«La tasko de la Komitato de la IV^a Floraj Ludoj estas finita. Ĝiaj membroj forlasos sian postenon kun la espero, ke ĉiuj samideanoj aprobos ilian agadon kaj kontentaj, ke malgraŭ la ĉiuspecaj baroj renkontitaj la sukceso de l' Konkurso estis brilanta. Tion ni ŝuldas al la efika kunlaboro de la esperantistaj gazetoj, kiuj publikigis la liston de premioj kaj temoj; tion ni ŝuldas al la malavaraĵoj donacintoj de premioj, kiuj montris per ili sian estimon al nia lingvo; tion ni ŝuldas ankaŭ al la estimindaj samideanoj, kiuj partoprenis en la konkurso,

kaj tion ni ŝuldas fine al vi, respektindaj aŭtoritatuloj; al vi, amindaj loĝantoj de la gastama kongresurbo; al vi, karaj samcelanoj ĉeestantaj, kaj ĉefe al vi, ĝentila Reĝino, kiu kun via bela Kortego, estas la plej granda ĉarmo de tiu ĉi Festo.

Al vi ĉiuj nian dankon senceremonian, profundan, el tuta koro. Vi ĉiuj kontribuis al la sukceso de la entrepreno al ni konfidita. Sentante kun ni la estimon de la popolo de vi reprezentata, respektindaj aŭtoritatuloj, ni laboris konfide; certaj pri via bonvolo, amindaj gastigantoj niaj, loĝantoj de la nobla St. Feliu, ni klopodis entuziasme; dezirante vian kuneston, amataj niaj samideanoj, por gustumi la fruktojn de la nunjara rikolto, ni penis konstante; por demeti ĉe viajn piedojn la plej freŝajn florojn de nia literaturo, ho ĉarma Reĝino, viva simbolo de l' Belo kaj Amo, celoj de nia agado, ni laboris senlace. Ni fine sukcesis, kaj via ĉeesto en la soleno de niaj Floraj Ludoj estas plej bona premio por nia laboro; tial ankoraŭ unu fojon mi esprimas nian dankon.

Kaj mi volus, ke tiuj karaj kaj eminentaj samideanoj niaj, D-ro Leono Zamenhof kaj S-ro John Mabon Warden, kiuj tiel afable akceptis lokon apud ni en la Komitato de l' Konkurso, povus spiri tiun ardan atmosferon de Espero kaj Fido, por ke ili ricevu el ĝi persone la esprimon de l' simpatio de la katalunaj amikoj kaj la konstaton pri la forto de nia ideo en nia kara lando. En la nomo de l' katalunaj komitatoj de la IV^a Floraj Ludoj, mi petas vin, karaj aŭskultantoj, volu esprimi per aplaŭdado al S-roj Leono Zamenhof kaj John Mabon Warden vian simpatian kaj nian dankon por la helpo, kiun ili donis por la prestiĝo de siaj nomoj al la sukceso de nia konkurso.

Kaj jen mi ĉe l' adiaŭo. Ni kune forgesis kelkajn momentojn la malŝatindan prozon de l' malaltaj bataloj, lulate de l' kantoj de niaj poetoj. Ni ripozigis kune nian spiriton en la fantazia ĝardeno de nia literaturo. Ni tuj disiros kaj rekomencos nian laboradon por Esperanto; ni ekiros denove sur la ŝtonplena vojo borderita de profundaj abismoj; indiferenteco, malvarmo kaj nekredemo baros forte ĝin. Ni havu kuraĝon; rememoro pri tiu ĉi Festo nin akompanu dum la iro kaj gvidu rekte nin; post unu jaro, post unu mallonga jaro, venkinte ĉiujn malhelpojn, ni denove povos ripozi kaj renovigi niajn fortojn en alia Festo simila al la okazanta.

Ni ne forgesu, ke ju pli alten vojo kondukas, des pli kruta ĝi estas. Ni forjetu de ni ĉiun timon, ĉiun malkuraĝon kaj ni iru konfide supren, ĉar nia vojo estas la bona. Post daŭra konstanta marŝado ni fine alvenos al la alta supro, de kie Esperanto lumos helege al la homaro ĝin kondukante sur vojo de paco kaj amo al konkiro de ĉia perfektigo kaj feliĉeco.

La kruta vojo, kiun ni trairas hodiaŭ, aspektos kiel sensignifa linio sur ebenaĵo, kaj ni povos tiam rigardi ĉirkaŭen, ĝojaj ke nia laboro ne estis vana, kaj ke ni helpis starigi sur la tero tiun grandan idealon, kiu enteniĝas nuntempe en la kara nomo Esperanto.»

JOSEP GRAU

Kiam S-ro J. Grau finas sian raporton, Pastro Planas kiu prezidas la Juĝintaron staras, haltigas la longan aplaŭdadon per kiu la publiko gratulas la sekretarion, kaj donas la parolon al S-ro Fred. Pujulà, kiu antaŭakceptis improvizi paroladon se en la lastaj momentoj la manuskripto de D-ro Leono Zamenhof ne estas alveninta¹. S-ro Pujulà, per voĉo lacigita de la kongresaj laboroj penas aŭdigi en la grandioza teatro sian improvizaĵon, kiun stenografias unu el niaj amikoj.

*«Regina moŝto,
Distingindaj fraŭlinoj de la Kortego de Amo,
Eminentaj aŭtoritatoj,
Sinjorinoj kaj Sinjoroj.*

Antaŭ kelkaj jaroj, kiam okaze de milita stato la vivo en Barcelono estis haltigita, mi havis la honoron, en tiu ĉi urbo kaj en tiu ĉi sama teatro, prezidi antaŭ vi feston de katalunaj Floraj Ludoj kiuj devis, sed ne povis, okazi tie. Hodiaŭ mi havas la honoron paroli al vi en la loko de nia forestanta prezidanto de tiu ĉi festo de Esperantistaj Floraj Ludoj. Tiam ni festis la lingvon de niaj prapatroj; nun ni festas la lingvon de niaj pranepoj. Tiam ni flugis al la idealo de beleco kiel katalunoj; hodiaŭ ni flugas al regno de poezio kiel homoj. Nenion ni devis forlasi el ni mem por paroli al vi per la lingvo per kiu mi nun uzas vian atenton, sed male, ni nur bezonis vekti la internacienon, kiu dormetas en la koro de ĉiu bona kataluno. Mi staras antaŭ vi pli kataluna ol antaŭe, ĉar mi min sentas pli homa; kaj mi estas certa ke la eminenta polo, kiu spirite nin prezidas, subskribus tiujn miajn vortojn kaj sentojn.

Mi nur miras, ke mi, la plej humila inter ni ĉiuj, estis elektita por resumi la feston anstataŭ la eminenta doktoro Leono Zamenhof, kies manuskripto bedaŭrinde ne ĝustatempe venis al nia komitato. Mi penas klarigi al mi la kaŭzon de tiu por mi tiel granda honoro, kaj mi nur scias vidi ĝin en la amikeco, tiu granda nobla sento kiu tiel bone floras en la ĝardeno de Esperantismo, kaj tiel nature kiam per ĝi ni leviĝas tre alten en festoj kiel la nuna. Granda amikeco efektive kunigas min al nia Prezidanto; amikeco obligita de la povo de nia lingvo. Se nun ankoraŭ la scienco ne sufiĉe progresis por nuligi la distancon inter la korpaj, nia lingvo jam nuligis ĝin por la spiritoj; se la persono de nia prezidanto ne troviĝas ĉi tie, mi povas tutbone reprezenti lian spiriton pro nia amikeco, kiu kvankam ne povas fari la miraklon, ke mi diru al vi la belajn aferojn, kiujn li mem certe estus dirinta, tamen permesas al mi, sen antaŭa interkonsento, danki kaj gratuli en lia nomo la Reĝinon kaj sian kortegon, la honorigan aŭtoritaton kaj la inspiritajn poetojn.

1. La rusa cenzuro retenis kelktempe la manuskriptojn por esplori senditajn al D-ro Zamenhof, kaj prokrastis tiukaŭze lian partoprenon en la Literatura Konkurso.

Alia amikeco pravigas mian staron antaŭ vi; tiu, kiun mi kun-sentis kun nia prezidanto, kaj pri kiu li certe estus farinta aludon en sia parolado. Ĝi estas la amikeco, kiun ni sentis, Leono Zamenhof kaj mi, por Carlo Bourlet, tiu nobla, inteligenta, eminenta viro, kiun la morto senkompate ferrabis de niaj funebrantaj vicoj. Li, la unua inter la alilanduloj, sentis la efikecon, povon, ravigon, sorĉon de niaj Floraj Ludoj, kaj tion li pruvis ne nur per la helpo, kiun li alportis al tiuj, kiujn ni festis dum la V^a Internacia Kongreso, ne nur per la alportita ĉiun jaron al la Florludoj de niaj Katalunaj Kongresoj, sed per sia intenco okazigi Florajn Ludojn en Parizo dum la X^a Kongreso de Esperanto, ebligante per la okazo ke oni povu certigi, ke se en la progresema Franca Ŝtato troviĝas la lando, kiu per la elpenso de la Floraj Ludoj ebligis al ni Katalunoj, post kelkaj jarcentoj, la restarigon kaj revivigon de nia patra lingvo, en ĝi ankaŭ troviĝas la urbo, tiu alloga urbo centro de la intelekta movado, kiu per sama festo, sed nun internacia, responde al la bezonoj de la nuna epoko, donis fortikan, efikan, finan alpuŝon al la lingvo, kiu reprezentas la idealon de niaj koroj, la realon de la vivo de niaj nepoj.

Ho ve, tiun revon detruis la senkompata povo de l' kruela neiigo. Sed ni ne senkuraĝiĝos; male, ni elĉerpos plian aldeziron kaj konstantecon en tiu kontraŭaĵo, kiu permesas al ni aldoni al la entuziasmo, kiun ni sentas por nia afero la deziron honori memoron de niaj amitoj.

Neniu pli bona scenejo por nia laborado, ol tiu de ĉi tiu urbo, kie ni havas la ĝojon okazigi niajn kvarajn Florajn Ludojn. Ĝi estas kva-zaŭ simbolo de la fundo kaj de la formo de nia movado. Unuflanke, la beleco de la fraŭlinoj, kiuj nin prezidas, la graveco de la aŭtoritatuloj elektitaj de l' popolo kiuj nin akompanas, reprezentas la poezion, la altecon, la homecon de nia celo. Aliflanke, jen, por reprezenti nian movadon, la naturo, kiu nin ĉirkaŭas; jen la okroj akutaj de la abruptaj rokoj kiuj distranĉas la maron kiel laŭ rando de punktoj; jen la festa gaja bluo de la akvoj tra kiuj la facilrompeblaj praŝipoj alportis al ni sangan kaj civilizacion novan. Tiuj okroj kaj bluo kuniĝas en nia imago kaj konsistigas la verdon sur kiu malfaldiĝas la veloj de la ŝipo de nia idealo.

Mi diris».

FRED. PUJULÀ

Grandaj aplaŭdoj aŭdiĝas, kaj la urbestro S-ro Durán per la vortoj *la festo estas finita*, fermas ĝin. La Reĝino deiras el sia trono kaj akompanata de la poeto trairas la salonon; ilin sekvas la Ama Kortego, la aŭtoritatuloj kaj la Konservantaro de la Floraj Ludoj. La ovacio per kiu la publiko gratulas ŝin, kuniĝas al tiu, kiun ŝi ricevas de la multaj personoj starantaj sur la strato, kiuj ne povis eniri en la teatron.

La festo de la Floraj Ludoj estis kiel kutime en niaj kongresoj la plej populara el iliaj festoj; sed en ĉi tiu okazo ĝi havis karakterojn de eksterordinara sukceso, ĉar en la granda teatro amasiĝis (sen ia trograndigo) 2000 personoj.

AKCEPTO EN HEJMO BATET

Al la bone konata kaj amata de la popolo fabrikisto S-ro Batet, patro de nia ĝentila Reĝino, ni ŝuldas la plej grandan parton de nia sukceso, ĉar la simpatio al li kaj al lia bela filino portis al nia Festo tre brilan ĉeestantaron. Post la Floraj Ludoj S-ro Batet kun sia simpla afableco volis ankoraŭ honori nin, kaj li akceptis en sia eleganta loĝejo ĉiujn esperantistojn, kiuj estis tie regalataj per aminda maniero de gesinjoroj Batet, kaj de ilia ĝentila Rozo, nia Reĝino, kiuj nenion ŝparis por pliagrabligi nian viziton, per si mem tiel agablan. Ĉampano, dolĉaĵoj, estiminda komplezemo, retenis tie longatempe la belajn fraŭlinojn de la Kortego de Amo, S-ron Domenech, gajninto de la Natura Floro, D-ron Bremón, pastron Casanovas, S-rojn Pujulà, Codorniu, Rey, Grau, D-ron Coll, pastron Planas, S-rojn Gili, Costa, Blanch kaj multajn aliajn, kiuj ĉe la disiro havis nur dankajn frazojn por gesinjoroj Batet, kies gastamecon neniam oni povos repagi. Al la multaj dankesprimoj, kiujn ili ricevis, ni aldonas ĉi tie nian plej sinceran, kiun ni en tiuj agrablaj horoj ne povis sufiĉe esprimi.

BUKEDA BALO

En la sama teatro «Novitats» kie posttagmeze okazis la Floraj Ludoj, havis lokon vespere la bukeda balo. Plenplena estis la granda partero de belaj fraŭlinoj en luksaj tualetoj, ĉirkaŭ kiuj flirtadis gajaj junuloj, en kies koroj, ĉefe en la esperantistoj, al la ĝojo partopreni en la brila festo miksiĝis la bedaŭro ne povi daŭrigi senfine la restadon meze de la sincere sentantaj ĝisolanjoj, akirintaj jam plene la simpatiojn de la aliurbaj vizitantoj. Danco post danco la programo elĉerpiĝis, kaj ne rimarkite venis la horo de l' disiro. Ho, estas necese aŭdi mem la adiaŭojn por kompreni ilian varmecon, la bedaŭron, kiun ili entenas! Ni ne scias, kiamaniere raportu pri la salutoj de la samideanoj kunvivintaj kelke da horoj, dum kiuj okazis tiel belaj festoj, kaj disirontaj almenaŭ por unu jaro post kelke da minutoj! Oni ripetis al la kamarado, al la amikoj, al ĉiuj personoj, la detalojn de la solenoj de l' Kongreso, la nomojn de la partoprenintoj, la elegantecon kaj riĉecon de la tualetoj kaj... la belecon de la fraŭlinoj. Post la danco de ĝentileco, kies ĉefan bukedon proponis al F-ino Gertrudis Regincós, sinjoro Josep Soler, la balo iris rapide al fino, kaj de ĝi multaj esperantistoj iris rekte al la stacidomo, reveni hejmen post la feliĉaj kongreshoroj.

RESUMA IMPRESO

La Va Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio estis tiu, kiu postulis pli da forto kaj entuziasmo de la Organiza Komitato; ĝi estis ankaŭ tiu, kies sukceso depasis pli multe la esperojn de la organizintoj. Malgraŭ la grandaj, malaprobindaj klopodoj malhelpi la Kongreson, malhelpante ankaŭ al la disvastiĝo de Esperanto en la kongresurbo kaj ĝia regiono, partoprenis en la Kongreso 200 geesperantistoj el ĉiuj regionoj de Katalunujo, el kiuj kelkaj devis fari iom longan vojaĝon: certe la nombro de kongresanoj estus estinta multe pli granda, depasante tiun de la antaŭaj kongresoj, se la deziro ĉeesti la Dekan en Parizo ne estus reteninta hejme multajn samideanojn, kiuj uzis siajn ŝparojn en pasintaj jaroj por viziti nian ĉiujaran ĉefeston. Sed la alfluo al St. Feliu, precipe en la dua kongrestago, de multaj esperantistoj el la ĉirkaŭaĵo, kiujn malproksimigis de la kunvenoj senkaŭza timo je malsukceso, kontribuis firmigi nian situacion kaj gajni por ni la simpatian kaj estimon de la enloĝantaro, kiu certe, se en la unua tago tenis sin iom flanke de ni, en la dua favoris nin kaj ĉeestis amase en niaj festoj.

Tiun rezultaton tre ŝatindan ni ŝuldas plejparte al la laboro de la Organiza Komitato, kiu sub la prezido de S-ro Presas laboregis antaŭ kaj dum la Kongreso por ĝia sukceso: vere li kaj liaj kolegoj meritas la dankon, kiun unuanime la Kongreso voĉdonis.

La kataluna gazetaro estis ankaŭ tre favora al nia afero, ĉar la barcelonaj gazetoj publikigis telegramojn kaj raportojn el niaj festoj, kaj eĉ unu «El Día Gráfico» dediĉis al la Kongreso unu tutan grandan paĝon de fotogravuraĵoj. Krom tiu citita estis reprezentataj en la Kongresaj kunsidoj «Ciutat Nova» kaj «El Programa» de St. Feliu de Guixols; «El Norte» de Girona, «La Cruz», «Diario de Tarragona» kaj «La voz del pueblo» de Tarragona; «Gaceta de Cataluña», «El Correo Catalán» kaj «El Poble Català» de Barcelona.

La plej grandan sukceson de la Kongreso, kiu estus tute favoriginta al ni la publikan opinionon, ni ne povis koni ĝis post la Kongreso, ĉar bedaŭrinda eraro en la datoj forprenis de ni la ŝancon, paradi per oficiala protekto kaj altiri al niaj festoj la aŭtoritatulojn de l' tuta provinco.

La 3^{an} de Julio la Oficiala Gazeto de Hispanujo publikigis reĝan ordonon, per kiu Lia Reĝa Moŝto nomis la Reĝan Delegiton por elementa instruado en Barcelono, S-ro Batllés i Bertràn de Lis, reprezentanto de la Ministerio de Publika Instruado ĉe la Va Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio, kiu okazos la 28^{an}-29^{an} de Julio.

Vidu, do, per kia bedaŭrinda konfuzo, nia Kongreso ne havis ĝustatempe la altan protekton de la Ŝtato. Ni esperu, ke tio povos valorigi nian peton, atingi por la venonta Kongreso la oficialan apogon kaj helpon.



Memorinda vespermanĝo

Ĉe la *Rhin'a* restoracio, ni sidas ĉirkaŭ la manĝo-tablo trideko da kunmanĝantoj; ni festas per tiu-ĉi vespermanĝo la feliĉan (!) revenon de la karavananoj katalunaj, kiuj kuraĝegaj, kaj malgraŭ la bruoj pri mobilizado kaj milito pretigis la valizojn, kaj... al Parizo!

La festo daŭras tre ĝoja, kaj meze de ridoj kaj entuziasmo, jen kio elĉerpas el la interparolado tiu-ĉi nediskretulo.

« — Ni estis preskaŭ 50, — diras S-ro Urbez — kaj mi estas certa ke en pacaj tempoj, pli ol 100 katalunoj estus irintaj Parizon, por ĉeesti la X^{an}. La aliro estis bona... sed la reveno... »

— Ne parolu pri reveno, respondas S-ro Llorach; imagu tri-tagan vojaĝadon, en vagono por ĉevaloj, havante nenion por manĝi, ĉar la vagonaro ne faras ekzaktajn haltojn en la stacidomoj, kaj oni riskas ĝin perdi se oni lasas la vagonon... Certe la malmola pano kiun vendis al ni la francaj solatoj, estis por ni pli bongusta ol tiu ĉi peco de kokido...

— Tamen — aldonas S-ro Masana — ni estus pasigintaj bonan vojaĝon, se blinda Sevilla'ano, pli babilema ol Ciceron'o, kiun ni akompanis, estus restinta en Parizo.

— Ho! jes, — respondas kelkaj samideanoj lin konantaj — gardu nin Dio je similaj blinduloj!

— Sed, sinjoroj, ĉio kion vi rakontas, estas nur bagateloj rilate la maltrankvilajojn, kiujn travivis S-ro Rosals en Bordeaux — diras S-ro Grau — Rakontu, rakontu, — lautigas kelkaj voĉoj...

— Tute simple, — rakontas S-ro Rosals. — Imagu min, kaptitan de la francaj ĝendarmoj, kvazaŭ spiono.

— Ĉu eble? Rakontu!

— Mi loĝis en Bordeaux, kaj sekvante la impulsojn de mia inklinado al la konkvoj — vi ĉiuj scias, ke mi estas fervora kolektanto —, mi faris promenadeton al la urb-ĉirkaŭaĵo, por vidi ĉu en tiu tereno mi trovus kelkajn ekzemplerojn de «fossilioj» kiujn mi ne posedas. Mi surgrimpis monteton, kiam mi aŭdis, ke du biciklistoj vokas min.

— Kion vi faras ĉi-tie? — ili demandis.

— Mi kolektas konkvojn, sinjoroj.

— (Rideto). Vian pasporton, sinjoro?

— Mi lasis ĝin intence en mia hotelo el Bordeaux, ĉar mi ne volas ĝin perdi...

— Sekvu nin, sinjoro!

Kaj jen mi, antaŭ la urbestro kaj la sekretario de tiu vilaĝeto apuda al Bordeaux, suferanta teruran demandaron; «kiu vi estas?» «kion vi faris?» «kion vi serĉis?» «kien vi iras?» «de kie vi venas?» k. t. p. Neniom valoris miaj protestoj, ke mi estas honesta viro, nekapabla fari malbonon al iu ajn. La sekretario daŭrigis skribi silente kaj penseme sur blanka papero miajn respondojn. Post la skribo, li klopodis konvinki la urbestron pri mia honesteco. Malfeliĉe tiu ĉi sinjoro, vole-nevole deziris trovi spionon, kaj ne lasis sin kon-

vinki:—Pripensu, diris la sekretario, ke tiu sinjoro ne estas mizerulo; li surportas 500 frankojn en sia paperujo, li venas de Parizo, kien li iris por ĉeesti la kongreson de Esperanto... — Ho! ĉu vi scias, ĉu li ŝtelis tiun monon? respondis la urbestro... Resume, laŭleĝe, la urbestro min sendis al la ĝendarmkazerno, ĉar en milittempo, nur militistoj devas sin okupi pri fremduloj trapasantaj la landon sen pasporto... aŭ kun la pasporto forgesita en hotelo.

Du ĝendarmoj akompanis min al kazerno, kie oni min senvestigis kaj traserĉis mian tutan veston de la kapo ĝis la piedoj : eĉ la ŝuojn ili trarigardis! Mi jam malesperis povi vespermanĝi kune kun pastro Casanovas — nia Ĝerona samideano — en la Bordeaux'a hotelo kie mi lin lasis, kaj atendis pasigi la nokton en ĝendarmejo, kiam la serĝento rajtigis individuon por akompani min al la urbo; ni prenis la elektran tramon, kiu alligas la vilaĝon al la urbo, kaj post unu horo la ĝendarmo legis kaj esploris detale la pasporton, kiun mi havis ŝlosita en la valizo lasita en la hotel-ĉambro... Feliĉe mi nun troviĝas ĉe vi, sana kaj ĝoja...

— Ĉu vi ne publicos tiun ĉi epizodon, S-ro Rosals? — demandis S-ro Balcells. — Estus interese vidi tiun ĉi anekdoton rakontitan de vi mem.

— Jes, tion mi faros, kiam mi havos tempon... Kaj meze de la postmanĝa babilado, ni ekscias ke S-ro Sabadell kaj familio restis en Monaco, ĝis la mobiliztempo estos finita, ke li faris la vojaĝon en milita vagonaro meze de generaloj kaj koloneloj, kaj ke li kona-tiĝis tie kun kapitano Rousseau, frato de la samideano Rousseau el Parizo, tre konata pro liaj verkoj pri Farmacio; ke la aktoraro ludonta «Georgo Dandin», revenis sendifekte gvidita de S-ro Gual; ke la samideanoj el Olot, S-roj Fortet kaj Prat, S-ro Galcerán el Vilanova, S-ro Soriano el Sevilla, S-ro Perogordo el Madrid, k. t. p. povis, post longaj atendoj ĉe la konsulejo por ricevi la «pasigilon», atendoj en la stacidomoj por preni la vagonon, ŝanĝoj de vagonaroj kaj similaj malhelpoj, reveni hejmen...

La bruo de la entuziasmo estis iom paligita pro dolora sciigo. Nia kara Pujulà estas ankaŭ mobilizita kaj sekvas la militon kiel franca soldato; ankaŭ nia samideano Mattes. Al ambaŭ oni sendas dokumenton subskribitan de la kunsidantoj, dezirantan bonŝancon kaj baldaŭnan revenon... kaj la kunmanĝintoj dissiĝas malbenante tiun ĉi teruran militon, kiu ŝtelas al ni karajn amikojn kaj al la mondo, milojn da vivoj. — J. B.



S-ino Joaquina Rosal de Rosals, nia entuziasta samideanino, tiel bone konata de la esperantistoj katalunaj, mortis antaŭ nelonge en Barcelono pro tifa malsano.

Al nia tre kara amiko S-ro Rosals, la fervora esperantisto, ni prezentas la sincerajn kondolencojn de niaj kunfederacianoj.

Oficiala Parto

En kunsido okazinta la 26^{an} Julio, la nova Komitato de la K. E. F. decidis nomi S-rojn F. Pujolà, G. Galcerán kaj J. Serrat kiel reprezentantojn de nia Federacio en la X^a Kongreso en Parizo, kiu bedaŭrinde ne efektiviĝis pro la tiam komencantaj cirkonstancoj.

Denove okazis kunsido la 6^{an} Septembro, kies sola decido prenita estas, ke la Komitato sendos al D-ro Zamenhof komunikaĵon petantan sciigojn pri lia sorto kaj tiu de lia familio, samtempe transdonante al li en la nunaj tempoj de malpaco, la ateston de nia kora seninterrompa fideleco al lia homama verko, kiel ankaŭ la salutojn de la kataluna gesamideanaro, konsiderinte ke estas devo de la Federacio tion fari post la malagrablaj okazintaĵoj, kiujn li travivis dum vojaĝo al la Kongresurbo.

La 25^{an} Oktobro nova kunsido okazis kies decidoj prenitaj estas jenaj:

Ĉar multaj federacianoj ne pagis ankoraŭ la jarkotizojn de 1914^a publikigos la Komitato cirkuleron kiu estos sendata al ĉiu federaciano sen escepte, en la senco ke tiuj kiuj ŝuldas tiun kvanton bonvolu ĝin saldi kiel eble plej baldaŭ, kaj la aliaj kiuj jam tion faris helpu la Komitaton instigi la unuajn plenumi sian devon.

Kunvoki alian kunsidon por la 22^a Novembro, invitante al ĝi kelkajn kompetentajn samideanojn por sciigi al ili la finanĉan staton kaj serĉi kune efikan rimedon por daŭrigi la publikigon de nia oficiala organo.

La Sekretario
JOSEF VENTURA



Pro la neregula apero de nia gazeto, amasiĝis en la Redakcio multe da sciigoj pri esperantistaj festoj, kiuj ne povas esti publikigataj. Ni klopodos mallongigi tiujn sciigojn kaj aperigi ilin laŭvice, esperante ke iliaj aŭtoroj pardonos la prokraston.

L'Administració de la K. E. F. no ha escatimat res per a la publicació del present número, a fi que serveixi de compensac'ó a l'irregularitat de l'aparició de la revista, creguda que els federats sabràn apreciar son bon desig.



Societoj kaj Grupoj aliĝintaj al la «Kataluna Esperantista Federacio»

Badalona Stelo	Sant Pere, 86	Badalona
Barcelona Stelo	Marquès del Duero, 88.	Barcelona
Casino del Comercio	C. Sant Pere	Terrassa
Ĉiam Antaŭen	Poblet, 25	Barcelona
Ĉiam Antaŭen		Palamós
Escola Esperanta Lernejo	Sant Pere, 23	Sant Feliu de Guíxols
Esperanta Amikaro	P. Turers (Cafè del Comerç).	Banyoles
Esperanta Aŭroro	Laforja, 222	Barcelona
Esperanta Frateco	Wad-Ras, 218.	»
Esperanta Idealo	Mossèn Cinto	Santa Coloma de Farnés
Esperanta Lernejo	Caimó, 145.	Sant Feliu de Guíxols
Esperanta Nesto.	Sant Pere, 21	Barbarà del Vallès
Esperanta Racionala Grupo.	Wad-Ras, 216	Barcelona
Esperanta Reflektó.	Hospital.	Santa Coloma de Farnés
Esperanta Semo.	P. Pi i Margall, 14	Sabadell
Esperanta Stelo		Barcelona
Esperantista Amikeco	Pont, 38.	Manlleu
Esperantista Grupo.	Rambía Mendizabal, 52	Mataró
Esperantista Junularo.	Nort, 25.	Terrassa
Esperanto kaj Patrujo.	Sant Simplicí, 6, 2. ^o	Barcelona
Evolucio	Pons i Gallarza, 10	»
Fajro	Angels, 1, entr.	»
Frateco	Caimó, 32	Sant Feliu de Guíxols
Frateco	Cristina baixa, 50	Vendrell
Geronprovinca Esperantista Ligo		Sant Feliu de Guíxols
Ĝerona Espero	Cambra de Comerç	Girona
Ilerda Espero		Lleida
Instituto por la disvastigado de l'esperanta gazetaro.	Peu de la Creu, 10	Barcelona
Kampano		Stª Perpetua de la Moguda
Laboro Esperanta	Major, 44	Vilanova i Geltrú
Laboro kaj Kulturo.	Pou, 2	Calafell
La Rondo.	Aragó, 135	Barcelona
Libera Stelo	Joan I, 5 (Agrupació obrera).	»
Lumon.	Nort, 25.	Terrassa
Monta Grupeto		Sant Llorenç Savall
Montsanta Stelo.	Carretera, 2	Ulldemolins
Nova Semo	Major, 15	Reus
Nova Harmonio.	Nou, 74.	Torelló
Olot Stelo	C. Hospici (Biblioteca pública).	Olot
Pacaj Batalantoj		Castellar del Vallès
Paco kaj Amo	Unió, 2	Palafrugell
Semo (Ateneo E. P.)	Carme, 30	Barcelona
Semo	Suypacha, 1022	Buenos Aires
Supren!	Muntaner, 6	Barcelona
Tarragono Esperanta	Sant Agustí, 4	Tarragona
Unió Catalanista	Comte del Asalto.	Barcelona
Universala Frateco.	Vulcano, 12	»
Verda Stelo	Apoteko	Flix
Vika Esperantistaro	P. Major, 26	Vich
Vojantaŭen	C. de Barcelona (Soc. La Alianza)	Mollet

Ni rekomendas la abonon al

LA ONDO DE ESPERANTO

MONATA ILUSTRATA REVUO

————— (Fondita en la jaro 1909) —————

Ĉiu abonanto de la j. 1914

krom 12 n-roj de l'gazeto, — ricevos donace belan

Esper. libron:

ESPERANTA POŝKALENDARO POR LA JARO 1915

«La Ondo» aperas akurate la 1-an daton, novstile. Ĉiu n-ro havas 16 — 24 paĝ. Formato 17 × 26. Bela kovrilo

Literaturaj konkursoj kun premioj. Portretoj de konataj Esperantistoj. Diversaj ilustraĵoj. Beletristiko originala kaj tradukita. Plena kroniko. Bibliografio. Nia lanterno. Amuza fako (kun premioj). Anekdotaro. Korespondo tutmonda. (Poŝtk. ilustr.)

Anonco en «Koresp. Fako» — 3 respondkuponoj

La abonpagon (2 rubl. = 2, 120 sm.) oni sendu al librejo «*Esperanto*» (Moskvo, Lubjanskij projezd, 3, Ruslando) aŭ al Administracio de K. E. F. — poŝtmandate, respondkupone, papermone, per bankĉekoj aŭ per transpag. de Esp. ĉekbanko

Al ĉiuj personoj sendintaj leterojn aŭ petojn al S-ro J. Grau, kiuj ne ricevis ankoraŭ respondon, li petas afablan bonvolon. La esperantista tasko kiu pezas sur li, krom lia privata laboro, estas tro granda, des pli multe ĉar li restis sola en la Redakcio post la foriro de S-ro Pujulà, kaj dum la longa malsano de S-ro Pellicer. De nun li esperas, ke li povos komplezi akurate siajn korespondantojn.



Ĉiu membro de la *Kataluna Esperantista Federacio*, aŭ aboninto al KATALUNA ESPERANTISTO rajtos dufoje dum la jaro publikigi en la gazeto krom sia nomo kaj adreso IO VORTOJN por peti korespondadon, interŝanĝojn de kolektaĵoj, informojn k. t. p. aŭ sciigi ŝanĝon de adreso.



LA GAZETO KATALUNA ESPERAN-
TISTO OFICIALA ORGANO DE LA
KATALUNA ESPERANTISTA FE-
DERACIO POVOS REGULE APERI,
KIEL ORDINARE, SE ĈIUJ FEDE-
RACIANOJ HELPAS PER ĈIUJ
RIMEDOJ

MINIMUMA KOTIZAĴO TRIPES-
TA ESTAS ORDINARE PAGATA:
ĜI NE TUTE SUFIĈAS

AMIKOJ, PLIGRAVIGU LAŬPOVE
VIAN KOTIZON!